

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 212 (292)

MELBOURNE

Jan.-Feb., 1984

KUN GRANDA BEDAŬRO  
NI ANONCAS, KE A.E.A.-KASISTO  
SAM ELLYARD  
MORTIS JE 16-1-1984

## AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

At its closing session on 14 January, the Australian Esperanto Congress, which has been meeting at Bruce Hall in the Australian National University since 7 January, adopted the following resolutions:

(1) THE AUSTRALIAN ESPERANTO COMMUNITY, assembled in the Twenty-fourth Congress of the Australian Esperanto Association,

THANKS the Australian Government for its support in inviting the Universal Esperanto Association to hold its Seventy-third Congress in Brisbane in 1988, and

REQUESTS the assistance of the Departments concerned in ensuring appropriate staging of the Congress and reception of overseas visitors as part of Australia's Bicentennial Celebrations.

(2) THE AUSTRALIAN ESPERANTO COMMUNITY, assembled in the Twenty-fourth Congress of the Australian Esperanto Association,

THANKS the Senate Standing Committee on Education and the Arts for its consideration of proposals for the extension of teaching of Esperanto as part of a co-ordinated national language policy, and

EXPRESSES THE HOPE that the Committee in its forthcoming report will recommend teaching of the International Language, not only as a means of direct communication with people in other countries, and their culture, but also as an introduction to the learning of other languages.

(3) **THE AUSTRALIAN ESPERANTO COMMUNITY**, assembled in the Twenty-fourth Congress of the Australian Esperanto Association, **REQUESTS** the Minister and Department of Foreign Affairs, and the Australian Ambassador to UNESCO, to ensure that UNESCO organises appropriate celebration, on a world-wide basis, throughout the year 1987, of the Centenary of the International Language, Esperanto.

(4) **THE AUSTRALIAN ESPERANTO COMMUNITY**, assembled in the Twenty-Fourth Congress of the Australian Esperanto Association,

**THANKS** the Australian Association for the United Nations, the Country Women's Federation, the Society of Friends, the Federation of Modern Language Teachers' Associations, the Association of Modern Language Teachers of the Australian Capital Territory, the Women's Christian Temperance Union and other Australian organisations which have supported the expansion of Esperanto during the past two years,

**INVITES** them to continue their co-operation in the Working Group established in Canberra in 1983 to plan the public campaign for the introduction of Esperanto into Australian Schools.

**Recommends** to other interested organisations that they join the working group, thereby giving practical assistance to the achievement of the ideals of the Esperanto movement.

(5) **THE AUSTRALIAN ESPERANTO COMMUNITY**, assembled in the Twenty-fourth Congress of the Australian Esperanto Association,

**THANKS** the authorities of the Australian National University and particularly of Bruce Hall, and John 23 College for the facilities they have provided for the Congress, in particular for the accommodation and meeting rooms in Bruce Hall, use of the Chapel of John 23 College, and provision of space in the Chifley Library for the exhibition of books from the Library of the Association.

Bruce Hall, Australian National University.

14 January, 1984.

## KANBERO GASTIGIS LA 24-an AŬSTRALIAN ESPERANTO-KONGRESON

Du novaj Fratuloj de A.E.A.: Prof. Robbie Robertson kaj S-ino Marjorie Duncan

Dek ok jaroj pasis de kiam okazis Aŭstralia Esperanto-kongreso en nia nacia ĉefurbo kaj la loka Kongresa Komitato konsistis ĉefe el entuziasmuloj, kiuj ankoraŭ ne estis Esperantistoj en 1966. Dum tiu tempo, la nuna Prezidanto, S-ro Ralph Harry, deĵoris kiel ambasadoro eksterland. La sekretario Marj. Ellyard, kaj ŝia edzo Sam, la kasisto, estis kompare novaj esperantistoj. Same novaj estis Brenda Birkett, Katherine Lewis kaj Patti Anson, certe malgranda grupo, kiu per granda entuziasmo kapablis organizi sukcesan kaj agrablan kongreson.

Tamen, estis plezuro saluti dum la kongreso malnovajn Kanberanojn, kiuj same bone laboris en la pasinteco: Harry kaj Joyce Torr, Barbara Amies kaj Sandor Fulop.

Bedaŭrinde la ĝojo pro sukcesa kongreso ŝanĝiĝis al malĝojo, antaŭ ol la la taj kongresanoj disiris, pro la subita kolapso de kasisto Sam Ellyard, kiu

mortis en hospitalo post du tagoj.

La kongreso okazis en "Bruce Hall" de la Aŭstralia Nacia Universitato, kie ĉiuj kongresanoj loĝis komferte kaj bone aprezite. Manĝoj estis bongustaj kaj abundaj, eĉ al vegetaranoj estis provizitaj multe da salatoj. En la sama salono manĝis ankaŭ studentoj de la Universitato, bona okazo por varbi inter la junularo. Tiun oportunon ĉiam eluzis S-ino Idyss Einihovici (Perth), kiu kun propogandiloj ĉemane regule "atakis" la studentojn. Estis mirige konstati, ke kleraj universitataj studentoj neniam eĉ aŭdis la vorton "Esperanto". Tiun mankon korektis bona ekspozicio en la antaŭhalo de la manĝosalono, kie Sam Ellyard kaj Ges-roj Tuffman instalas tre informrican ekspozicion.

Supre de la manĝosalono, same kiel antaŭ du jaroj en Adelajdo, troviĝis la granda kongressalono, (nomita "Zamenhof" dum la kongreso) kaj tri malgrandaj, tre taŭgaj kromsalonoj por kursoj kaj komitat-kunsidoj (nomitaj "Maddern",

“Collingridge” kaj “Whiteford”). Tie Libro-servanto Tom Elliottt instalas sian abundan provizon da libroj, kiuj instigis viglan acetadon.

### LA KONGRESO KOMENCIĜAS

Aliĝis al la kongreso 127 gesamideanoj (141 antaŭ 2 jaroj en Adelajdo), el kiuj fakte ĉeestis 110 (121 en 1982) Laŭŝtate venis el Nova Sud-Kimrujo 42, el Viktorio 22, el Kvinlando 15, el Okcidenta Aŭstralio 11, el Kanbero 10, el Tasmanio 4. Krome ni havis la plezuron salutari inter ni S-inon kaj f-inon Issobe (Japanio), S-ron W. Vathis (Usono), S-inon Lyddon (Anglujo), S-inon V. Lidstrom (Finnlando) kaj Prof. Dr. C. J. Adcock (Nov-Zelando). Bedaŭrinde mankis esperantistoj el Suda Aŭstralio kaj la Norda Teritorio.

Unuafoje presiĝis speciala kvarpaĝa kongresa eldono de “Australian Esperantist”, kiun preparis S-ro Ralph Harry. Tiu enhavis, krom salutvortoj de la Prezidanto, la detalan kongresprogramon kaj raportojn pri diversaj trajtoj de la kongreso.

Jam antaŭ la kongreso S-ro R. Harry sendis “Pres-Servon” al la gazetaro kaj al Radio-Stacioj. Aperis sufiĉe ampleksa raporto en “Canberra Times” (8/1). Al la **Gazetara Konferenco** (lunde, 9/1) venis nur reprezentanto de la loka taggazeto “Canberra Times”. La Radio — kaj TV-Stacioj ignoris la inviton. Sekve de tiu konferenco “Canberra Times” (10/1) aperigis bonan raporton kun bildo pri S-ro Harry.

La **Interkongan Vesperon**, sabate (7/1), estris Arthur Cocking (Manly). La grupoj de Manly kaj Brisbano kantis kaj dancis kaj Jim kaj Jennifer Dimo ravis la ĉeestanton per akordion-muziko.

La **Ekumena Diservo** okazis dimanĉe posttagmeze (8/1) en la katolika kapelo de la Kolegio Johano 23, de la Universitato. Pastro Joseph Zerafa, ne-Esperantisto, celebris la meson tute en Esperanto. Li lernis sufiĉe bone la elparolon de Esperanto. Tamen, la raporto de “Canberra Times”, ke tio estis la unua okazo, ke meso estis kondukita tute en Esperanto, estis erara, ĉar ĉe la 1952-a kongreso en Sidnejo pola katolika monaĥo Pastro Sigismund kondukis meson tute en Esperanto. Ludis la orgenon Pam Francis (Melburno) kaj legis el la Biblio S-ro R. Harry kaj F-ino Isabel el Gale.

Samvespere okazis la **Distra Vespero**. La talenta Brisbano Societo prezentis

kelkajn pupeteatrajn skeĉojn. Sekvis D-ro E. nihovici, kiu donis siajn impresojn pri vizito al la japana Esperanto-Kongreso, kiu okazis en la teritorio de Oomoto en Kameoka. Isabel Gale bele ludis per Stilofono “In a monastery garden”.

Vera Payne parolis pri sia vizito lastjare al San Francisko, kie ŝi partoprenis altgradan Esperanto-kurson ĉe la Ŝtata Universitato. Ŝi omaĝis al la 2 instruistoj, Claude Piron kaj Yosimi Umeda, ambaŭ bone konataj en Esperantujo. Tiun varian distradon konkludis S-ro Kanacki (Melburno) per filmo pri la lasta kongreso en Adelajdo kaj S-ro R. Harry per filmo pri la Universala Kongreso en Antverpeno 1982.

### INAŬGURO DE LA KONGRESO

Lunde (9/1) okazis la oficiala malfermo de la kongreso. Post la himno “Antaŭen Aŭstrali!”, S-ro Ralph Harry malfermis la kongreson. Li legis la salutvojn de la Ĉef-Guberniestro, de la Ministro pri Edukado (Senatoro Wren), de la Ministro por Teritorioj (Tom Uren), de Prof. Peter Carmel de la Universitato kaj de Senatorino Margaret Reed (A.Ĉ.T.)

Li prezentis la eksterlandajn vizitantojn: S-inon Y. Issobe (Japanio), S-ino Lidstrom (Finnlando), S-ron W. Vathis (Usono) kaj Prof. D-ron C. J. Adcock (Nov-Zelando), kiuj persone salutis la kongreson. Plue S-ro Harry transdonis la salutajn de Gregoire Maertens (Prezidanto de U.E.A.), Mag. W. Auld, Skotlando, D-ro W. Solzbacher, Usono, Cathy Schulze, Redaktoro de ELNA Newsletter, Usono, Ges-roj Bossong, Nederlando, D-ro Ross Robbins, Mildura, Clarrie Strochnette, Launceston kaj Eino Looits Hobarto.

Sekvis nun la festparolado de la Prezidanto pri la temo “**Esperanto, Komuna Lingvo por Multkultura Mondo**”. La S-ro Harry diris, ke “ni nepre devas konservi kaj ĝui multkulturan socion. Tia multkultura socio postulas altan gradon de komprenemo. Dum 150 jaroj ni havis unuforman kulturon. Ni ĝuas nun en Aŭstralio novan socion, modernan multkulturan socion Estas danĝeroj ankaŭ en nia multkultura socio — ĉar povas esti streĉoj kaj konfliktoj inter klasoj, rasoj kaj komunumoj de malsimilaj originoj. Por atingi internacian komunan socion ni bezonas “toleremon”. Kaj por havi toleremon ni bezonas la komprenon, kiun donas internacia lingvo. Ni devas plene posedi nian lingvon por

partopreni en libera interŝanĝo de ideoj inter ĉiuj nacioj. Nur en libera multkultura socio ni povas ĝui la pacon kaj liberecon, kiuj estas la celoj de la homaro.”

Sekvis la lanĉado de kvar libroj presitaj en Aŭstralio de post la lasta kongreso: “Sur la Bordo” de Nevil Shute, tradukita de K. G. Linton; “Aŭstralio kantas sian historion”, eldonita de la Brisbana Esperanto-Societo; “Ghandi” de Edmond Privat, tradukita anglen de Dorothy Threlfall kaj “Aŭstralio-Esperanto Vortaro”, redaktita de Ralph Harry. S-ro Harry dankis al Eva Matasin pro donaco de \$2000 el la heredaĵo de John Matasin, kiu ebligis la presadon de “Sur la Bordo” kaj li transdonis al ŝi ekzempleron de ĉi tiu libro.

Per la kantado de “La Espero” finiĝis la 1-a parto de la Inaŭguro.

Post fotografado kaj lunĉo okazis positaĝmeze la 2-a parto de la Inaŭguro. Ray Ross raportis, ke la Kvinlanda Federacio organizis en 1983 du plensukcesajn konferencojn. La membro-nivelo restis stabila (proks. 80), Fonduso estis starigita por Esperanto-Domo en Brisbano. La societaj raportas ĝenerale mankon de komencantoj, tamen restas fidele kerno de entuziasmuloj. Grupoj kaptis ĉiun okazon por starigi ekspoziciojn kaj prezenti Esperanton al eksteraj grupoj. Okaze de la Skolt-Jamboreo apud Brisbano, estis disdonitaj flugfolioj al pli ol 1000 skoltoj.

Fondiĝis en Brisbano L.K.K. de ĉirkaŭ 20 membroj, kiuj laboras por starigi planojn kaj aranĝojn por la projektita UEA-Kongreso en 1988. Brisbananoj atendas la helpon de multaj aŭstraliaj esperantistoj, antaŭ kaj dum la kongreso. Oni anticipas, ke ĝis 100 helpantoj estos necesaj por glatigi ĉiujn aspektojn de tia kongreso.

Volo Gueltling, Vic-Prezidanto de la Federacio de Nova Sud-Kimruo, salutis la kunvenon, sed la Prezidantino, S-ino Betty Clemenson, provizis la jenan raporton: En 1983 oni renovigis la Esperanto-Domon en Redfern. Tion oni povis fari pro la saĝa antaŭvido de John Matasin, kiu aĉetis la najbaran domon. Tiu ni vendis por pagi la koston de renovigo de la Esperanto-Domo. La konstruistoj mem tiel interesiĝis pri Esperanto dum sia laboro, ke li petis tekstlibron kaj vortaron. Li kaj lia familio ĉestis la Zamenhof-Feston en la renovigita Esperanto-Domo. Nun ni havas

pli da spaco por kunveni. Klasoj daŭris dum la jaro, ankaŭ monataj kunvenoj kaj stud-grupoj. Restas nur la granda demando — kiel persvadi homojn lerni Esperanton? Ni bezonas ideojn.

Por la Esperanto-Federacio de Viktorio raportis Herbert Koppel. Li rakontis, ke en la nuna momento la Federacio trapasis “krizon”. La Prezidanto, novzelandano David Rockell, kiu ne estis membro de AEA, ĉesis prezidi en junio 1983 kaj la Vic-Prezidanto, Bob Reed, mortis en oktobro 1983. Tamen la agado daŭris. La Federacio kunvenis ĉiun 3-an monaton. En 1983 ni havis sukcesplanan tutagan seminarion en aŭgusto kaj boatekskurson sur la rivero “Maribyrnong” en novembro. La Federacio ankaŭ respondecis pri la Zamenhof-Festo, kiu allogis 42 esperantistojn. “Melbourne Esperanto News” aperis regule sesfoje jare.

### LABOR — KUNSIDOJ

Okazis 3 AEA — Kunsidoj kaj po unu de PAPIE, ORE, ISAE, Veteranoj, ILEI, UEA kaj SAT. Prezidanto Ralph Harry malfermis la AEA — Jarkunvenon (9/1). Li petis la ĉeestantojn observi minutojn da silento por la esperantistoj, kiuj mortis dum la pasintaj 2 jaroj. Li prezentis la raporton pri la agado de AEA. Sam Ellyard prezentis la kasistan, Herbert Koppel la redaktoran kaj Tom Elliott la libro-servan raporton. (Vidu faktojn aliloke). Ray Ross raportis pri sukcesplena Somerlernejo en Armidale en januaro 1983. 31 esperantistoj partoprenis kaj la Somerlernejo alportis profiton de \$400. AEA intencas organizi alian seminarion samloke en januaro 1985.

Jim D’imo parolis pri pli da propagando kaj sugestis ke ĉiu klubo havu propagandiston, kiu regule sendu proponojn al la centro. Ni elektu Komisionon pri Informado, kiu kunordigu ensenditajn proponojn de la klubaj propagandistoj. Li sendis jam prearitan artikolon al la redaktoro por publikigo en la asocia organo.

S-ro Harry demandis ĉu tiu propono pluas al la redaktoro. S-ro Koppel diris, ke tio estas bona ideo, sed ke oni pro spacomanko, preparu multobligitan suplementon. Oni invitis la klubojn organizi tiajn paŝojn de tempo al tempo. S-ino Jenny D’imo proponis, ke oni verku la suplementon en facila lingvo por ke ĉiu leganto komprenu la tekston.

S-ro Harry promesis redakti tian suplementon. Propono akceptita unuanime.

S-ro Harry demandis Pertanojn ĉu ili volus organizi la venontan kongreson en januaro 1986 en Perto. S-ino Vera Payne alparolis la kunvenon kaj diris ke jam alvenis la tempo kiam kongreso denove okazu en Perto. La Okcident-Aŭstralia Esperanto-Ligo invitas ĉiujn aŭstraliajn esperantistojn al tiu kongreso. Pertantoj jam elektis taŭgan kolecion por tiu kongreso, nome la "St. Catherine College", kiu situas en kvietaj distriktoj kaj taŭga aŭtobuso iras rekte de la kolegio al la urbcentro.

S-ro Harry proponis, ke la venonta kongreso okazu en Perto en januaro 1986 (Propono unuanime akceptita). S-ro Harry aldonis, ke ni poste diskutu pri la enhavo de la kongreso, ke ni plibonigu la programon por allogi pli da homoj. S-ro Jack Hawks (Perto) diris, ke kongreso devas havi celon kaj ni nepre retenu la intereson de la junuloj.

S-ino M. Ellyard diris, ke reklamo en gazeto tute ne havis sukceson. Ŝi rekomendis specialan duonan tagon por la ĝenerala publiko. D-ro Einihovici diris ke oni jam diskutis la problemon en Perto. Estus bona ideo allogi la publikon al Internacia Koncerto, sed ke ni nepre postulu iom da enirprezo, ne por gajni monon, sed ĉar la pasinteco montris, ke invitoj al senkostaj koncertoj tute ne vekis intereson ĉe la ĝenerala publiko.

S-ro Ray Ross nun raportis pri la Universala Kongreso en 1988. Li emfazis, ke tiun kongreson organizos la Brisbana Esperanto-Societo, NE la Kvinlanda Federacio. Loka Kongres-Komitato jam elektigis kun Trevor Steele kiel Prezidanto kaj Ray Ross kiel Sekretario. Oni establis "Garantian Fonduson" de \$1000. Ray Ross kontaktis 10 kolegiojn, el kiuj 6 jam pozitive respondis. Ĉambro kun 3 manĝoj kostos proks. \$30. Plej taŭga fajnas esti la Universitato de Kvinlando. Alia ebleco ekzistos en la Sportejo "Chandler", kiun oni nun konstruas. La L.K.K. provizore luis jam ambaŭ lokojn por la tempo inter la 7-a kaj 22-a de julio, 1988.

S-ro K. Linton demandis kie okazos la A.E.A.-Kongreso en 1988. S-ro H. Koppel proponis, ke A.E.A.—Kongreso okazu 3 tagojn antaŭ la Universala Kongreso. Ray Ross respondis, ke la L.K.K. havos tro multe da laboro kaj preferu ne okazu aŭstralia kongreso en 1988. S-ro Harry aldonis, ke aŭstraliaj esper-

antistoj, eĉ en 1987, helpu la Kongres-Komitaton en la preparado de la kongreso. Li proponis, ke AEA organizu nur modestajn eventojn por la 100-jara Jubileo, kaj koncentru siajn fortojn sur la U.K. La kunveno decidis, ke tut-aŭstralia kongreso ne okazu en 1988, sed ke en januaro 1987 mallonga kongreso estu organizita en Armidale lige kun somerlernejoj, por in aŭguri la Jubileon.

Sekvis la elekto de la nova Estraro. S-ro Wre Chandler, kiel Dojeno de la Aŭstralia movado, gvidis la elekton de la Prezidanto. S-ro Harry proponis, ke S-ro Mac Le Fevre estu la nova prezidanto post la 1-a de aŭgusto, 1984, ĝis kiu dato li estus preta daŭrigi kiel Prezidanto. S-ro Le Fevre respondis, ke li dubas ke li povas akcepti tiun taskon kaj li proponis Ray Ross kiel Prezidanton. Ray Ross respondis, ke li ne povas akcepti pli da laboro. Ĉar ne estis aliaj proponoj, la ĉeestantoj elektis S-ro Mac Le Fevre kiel Prezidanton post 1-a de aŭgusto, 1984. S-ro Harry estis elektita kiel Prezidanto ĝis la 1-a de aŭgusto.

S-ro R. Harry gvidis nun la elektadon de la estraro. Post diskuto la membraro elektis la sekvantan novan Estraron:

Prezidanto: ĝis 1-a de aŭgusto, 1984:

S-ro Ralph Harry, A.C., C.B.E. post 1-a de aŭgusto, 1984: S-ro Mac Le Fevre.

Vic-Prezidantoj: ĝis 1-a de aŭg., 1984:

S-ro Mac Le Fevre; S-ro Ray Ross.

post 1-a de aŭg., 1984: S-ro R. Harry; S-ro R. Ross.

Sekretario: S-ino M. Ellyard (Canberra)

Kasisto: S-ro Sam Ellyard (Canberra).

Redaktoro: S-ro Herbert Koppel (Melbourne).

Komisiito por la Jubilea Jaro: S-ro Trevor Steel (Brisbane).

Korespondaj Kursoj: S-ro John Moore (Emu Park).

Korespondpetoj: S-ino B. Cleminson (Manly).

Komisiito por Lernejoj: S-ro Arthur Cocking (Manly).

Ĉef-Ekzamenisto: S-ro Trevor Steele (Brisbane).

Libro-Peranto kaj Eldona Servo de AEA: S-ro Tom Elliott (Sidnejo)

Du asistantoj: S-ino M. Elliott kaj S-ino Joan Green (Newcastle).

UEA Komitatano: S-ro Ken Linton. (Melbourne).

Komisiito por Informado: Jim Dimo (Coominya, Kvinlando).

Komisiitoj por Ekspozicioj: Gerald kaj Ruth Tumman (Melbourne)  
 Ekspedanto de "Australia E-isto". S-ro Jack Fallu (Melbourne).  
 Konsilantoj por Klubaj Instruistoj: Vera Payne, Shirley Gradussov (Perto)  
 A.E.A. Biblioteko: F-ino Katherine Lewis (Kanbero).  
 Komisiito pri la Historio de AEA: S-ro Ray Ross (Brisbane).  
 Komisiito pri Somerlernejo: S-ro Ray Ross.

Komisiito pri "Aŭstralia Antologio": S-ro Alan Towsey (Tahmoor).

Kas-Kontrolisto: Ĉar A.E.A. estos korporacie registrita, la leĝo postulas "Kontroliston ekster la Asocio".

La ĉeestantoj rajtigis la estraron elekti tian fakulon.

En la pasinteco AEA helpis esperantistojn en sub-evoluigintaj landoj per donacoj de Esperanto-libroj. S-ro H. Koppel proponis helpon al S-ino Helga Farukuoye, kiu lastatempe instruis Esperanton al studentoj en Ondo, Nigero. Ŝi ricevis ĝis nun nenian subtenon kaj pagis el propra poŝo Esperanto-librojn por siaj studentoj, kelkaj el ili eĉ studentoj en la Universitato. La ĉeestantoj akceptis tian subtenon ĝis la maksimumo de \$100 por 1984/85.

S-ro R. Harry raportis, ke li donacis ekzempleron de la Sankta Biblio en Esperanto al la Pastro kiu celebris la Ekumenan Diservon (Pastro Joseph Zerafa).

Okazis **Junulara Kunveno**, kiun organizis kaj prezidis F-ino Brenda Birkett (Canberra). Ĉeestis i.a. S-ro Kam Lee (Hobarto), F-ino Katherine Lewis (Canberra), S-ro Blair Silverlock (Perto) kaj S-ro Richard Harris (Hobarto).

La ĉeestantoj kantis, partoprenis en amuza Kvizo, ludis TV-Intervjuon en kiu ili prezentis sin mem. Je la fino la ĉeestantoj petis, ke A.E.A. helpu ilin stariĝi Junularan Organizon en Aŭstralio. Sekvis vigla diskuto pri fondiĝo de tia organizo kaj oni sugestis uzi iom da mono el la Stipendia Fonduso.

### HOR-KONKURSO

Unuafoje ĉe Aŭstraliaj Esperanto-Kongresoj okazis **Hor-Konkurso**, memore al la mortinta Fritz Mueller-Soraŭ, kies fratino Hertha, kune kun kelkaj Sidnejanaj, donacis al A.E.A. belan "Sildon".

Tiu konkurso okazis mardo vespere (10/1). Tri horoj partoprenis. Unue kantis la Waverley Esperanto-Grupo, el Melbourne, kiu konsistis el Isabel Gale, Mary

Armour, Kit Brisbane, Val Fotheringham, Nellie Lyddon kaj Margaret Miller.

Sekvis la Brisbana Esperanto-Societo, kiu multe impresis pro la uniformaj blankaj vestaĵoj kun verdaj zonoj. Konkudate de Sybil Martin kantis Decia Shonhan, Annie Spencer, Gay Phillips, Ges-roj R. Ross kaj Gilbert Shonhan. Akompanis per piano Kay Anderson.

Kiel tria grupo sekvis la horo de la Manly Esperanto-Societo. Konkudate de Arthur Cocking kantis Marjorie Duncan, Eunice Graham, Judith Hanna, Beryl Loh, Eva Matasin, Margaret Roberson kaj Bess Scott.

Juĝantoj estis John Bennett, Edukisto pri muziko en Kanbero, Jim Dimo kaj Ralph Harry. Dum la Bankedo (11/1) S-ro Harry anoncis, ke gajnis la trofeon la Brisbana Esperanto-Societo.

### DRAMO-KONKURSO

La tradicia Dramo-Konkurso por la A.E.A. Dramo-Trofeo okazis jaŭde, 12/1. Partoprenis kvar grupoj, kiuj prezentis altkvalitajn teatraĵojn kaj la juĝantaro havis trege malfacilan taskon. De oris denove kvin juĝantoj: S-ino Joko Issoke (Tokio), S-ino Ivy Fallu (Melburno), S-roj Don Pescod (Drouin, Vik.), Alan Towsey (Tahmoor, NSK.) kaj Herbert Koppel (Melburno).

La Kanbera Esperanto-Societo prezentis la dramon "**Diplomatia Dilemo**", verkitan de Ralph Harry. Ĝi estis ekscita kaj atentotena teatraĵo, kies intrigo estas kompareblaj al tiuj de la fama brita verkistino Agatha Christie. Certe tiu dramo meritas tradukadon kaj eldoniĝon alilingven. Ni esperas, ke S-ro Harry entreprenos tion. Reĝisoro estis Sam Ellyard. La ambasadoron de Centrolando ludis Ralph Harry, ties edzinon Marj Ellyard. Aliaj aktoroj estis Mac Lefevre, Katherine Lewis, Brenda Birkett, P. Hali kaj T. Metherall.

La Brisbana Esperanto-Societo prezentis la teatraĵon "**Kiu mortigis S-ro Rubekolo**", verkitan de Gaye Phillips. Elstaris la aktorado de Decia Shonhan, kiu ludis S-inon Volupto, la estrinon de la "Ruĝluma Masaĝ-Salono". Lian Juĝan Moŝton ludis Ray Ross kaj la Prokuroron Gaye Phillips. La "kompatindan" akuziton ludis Peggy Ross.

Sekvis la Okcident-Aŭstralia Esperanto-Ligo, kiu prezentis la dramon "**La edzino kaj ĉevalino**". Ĉefrolis Vera Payne kaj Blair Silverlock, kiel la geamantoj, dum la intrigantan maljunulon

ludis D-ro Einihovici. Shirley Gradussov impresis kiel la servantino.

"**Jonĉjo ne forlasu min**" estis la titolo de la dramo prezentita de la "Wesley Centro" el Sidnejo. Fakte, ĉiuj ludantoj estis membroj de la Manly Esperanto-Societo. S-ino Margaret Liston, kiu estis profesia artistino, ludis la ĉef-rolon. Sylvia Burkitt lerte plenumis la malfacilan taskon ludi viran rolon, tiun de "Jonĉjo". Bone aktoris ankaŭ la multtalenta Joan Green.

Kongresanoj devis atendi du tagojn antaŭ ol ili informiĝis pri la rezulto de la Dramo-Konkurso. Okaze de la oficiala fermo de la kongreso S-ro H. Koppel anoncis la decidon de la juĝantaro, kiu estis trege malfacila, ĉar la nivelo de la prezentadoj de la kvar grupoj estis preskaŭ egala. Gajnis la trofeon la **Okcident-Aŭstralia Esperanto-Ligo** per 79 poentoj, dum la Kanbera Esperanto-Klubo ricevis 77½ poentojn. Inter la unua kaj la lasta grupoj estis diferenco de nur 6 poentoj. S-ro Koppel dankis al ĉiuj kvar grupoj pro ilia ludado kaj esprimis la esperon, ke ili denove konkurencu en 1986 en Perto.

#### SEMINARIOJ KAJ PRELEGOJ

Kvarfoje okazis matene tri diversaj **Seminarioj**, S-ino Vera Payne lerte instruis komencantojn, Ray Ross la progresintojn kaj Alan Towsey tradukistan kaj literaturan klason.

Marde posttagmeze (10/1) Alan Towsey estris interesan **Literaturan Sesion**. S-ino Winsome Greenhalgh legis memtradukitajn poemojn, Herbert Koppel deklamis poemojn de Kalocsay, Baghy kaj Schwartz, Ralph Harry prelegis pri aŭstraliaj Esperanto-verkistoj kaj tradukistoj kaj Alan Towsey raportis pri la progreso de la Aŭstralia Antologio al kiu ĝis nun estis kontribuitaj 20 tradukaĵoj. Estis mirinde ekscii el la prelego de Ralph Harry kiom multe kontribuis aŭstraliaj Esperantistoj. Li ankaŭ raportis, ke ekzistas iom da ebleco ricevi subvencion por la eldono de libroj de la aŭstralia registaro.

#### EKSKURSOJ

La Kongresa Komitato aranĝis kvar tre interesajn ekskursojn. Lunde (7/1) kongresanoj vizitis la lokon, kie oni nun konstruas la Novan Parlamentejon. Ni preterpasis multajn ambasadejojn kaj vizitis la Serban Preĝejon. Tagon poste ni vizitis la "Tidbinbilla Spacstacion", kiu estas grava ĉenero en la tutmonda spac-esplorado. Ni fine haltis ĉe strateto Collingridge, kie S-ro Harry klarigis, ke

Collingridge estis la fondinto de la unua Esperanto-klubo en Nova Sud-Kimrujo.

Tuttaga ekskurso okazis merkrede (11/1), kiam kongresanoj vizitis Cockington Green, la Botanikajn Gardenojn, la modernan sportejon kaj fine ŝipekskursis sur la lago. Sekvis kvara ekskurso vendrede (13/1), kiam kongresanoj vizitis la imponan Nacian Galerion kaj la Alt-kortumon.

Dudek kongresanoj havis la oportunon viziti vendred-vespere (13/1) la **Nacian Observatorion**, kiu troviĝas sur **monto STROMLO**. Tiuj el ni, kiuj havis la bonŝanco viziti tiun interesan lokon en 1966, estis iom seniluziigitaj kiam la aŭtobuso haltis ne antaŭ la ĉefa observatorio, sed antaŭ unu el la pluraj malgrandaj observatorioj. Estis nuba nokto, do rigardo tra la teleskopoj ne eblis kaj la ebleco prezenti diapozitivajn ne ekzistis en tiu malpli granda observatorio.

Bonvenigis nin juna, tamen tre sperta astronomo, kiu ŝajne ne rajtis funkciigi la teleskopon kaj la diversajn aparatojn. Li klarigis la gravan laboron de la astronomoj kaj montris la diversajn komputerojn, kiujn ili uzas en siaj laboroj.

La **Muzika Vespere** (9/1) estis alt-nivela spektaklo. Jennifer Dimo komencis per la uverturo el "Orfeo en la Submondo" de Offenbach, vera majstrino de la akordiono. Sekvis la Brisbana horo per kantoj el "La Sentimentulo". Sherman Pretty (hobojo) kaj Keith Radford (Piano) ludis sonaton de Handel kaj Keith Radford, piano, ludis la "Ritualan Fajro-dancon" de Falla. Post la paŭzo Kam Lee kantis kaj ludis la gitaron kaj tri artistoj de la Hispana Danc-Akademio prezentis dancojn. Nia Jenny Dimo denove majstre ludis la akordionon.

La **Bankedo** okazis merkrede (11/1) en la granda manĝalono. Post la Tosto al la Reĝino s-ro Chandler proponis la toston al la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Ray Ross proponis la toston al la gastoj, al kiu respondis S-ino Joko Issobe.

S-ro Mac Le Fevre proponis la toston al la L.K.K. al kiu respondis S-ro Ralph Harry. Li dankis la membrojn de la Loka Kongresa Komitato, kies senlaca laboro ebligis tiun kongreson. Sekvis nun la instalo de **du novaj Fratuloj de A.E.A.** S-ro H. Koppel prezentis **Prof-on. Robbie Roberston** kaj Ken Linton **S-inon Marj. Duncan** (Manly) kaj S-ro Harry surpungis la honorinsignojn. Jim Dimo anoncis,

ke la Brisbana Societo gajnis la Ĥor-konkurson. S-ro Alan Towsey gvidis aŭkcion, kiu alportis bonvenan profiton al la AEA-Kaso. S-ro Towsey dankis Ges-rojn Einihovici pro multaj donacoj por la aŭkcio.

S-ro Mac Le Fevre gvidis la "Distran Vesperon" (13/1). Jim Dimo prezentis magiaĵojn kaj lia edzino ludis la akordionon. Vera Payne montris diapozitivajn pri San Francisko kaj Gail Tregear pri Mongolio. Jim Dimo "instruis" kiel facila estas la angla lingvo kaj la Brisbana horo prezentis tri popolkantajn.

La "Oficiala Fermo" okazis sabate (14/1). S-ro R. Harry prezentis la kvin rezoluciojn de la kongreso, kiujn li sendis al la gazetaro, radio kaj oficialaj instancoj. (Legantoj vidu la tekston sur nia unua paĝo). Li ankaŭ raportis ke AEA sendos leteron al la Akademio de Esperanto, ke tiu supera lingva instanco faru decidojn pri la normigo ne landnomoj kaj la uzado de "FAR" kiel prepozicio.

S-ro R. Harry raportis, ke la estraro decidis ne altigi la membrokotojn, sed petis ke la membroj TUJ pagu la kotizojn, kaj ke ĉiu membro provu varbi alian membron por la asocio. Li ankaŭ petis ke membroj faru donacojn al la "Subten-Fonduso" de "Australian Esperantist". Li transdonis la kongresan flagon al la Pertanoj kaj petis ĉiujn ĉeestantojn veni al Perto por la kongreso en januaro 1986.

Kiel lasta ero de la kongreso okazis samtage la "Neformala Vespere", kiun gvidis Vera Payne. Ges-roj Le Fevre kaj Kam Lee kantis kaj S-ro Ralph Harry prezentis siajn "Analojn por 1983". Roger Springer (Bathurst) ludis la sakŝalmon kaj Marj Ellyard gvidis "Kvizon", kiun gajnis Kvinŝlando.

## FAK — KUNVENOJ

**P.A.P.I.E.:** Kadre de la 24-a AEA-Kongreso en Kanbero, kunveno de PAPIE decidis malfondi la asocion. La Prezidanto de PAPIE, Trevor Steele, prezentis, per letero, sian proponon, ke malfondiĝo okazu pro la fakto, ke "en la nuna stadio de la movado PAPIE ne havas rolon". (akceptita).

Oni decidis donaci la saldon de la asocio al la Fonduso por la aranĝado

de la Universala Kongreso en Bristol en 1988. Plue oni decidis, ke en venitaj AEA-Kongresoj, instruistoj kunportu interesajn ideojn kaj metodojn plibonigi instruadon; samtempe la asocio ILEI meritas la subtenon de ĉiu instruisto.

—R. ROSS.

**O.R.E.** (Ornitologia Rondo E-lingva) **I.S.A.E.** (Int. Scienca Asocio E-kunvenis kune, ĉar ili havas komunan celon — uzi Esperanton en sciencaj kampoj, inkluzive de naturaj, sociaj, kaj Wre Chandler kiel monda dum prezidanto de ORE, kaj Kieth Bow aŭstralia delegito de ISAE, parolis la nova situacio en tiuj organizoj. Ambaŭ bezonas pli da membroj certigi la daŭran vivon de siaj gazetoj: "La Mevo" kaj "La Suda Mevido" ORE, kaj "Scienca Revuo" de ISAE.

Aparte de la individuaj membroj ĉiu E-klubo aŭ grupo en Aŭstralio devas aboni ĉi tiujn gazetojn, por ke membroj povu legi sciencajn kaj teknikajn tekstojn prepare por la Nova Supera Ekzameno. — Keith Bow Wre. Chan

**U.E.A.:** Prezidis la Ĉef-Delegito Linton, kiu klarigis ke ni nur pli modeste festu la centjaran jubileon Esperanto en 1987, ĉar ni devos fortan subtenon al la Universala Kongreso, kiu okazos en Brisbano en 1988. La diversaj delegitoj rakontis pri agado en siaj hejmurboj. S-ro Ralph H legis raporton riceviton de Trevor Steele, kiu sugestis, ke aŭstraliaj kluboj "ĝenerale" kun kluboj en aliaj mondpartoj. S-ro Linton ankaŭ faris apelon, ke membroj plue subtenu la UEA-oficejon en Nov-Jorko per donacoj.

**S. A. T.:** Nur tre malmultaj ĉeestis kunvenon. SAT - Peranto Volo Guelt klarigis la celon de S.A.T. kaj iuj membrojn pagi la kotizon. Se vi povas studi 8 lingvojn, inter ili ankaŭ la kotizon al Volo Gueltling, 0/45 Street, Ashfield, NSW, 2131. La kotizo estas \$23.00 (membrecio en la gazeto "Sennaciulo"). Se vi deziras ricevi ankaŭ la "Sennaciecan Revuon", aldonu \$4.50.

**I.L.E.I.:** Ĉeestis 15 personoj; prezidinta aŭstralia delegitino Annie Spencer. Vera Payne informis, ke en la "Mount Lav



College of Advanced Education" oni povas studi 8 lingvojn inter ili ankaŭ Esperanton, kondiĉe ke almenaŭ 15 studentoj deziras partopreni la kurson.

Marjorie Ellyard informis, ke oni povos instrui Esperanton en la "Nova Kultura Centro" de Kanbero, kiam ĝi estos malfermita en proks. ses monatoj. En Toowoomba Esperanto estas instruata en la "Gabinvar Alternejo" kaj en "Holy Name Lernejo". Trevor Steele daŭre penas enirigi Esperanton en la "Kolegio por Instruistoj" kaj lokaj lernejoj.

## RAPORTO DE LA REDAKTORO

Du laborplenaj jaroj pasis depost nia lasta kongreso en Adelajdo. Dum tiu tempo ni eldonis 18 numerojn de nia gazeto "Australian Esperantist", dank' al la malavaraĵoj donacoj al la Subten-Fonduso de nia gazeto.

Tiuj donacoj montris la kontenton de niaj legantoj. Nia gazeto fariĝis dum la pasintaj jaroj pli ol nura landa bulteno. Sed pli bone ol la redaktoro, la fama Esperantistino **Audrey Childs-Mee**, el Rotterdam, priskribis nian gazeton. Ŝi skribis: "The Australian Esperantist" estas landa gazeto, sed ne simple enlanda, insuleca bulteno. Ĝi estas belaspekta, informplena, pensiga revueto, kiu tamen restis amike intima".

Kaj Vera Payne rakontis al mi, ke kiam ŝi estis en San Francisko dum la pasinta jaro, **S-ino Cathy Schulze**, la redaktoro de la Usona Esperanto-Gazeto, speciale laŭdis nian revuon.

Dum la pasintaj du jaroj 3 membroj de la Akademio de Esperanto honoris nin per kontribuoj: La konata Esperanto-jurnalisto **Bernard Golden**, la fama verkisto kaj mondmigranto **Tibor Sekelj** kaj **Prof. D-ro Ivo Lapenna**.

Nia malgranda gazeto havas nun stabon de kapablaj kontribuantoj ĉirkaŭ la terglobo. El Centra Eŭropo skribis por ni **S-ino Elfriede Ernst** (Bruselo). Ŝi verkis artikolojn pri Universala Kongreso kaj pri kongresoj de I.F.E.F. El Bolonga (Italio) ni nun ricevas raportojn de **Norberto Saletti**, redaktoro de "Kontakt". El Japanio, grava Esperantolando en la Pacifiko, regule raportis **S-ro Bun'ichi Isizaki**. **D-ro Arthur Baur**, el Zuerich, Svislando, kontribuis Radio-

Raportojn de Svisa Radio Internacia. **D-ro Karl Beckmann** provizis prelegojn de la Esperanto-elsendoj de Radio Vieno kaj lastatempe **D-ro Antonio de Salvo** de Radio Roma, kontribuis prelegojn de tiu Radio-Studio.

Tiamaniere ni, en la fora Pacifiko, restas en kontakto kun la tuta mondo. Sed tiudirekten provizis interesajn raportojn ankaŭ **S-ro Ralph Harry**, **D-ro Einihovici** kaj **Les Scott**. Nia Prezidanto estas multtalenta Esperantisto. Li ne nur raportis pri la Antverpena Kongreso kaj pri paŝoj de aŭstraliaj organizaĵoj, sed lastatempe kontribuis ankaŭ bonajn recenzojn kaj eĉ poemojn. Recenzojn kontribuis ankaŭ **Prof. Robbie Robertson**, **Ken Linton** kaj **S-ino Fay Koppel**, kiu krome havis la malĝojigan taskon verki — tro ofte — nekrologojn pri mortintaj samideanoj.

Ŝi havas ankaŭ la gravan taskon zorgi pri la lingva nivelo de nia gazeto. Se tamen enŝteliĝis — de tempo al tempo — preseraroj, tio estas ĉefe pro la kaŭzo, ke nek la kompostisto, nek la presisto komprenas Esperanton.

**Arthur Cocking** regule kontribuis artikolojn per sia serio "Who is Who in Australian Esperanto". Li promesis kunlabori estontece. Por nia rubriko "Aŭstralia Kroniko" kontribuis modelajn raportojn **Ray Ross**. Liaj raportoj pri Brisbano kaj la Kvinŝtata Federacio alvenas ĉe mi prespretaj, nete tajpitaj dulinie, kiel la kompostisto tion postulas. **Marjorie Duncan** kaj **Eunice Graham** ĉiam sendas interesajn kaj viglajn raportojn.

Redaktoro povas efike labori nur se la Sekretario kaj la Kasisto de la centra organizo efike kunlaboras. Tiurilate **Marj** kaj **Sam Ellyard** mirinde laboris kaj mi volas danki al ili. Mi nur esperas, mi fakte petegas, ke ili daŭrigu tiun laboron ankaŭ dum la venontaj 2 jaroj. Nian plej koran dankon ankaŭ meritas nia ekspedisto **Jack Fallu**, kiu, kun la helpo de sia **edzino Ivy**, provizis rapidan kaj efikan servon. Ofte li ricevis la novresitajn gazetojn je tagmeze kaj 3 horojn poste la gazetoj jam estis prezentitaj al la poŝta servo. Se foje okazis prokrasto tio estis la rezulto de prokrasto ĉe la presisto aŭ pro striko de roŝtistoj.

Fine, nian dankon meritas **S-ro Ken Linton**, kiu denove sukcesis havigi al

ni senkostajn kliŝojn por ilustrati nian gazeton. Mi nur esperas, ke mi ricevos taŭgajn fotografaĵojn antaŭ ol mi foriros de Kanbero, tiam Ken denove povos helpi.

Jen raporto de via redaktoro. Vi vidas, ke nia malgranda, malforta organizo, per kunlaboro de entuziasmaj idealistoj, produktis sufiĉe bonan landan gazeton.

Daŭrigu same en la estonteco kaj en 2 jaroj mi esperas denove prezenti similan raporton.

—Herbert KOPPEL, Redaktoro

## SAM ELLYARD

Dek Esperantistoj partoprenis en memorservo, la 19-an de Januaro, je Kanbera kremaciejo, honore al nia kara samideano Sam Ellyard, kasisto de AEA, kiu mortis subite post koratako la 16-an de Januaro, tuj post la 24-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, al kiu li multon kontribuis. AEA kaj Manly Esperanto Club sendis florojn.

Samuel William George Ellyard naskiĝis en Yorkshire, Anglio, en 1911. En 1930 li migris al Aŭstralio, kie li fariĝis instruisto, verkisto de lernolibroj pri scienco, kaj fine instruisto de instruistoj en la Kolegio de Altrgrada Edukado en Kanbero, kie li emeritiĝis. Li estis unu el la fondintoj kaj administrantoj de "Questacon", centro kie geknaboj povas lerni pri scienco per eksperimentoj, kiujn ili mem faras. Li tre ŝatis muzikon, super ĉio la muzikon de Mozart, kaj partoprenis en kantado kaj la amatora teatro.

En 1934 Sam edziĝis kun Marjorie, kaj estis kun ŝi ke li fariĝis Esperantisto. Ili kune partoprenis en la AEA Kongreso en Launcestono en 1978, kaj en la Universalaj Kongresoj de Varna kaj Antverpeno en 1978 kaj 1982. Ili ankaŭ vojaĝis en kelkaj Eŭropaj landoj per Esperanto. Ambaŭ aktivis en la Kanbera Esperanto-Klubo, de kiu Sam estis la kasisto ĝis 1982, kiam, post la 23-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, li fariĝis kasisto de AEA. Li estis reĝisoro kaj rolanto en la teatraĵoj "Duobla Agento" kaj "Diplomatia Dilemo", kiuj gajnis la unuan kaj duan lokojn por la Trofeo Koppel en 1982 kaj 1984.

Dum la memorservo Petro Ellyard el Adelajdo, filo de Sam, diris, ke per Esperanto Sam celis la pacon, kaj la

unecon de la mondo. Petro aldonis, ke li mem estas dediĉita Esperantisto kun la samaj celoj.

La filino de Sam legis el la poemo de Tennyson, tre ŝatita de Sam, "Morto de Arturo", kiu inkludas la vortojn:

"La antaŭa moro cedas al la nova,

Kaj la celon Dio trafas multavoje,

Por ke unu bona moro ne koruptu.

Vi konsolu vin, ĉar tion mi ne povas.

Vivon mi travivis; kion do mi faris,  
Dio mem purigu!"

(Traduko de Brendon Clark en "Kien la Poezio") —R.L.H.

## AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Spezokonto 1-12-81 — 30-11-83

### ENSPEZOJ

|                     |           |
|---------------------|-----------|
| Kreditsaldo 1-12-81 | \$8697.95 |
| Kotizoj 1982        | 2722.00   |
| " " 1983            | 3083.50   |
| " " 1984            | 150.00    |

### Transpagoj

|                              |         |
|------------------------------|---------|
| el "A.E." Subtena interezo   | 538.00  |
| el Stipendia interezo        | 200.00  |
| el Matasin/Banham kapitalo   | 1450.00 |
| Profito el Adelajda Kongreso | 2414.00 |
| Ekzamenoj                    | 141.50  |
| Diversaĵoj                   | 9.04    |

### Ricevita por transpago:

|                                |        |
|--------------------------------|--------|
| Por Kongresa Konto             | 45.00  |
| Por Koresp. Servo              | 42.20  |
| Pruntdonacoj el 5 Kvinlandanoj | 500.00 |

### Fondusoj

|                       |         |
|-----------------------|---------|
| Stipendio             | 4164.45 |
| Subtena               | 900.42  |
| Banham                | 48.00   |
| T. Goldsmith          | 40.00   |
| J. Matasin            | 2084.00 |
| Dumviva               | 400.00  |
| Interzo al Ĝen. Konto | 384.58  |

|                       |          |
|-----------------------|----------|
| Totalaj Enspezoj:     | 28014.64 |
| Elspezoj ĝis 30-11-83 | 26622.47 |

Kreditsaldo je 30-11-83 **1392.17**

### ELSPEZOJ:

|                |           |
|----------------|-----------|
| "A.E." Presado | \$4933.76 |
| Afranko        | 616.32    |

|                           |         |
|---------------------------|---------|
| Generala Afranko          | 5550.08 |
| Papero, presado, pakado   | 472.95  |
| Presado de "Sur la Bordo" | 646.69  |
| Presado de "Sur la Bordo" | 1950.00 |
| Libro-servo               | 235.50  |
| Koresponda Servo          | 42.20   |
| Ltado por Ekspozicio      | 24.00   |
| Ligno por bretoj          | 23.84   |
| Insignoj                  | 79.00   |

|                                 |        |
|---------------------------------|--------|
| Abonoj (U.E.A., Monato, A.I.I.) | 279.00 |
| Donacoj (Skoltoj, Somerlernejo) | 306.12 |
| Kongresa Transpago              | 45.00  |
| Stipendio (S. Dorsett)          | 200.00 |
| Malgrandaj Sumoj                | 151.61 |
| Poŝtkestoj kaj Registado        | 127.33 |
| Banko (ĉeklibro, FDT)           | 16.35  |
| Por bilanco                     | 37.99  |

**Investaĵoj:**

|                   |         |
|-------------------|---------|
| El Generala Konto | 6602.00 |
| AE Subten-Fonduso | 906.42  |
| Banham            | 800.00  |
| T. Goldsmith      | 600.00  |
| Stipendio         | 5126.39 |
| Dumviva           | 400.00  |
| Matasin           | 2000.00 |

Totalaj elspezoj .. 26622.47  
(inkl. investaĵojn)

**AKTIVVOJ:**

|  |          |
|--|----------|
| Subtena Fonduso (Com. Sav. Bk.)                                  | 2269.99  |
| Dumviva Fonduso (Statewide B.S.)                                 | 1827.97  |
| Matasin, Banham, Goldsmith kaj ĝenerala investaĵo (Civic P.B.S.) | 10685.69 |
| Stipendia Fonduso (C.B.S.)                                       | 6090.16  |
| Simpkins (Aust. Guar. Corp.)                                     | 1500.00  |

**KORESPONDA SERVO: (J. Moore)**

|          |           |
|----------|-----------|
| Enspezoj | \$2800.46 |
| Elspezoj | 2848.46   |

Deficito .. 48.00

Mono je 30-11-83 .. \$1543.54  
Stoko (je kosto) .. 1740.34

\$3283.88

**LIBRO-SERVO**

|                                     |          |
|-------------------------------------|----------|
| Bonhavo (Eksterlanda Kred.) 30-6-81 | \$288.48 |
| Stokvaloro                          | 8779.07  |
| Pagita sed liverota                 | 723.40   |
| Bankkonto                           | 2263.31  |

\$12054.26

2-jara profito 82/83 .. 1366.44

\$13420.70

|                     |           |
|---------------------|-----------|
| Bankkonto 30-6-1983 | \$2489.31 |
| Kredito eksterlande | 1047.54   |
| Stokvaloro 30-11-83 | 9883.85   |

Bonhavo entute 30-6-83 .. \$13420.70

**AŬSTRALIA NACIA  
ESPERANTO-BIBLIOTEKO****Etato de spezaro je 30-11-83****Enspezoj:**

|                            |         |
|----------------------------|---------|
| Donacoj Melb. Esp. Ko-op   | \$50.00 |
| S-ro H. Koppel (Melb.)     | 25.00   |
| Esp. Fed. de Viktorio      | 100.00  |
| Malvern E-Grupo            | 57.70   |
| S-ino D. Threltall, Perth  | 10.00   |
| Sydney E-Societo           | 53.00   |
| Esp. Fed. de N.S.K.        | 100.00  |
| S-ro I. Poulard            | 8.55    |
| S-ino M. Ellyard, Canberra | 9.50    |
| S-ro R. Harry, Canberra    | 61.00   |
| Kanbera E-Klubo            | 449.60  |
| Interezo 1982              | 5.59    |
| Interezo 1983              | 4.08    |

\$931.02

**Elspezoj:**

|                      |          |
|----------------------|----------|
| Akto-ŝranko          | \$177.80 |
| Librobretoj          | 102.99   |
| Skatoloj por gazetoj | 208.35   |
| Transporto           | 75.60    |
| Bindado de Gazetoj   | 274.00   |
| Fotokopioj           | 5.00     |
| Abono "Kontakto"     | 18.00    |
| Poŝtkostoj           | 17.90    |
| Libro-servo          | 6.95     |

\$886.59

Saldo en C.S.B. .. 44.43

\$931.02

**24th AUSTRALIAN ESPERANTO  
CONGRESS****Late Supplementary List:**

104. Mary Myers, Sydney.
105. Gerald Tumman, Melbourne.
106. Ruth Tumman, Melbourne
107. Sandra Connors, Toowoomba
108. Galina Sliwa, Perth
109. Cathy Sullivan, Brisbane
110. Blair Silverlock, Perth
111. Harry Torr, Canberra
112. Joyce Torr, Canberra
113. Jacqueline Walker, Perth
114. Astor Eidem, Melbourne
115. Shirley Gradussov, Perth
116. Chloe Cedro, Sydney
117. Gail Tregear, Canberra
118. Peter Hai, Canberra
119. Pat Le Fevre, Launceston
120. Pam Francis, Melbourne
121. Betty Hart, Sydney
122. Eric Hart, Sydney

123. Shirley Fanos, Sydney  
 124. Kam Lee, Hobart  
 125. Richard Harris, Hobart  
 126. S-ino V. Lidstrom, Finland  
 127. Prof. Dr. C. J. Adcock, N.Z.  
 Final State Distribution: NSW 46;  
 Vic. 25, Q'ld. 20; W.A. 12; A.C.T. 10;  
 Tas. 4; S.A. 3; N.T. 1; Japan 2; Eng-  
 land 1; Finland 1; New Zealand 1;  
 USA 1.

## LA APUDMARA RENKONTIGO

Manly, 15-20 Jan., 1984.

Kiel kutime en antaŭaj jaroj, la Manly-grupo ankaŭ ĉijare organizis Post-kongreson. Dimanĉe (15/1) dek aŭtomobiloj transportis kongresanojn de Kanbero al Manly. Malfelice la vetero ne estis bela, ĉar pluvus preskaŭ dum la tuta vojaĝo.

Felice la pluvo ĉesis vespere kiam proksimume 20 vizitantoj kaj 30 Manlianoj ĝuis bonan vespermanĝon en la "People's Palace" de Manly. Oni havis la agrablan plezuron gratuli al S-ino Schriener pro ŝia 85-a naskiĝtago.

La sekvontan tagon, post ĝuinda vespermanĝo, okazis la "Bonveniga Vespere". Ĉiuj eksterlandanoj ricevis florojn. Myrtle Straker kaj Malcolm Ross "instruis" al ni kiamaniere kuiri kokidon kaj Helen Stone kaj Margaret McLelland prezentis skeĉon.

Marde (17/1) kvardek kvin esperantistoj vizitis la belegan hejmon de Keith kaj Judith Hanna en rava West Pymble. Survoje la grupo paŭzis ĉe la bela Baha'i Templo kaj ĝuis la solenan etoson de tiu bela loko. Ges-roj Hanna regalas nin per bongusta manĝo en sia belega ĝardeno. Entreprenema Juli Issobe eĉ plonĝis en la grandan naĝbasenon.

Samvespere okazis "Teatra Vespere". Manlianoj prezentis skeĉon "Apartamento por si mem", verkitan de Margaret Liston. Robbie Robertson, Eunice Graham kaj Arthur Cocking prezentis alian skeĉon. "Malsana Edzo" estis la titolo de bonege prezentita skeĉo fare de Shirley Fanos, Helen Stone kaj Kitty Gassner.

Pertanoj Vera Payne kaj Jack Hawks transdonis du bumerangojn al S-ino kaj F-ino Issobe, kun la deziro ke ili revenu post 2 jaroj al la kongreso en Perto.

Je la fino de tiu ĝuinda tago ĉeestantoj ricevis la malĝojigan novaĵon, ke sammatene nia kara Sam Ellyard mortis en Kanbero.

Ĉar S-ino kaj F-ino Issobe devis re-flugi al Tokio Skabeno David Hay kaj du aliaj urbaj eminentuloj bonvenigis ilin merkrede (18/1) en urbestra salono. Vespere esperantistoj plenigis la ĉiam gastaman domon de Les kaj Bess Scott.

Jaŭde (19/1) okazis lunĉo en la hejmo de Marjorie Duncan. Je la 3-a posttagmeze okazis oficiala akcepto de 50 esperantistoj en la urbdomo de Manly. Urbestro David Hay, lia edzino kaj tri skabenoj regalas la vizitantojn kaj bonvenigis la gastojn al la urbo Manly. Kaportisto kaj fotografisto de la loka "Manly Daily" ĉeestis kaj kelkajn tagojn poste aperis bona artikolo en tiu gazeto.

Ray Ross gvidis la "Varietean Vespere" (19/1). Anni Spencer solkantis, Margaret Liston monologis, D-ro Einihoviĉi prezentis rakonton, Herbert Koppel deklamis poemojn kaj Manlianoj prezentis skeĉon de Helen Stone "Neĝulino kaj la 7 etuloj".

Vendrede (20/1) okazis vizito al la Art-Galerio, kie Jonathan Cooper de-joras kaj gvidis la vizitantojn tra la Galerio, klarigante en bona Esperanto la rolon de "Arto en la Socio". Poste kelkaj vizitantoj iris al la renovigita Esperanto-Domo en Redfern.

Samvespere okazis la "Familia Vespere", kiun ĉeestis 60 geesperantistoj. La plej elstara ero en la programo estis la "Carol Maddox Danc-Grupo", kiu prezentis naciajn dancojn el multaj landoj en vere kolorplena spektaklo. Ray Ross dankiĝ al Keith kaj Judith Hanna, pro provizado de manĝoj kaj faris donacon al ili. Same, Shirley Gradussov, nome de la vizitantoj, donacis al Marjorie Duncan la libron "Sur la Bordo".

**AŬSTRALIA=  
=KRONIKO**

Pro la longaj kongresraportoj ni devas prokrasti klubajn raportojn ĝis nia venonta numero.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 213 (293)

MELBOURNE

Marto, 1984

---

## 3-A PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO

14-19 julio, 1984, Portland, Oregon, Usono.

Survoje al la 69-a Universala Kongreso venu al Usono kaj partoprenu en la 3-a Pacifika Kongreso, kiu okazos en la bela Universitato de Portland.

### ● Provizora Programo:

Sabate, 14/7: Interkona Vespero

Dimanĉe 15/7: Ekskursoj

Lunde, 16/7: Solena Malfermo,

Publika Vespero,

Marde, 17/7: Aferkunsidoj, Bankedo

Merkrede, 18/7: Aferkunsidoj,

Jaz-Koncerto

Ĵaŭde, 10/7: Ferma Kunsido

Vendrede, 20/7: Veturi al Vankuvero

(Kanado)

● **Kosto** \$210 (usonaj)—inkluzivo de la jenon.

Transporto de la flughaveno

Loĝado de sabato ĝis inkl. merkredo  
en dupersona ĉambro.

(unupersona ĉambro \$25 ekstra)

Mangoj de sabata vespero ĝis inkl.

Ĵaŭda mateno

Kotizo, ekskurso, bankedo

Ekstra pago por transporto al la flughaveno, loĝado post merkreda nokto, mangoj post la ĵaŭda mateno.

Sendu vian aliĝon al:

**Jim Deer**

**11905 SW Settler Way**

**Beverton, OR 97005, USA**

La aliĝkotizo validas ĝis 15-a de junio.  
Poste aldonu 10%

---

## ESPERANTO EXHIBITIONS

Esperanto clubs throughout Australia are invited to borrow a ready-made Esperanto Exhibition. The material is already mounted on cardboard panels, appr. 50 cm wide x 95 cm deep, which

can be packed for despatch by train or bus to anywhere in Australia. Headings are supplied, and a sketch of the suggested layout.

Intending borrowers will be required to arrange a suitable location — in a Public Library or a Shopping Centre —

---

which has exhibition stands available. Bookings will need to be made at least one month in advance, and to avoid duplication, alternative dates should be supplied.

Further information: Ges-roj Tumman, 124 Croydon Road, Croydon, Vic., 3136 (Phone 723-1879).

### NUR DUBE-BONA BIERO \*

Iuj, oni diras, naskiĝas grandaj, iuj atingas grandecon, kaj aliaj trude ricevas grandecon. Mi memvidente apartenas al la tria grupo. Per unu malgranda artikolo en "The Australian Esperantist" mi eksciis ne nur ke mi estas "ĉiel-bona", sed ankaŭ ke mi estas 'klera'. Ĉu vere!

Ni komencu per la nomo 'Goodall', kiun mi iam havis. Jam antaŭ jaroj mi serĉis en kelkaj libroj pri nomoj kaj informiĝis, ke tiu nomo origine estis 'Goodale', kaj ke bedaŭrinde tiu frua pra-paŭvo, kiu unue ricevis ĝin, ne estis homo 'ĉielbona' sed simple ulo kiu aŭ faris aŭ vendis bonan elon (almenaŭ laŭ la propra takso). Do, oni akceptu la averton: ne juĝu laŭ ŝajno!

Kaj pri tiu stranga epiteto 'klera'? Flata, sed nepra fantaziaĵo.

Nu, kiu evidenta manko de entuziasmo oni decidis aljuĝi al mi la Premion John Buchanan por 1983. (Verŝajne estis nur unu alia kandidato). Oni atentigis min, ke laŭ la regularo mi devas 'ene de unu jaro post la aljuĝo . . . iri eksterlanden por ĉeesti universalan kongreson, aŭ nacian kongreson . . ." Jam en Aprilo-Majo 1983 ni vizitis Eŭropon, do certe ne eblas iri ankaŭ al Vankuvero. Mi dubas pri la ebleco starigi internacian kongreson ĉe Rottnest ("transmare") en la venonta jarduono, sed prefere ol resendi la monon, kial ne aĉeti librojn por kiuj, cetere, mankas spaco en mia domo? Kaj kompreneble mi volis atentigi pri tio, ke nur bona kaj bela libro-kolekto povas efike informadi pri Esperanto en la Universitato Murdoch.

Antaŭ multaj jaroj tiu sama raportinto nomis min kongresa 'heroino' pro tio ke mi preparis ekspozicion de infanaj artaĵoj por AEA-kongreso en Perto. Fakte estis Wre Chandler kiu faris la tre grandan organizan laboron kaj poste pruntis al ni la jam pretajn ekspoziciaĵojn. Tre saĝe mi lastamamente mal-

aperis en kuracejoj kaj lasis al aliaj la ĝene katenan taskon prizorgi la aferon. Sed oni permesis al mi ĉeesti la solenan malfermon de la ekspozicio. Mi ja ne estis tre malsana. Fakte mi bone memoras flegistinon kiu malŝate rigardis min kaj diriĝis "Bonvolu iri hejmen! Mi volas flegi malsanulojn, ne sanulojn!"

La veraj hero(in)oj, la veraj bonuloj, ne estas tiuj kiuj unufoje en la vivo donacas kelkajn sufiĉe facile akiritajn dolarojn, sed tiuj kiuj senpage (kaj ofte sendanke) fideladas, jaron post jaro en taskoj kiel sekretario, aŭ kasisto, aŭ libro-peranto, aŭ redaktanto, aŭ kurs-vidanto. Mi scias, ĉar ankaŭ mi provis unu-du el tiuj taskoj, sed nur dum mallonga tempo kaj kun tiel preterordinara nekompetento ke (feliĉe) oni eĉ ne volis ke mi daŭrigu.

—RUTH McGRATH.

(\* Vidu "A.E." Nov, 1983, paĝo 206: "Aŭstralia Esperantistino gajnis la Premion 'John Buchanan'".)

### Ĉu "-uj" aŭ "-i" ?

Ni estas bonŝancaj, ke Zamenhof tiom bone ellaboris sian Esperanton, ke ni hodiaŭ povas uzi ĝin sen grandaj malfacilaĵoj ĉie en la mondo. Eĉ teknikaj problemoj estas pritraktataj.

Kvankam Esperanto estas tre regula, restas unu malregula afero en nia lingvo, pri Kiu Zamenhof ne sufiĉe pensis, tio estas la landnomoj. Li ordigis la landnomojn uzante la sufikson "uj", tiel ke la francoj vivas en la lando kiu enhavas la genton de la francoj, do Francujo Tio validas por kelkaj landoj, sed ne estas aplikebla por ĉiuj.

En 1911 Zamenhof mem konsciiĝis pri tiu problemoj kaj skribis en lingva respondo, ke ekzistas tri eŭropaj landoj, por kiuj la sufikso "uj" estas ne tute logika, Aŭstrujo, Belgujo kaj Svisujo. Li rekomendis uzi Aŭstrio, Belgio kaj Svisio. Aŭstrio siatempe enhavis Hungaron kaj partojn de Ĉeĥoslovakio. Tamen, post la unua mondmilito oni devis ŝanĝi al Aŭstrujo, ĉar Hungario kaj Ĉeĥoslovakio, fariĝis memstaraj respublikoj. La UEA-anoj ankoraŭ hodiaŭ uzas Belgujo tute malprave, ĉar en Belgio vivas du gentoj, la Valonoj kaj la Flamoj Svisujo intertempe fariĝis Svislando ĉe UEA. Sed UEA havas pli de tiaj ŝanĝoj parte

nelogikaj. Kvankam Zamenhof rekomendis uzi "Brazilio" por la lando, oni neniam faris tion kaj devis reverŝi la naturan ordon kaj diras Brazilo por la lando kaj Brazilio por la ĉefurbo. Tiu nelogika uzo de la nomoj supozeble okazis pro la skribmaniero en Brazilio, la urbo nomiĝas Brasilia, proponcanta Brazilja kaj en la oficejo de UEA oni supozeble ne sciis tion. Sed foje malĝuste uzinte oni ne povas konfesi sian nescion kaj daŭrigis la nelogikan uzon.

Kvankam la ĉinoj eldonas la bonan gazeton "El Popola Ĉinio" UEA ankoraŭ parolas pri Ĉinujo, tute malprave, ĉar en Ĉinio ja ekzistas diversaj gentoj, kiuj havas siajn proprajn lingvojn.

En antaŭaj jarlibroj de UEA mi trovis la nomon "Suomio" aldonita al Finnlando. Suomio estas la preferata nomo de la finnoj mem, sed nun oni forlasis tion kaj ree uzas nur "Finnlandon". Grekujo estas ŝanĝita al Greklando, supozeble oni nun ankaŭ devus diri greklandano anstataŭ greko. Hindujo fariĝis Hinda Unio, ĉu oni konsciiĝis, ke en Hindio oni parolas eble centon da diversaj lingvoj, kiuj estas tiom diferencaj ke la angla lingvo por la hindoj estas sama kiel Esperanto por ni? Koreujo fariĝis Korea Respubliko kvankam la koreanoj uzas Koreio. Meksiko nun fariĝis Meksikio, kio lasas la nomon Meksiko por la urbo. Madagaskaro nun estas Malagasa D. R. (supozeble Malagasa Demokratia Respubliko).

Ce SAT la afero aspektas iom pli bone, ĉar la SAT-anoj ŝanĝis "uj" al "i" kaj akiris per tio pli plaĉajn kaj pli internaciajn formojn. Sed ankaŭ ĉe SAT estas kelkaj ŝanĝoj. Sovetio kaj Sovet-Unio ambaŭ estas uzataj.

En 1973 la SAT-kongreso okazis en Kanadio, kaj dum la kongreso okazis parolado, ke oni uzu la nomon Kanado anstataŭ Kanadio, ĉar tio estas la landa nomo. Tiu rezonado ne estas logika, ĉar tiam la francoj povus diri, ke ilia lando estu nomata Franco ĉar la nomo jam estas tiel, la norvegoj povus postuli la nomon Norgo, la svedoj la nomon Sverigo ktp. Sed SAT ŝanĝis laŭ la deziro de la "kanadoj", nun mi estas devigata diri kanadanoj. Dum UEA uzas Israelo, SAT uzas Izraelio, ne nur la finaĵo estas alia sed ankaŭ la dua litero kaj mi ne scias, kiu pravus.

Tamen Zamenhof ne volis ŝanĝi de Svisujo al Svisio en la permeso de la Akademio. Kvankam la Akademio antaŭ kelkaj jaroj decidis permesi la uzon de "i" por landnomoj. UEA ne ŝanĝis al

tiu pli facila uzo de "i". Kaj la Akademio ja bezonis pli ol kvindek jarojn por oficiale permesi la finaĵon "i". Se la SAT-anoj ne propravole estus uzintaj tiun finaĵon, la Akademio eble bezonus aliajn cent jarojn por pripensi. La Akademio ŝajne ĝis nun nur okupiĝis pri jam faritaj ŝanĝoj. Nun ili havas okazon ordigi la uzon de la landnomoj, ĉar post la dua mondmilito diversaj landoj fariĝis memstaraj kaj uzas aliajn ol la kutimajn nomojn. Ni bezonas klarajn instrukciojn de la Akademio kiel formi novajn landnomojn kiuj ne bezonos esti ŝanĝitaj pro cirkonstancoj kiujn ni ankoraŭ ne povas antaŭvidi kaj ankaŭ la malnovaj landnomoj devas alkonformiĝi, Ni havas du eblecojn, unu estas trakti la landnomojn kiel proprajn nomojn, sed tiam la kaoso pligrandiĝus, la alia estas uniforme formata formo de landnomoj. Mi preferas la duan. —Volo.

## ANALOJ DE 1983 de Rolo

Ĉi tiuj ŝercaj analoj nomiĝas "ŝvarcaj" analoj honore al Raymond Schwartz, la iniciinto de tiaj analoj.

Estas ĉiam malfacile elekti, tuj post la fino de jaro, la ĉefajn, signifoplenajn eventojn. Tamen ŝajnas al mi, ke ni rememoros la jaron 1983, super ĉio, pro la komunikaĵoj kaj la sportoj. Laŭ ordono de UN oni zorge priantis la komunikaĵojn, kaj sen ordono de iu ajn oni praktikis diversajn sportojn.

Ni komencu per la superŝtatoj.

En Usono la Prezidanto, Ronaldo Reganto denove havis rolon konforme kun **histriono** . . . mi intencis diri en la historio. Li sekvis la konsilon de la Esperanta proverbo, ke eĉ G.I. malgranda, konstante frapante traboras marbordon grenadan! Malsimile al alia granda potenco, kiu eniris malgrandan landon, la Usonanoj ne riskis trovi, post regado, la personojn, kiuj invitis ilin. Ne, la usonanoj marinitaj kunportis siajn proprajn gastigantojn! Kontraŭe al la komunikaĵoj de la ĵurnaloj la celo de la marinitoj en grenadilo ne estis batali kontraŭ la grenadistoj, sed nur ludi vetludon per ĵeto aŭ forĵeto de kubo. Tiu ludo nomiĝas en Usono krapludo, ne ĉar oni ludas ĝin anagramatike en parko, sed pro alia kialo. La plej histriona tago estis kiam la Prezidanto komunikis, ke la kubo estas el'etoj.

Ni menciuj, ke, en aliaj sportoj, la usonanoj ne tre bone sukcesis. Bando de ferocaj aŭstralianoj (mallonge

"aŭsanoj") el Perto, organizis dramecan atakon kontraŭ riĉula klubo en Nov-Jorko. Dum la **bonda** ĉefo kaj parto de la **bonduloj** maskeradis en Nov-Haveno kiel pacaj velantoj, la aliaj ŝtelis el la Jakta Klubo de Nov-Jorko valoran pekulon, nomitan "La Pekulo de Ameriko". Kiam ili reiris al sia kaŝejo sur la marbordo de Okcident-Aŭstralio, oni akceptis ilin per paperrubandoj el la . . . . ., simboloj de la fakto, ke la piratoj sukcesis ĉefe pro sia bonega **komuna kilo!**

Rilate alian pekulon la supersatanoj ankaŭ ne sukcesis — la pekulon Davis. Tiu pekulo apartenas al la venkinto en teniso. La Usonanoj malsukcesis ĉefe pro la fakto, ke la sveltaj ŝvedoj kaj la elstaraj aŭsanoj kunvenis en la finalo: denove la aŭsa bando sur sia propra patruja tenisejo en Melburno, triumfis.

La alia superpotenco ankaŭ ne havis tre sukcesan jaron. La **ursanoj** ankoraŭ ne trovis la personon, kiu invitis ilin eniri Afganistanon! Kaj ankaŭ ili perdis sian ĉefon Andropov-on. Dum multaj "Monatoj" aperis, li tute ne videblis, eĉ en la Urĝa Placo. Pro tio la ĉefa sporto de la diplomatoj en Moskvo dum la dua parto de la jaro estis trovi **vaporon, do je povorando!** La mistero estis kial oni ne eldonis komunikadon se Andropovo restis renato.

En Germanio ankaŭ oni havis problemojn rilate perdadon kaj trovadon. La Ĵurnalo "VERDA STELO" aĉetis kaj eldonis la perditajn taglibrojn de la Diktatoro Hitler. Poste ĝi trovis, ke oni ne povas perdi librojn, kiuj neniam ekzistis, same kiel oni ne povas fermi kongreson, kiun oni neniam malfermis! Sed tio ne malkuraĝigis la germanajn verdulojn. Ili batalis kaj balotis kaj fine sukcesis gajni kelkajn seĝojn en unu **bunta tago**, por bati kolon, tio estas la **helmintan kolon**.

En Britio la balotado ne rezultigis gravajn ŝanĝojn en la konservativa Taĉmenso. Dum la ĉefministro defendis sian platan formon, la Reĝino pasigis sian tempon ĉefe en Usono kie okazis grandaj inundoj kaj en Hindio, kiel simbola kapo de la komunikumo, aŭ komunika'aro. La ŝtatestroj de la komunikaro, komune kun la ĉefministroj, lernis en Hindio novan sporton. Dum la fama "retreto" (kiam oni ne piedbatas denove la vinberojn sed nur ĝuas neformalan semajnfino) la ĉefoj iris por ludadi je **Go-o!** Tio estas nombroludo

en kiu rolas 181 nigruloj kaj 180 blankuloj!

En Cipro oni eldonis en Novembro kurtan, aŭ anagramatike turkan, komunikadon. Oni anoncis, ke la nordcipranoj ekzercis memdecidon, kaj tiel fariĝis turkoj-cipranoj sendependaj. Pro tio la aŭstraliaj policanoj kiuj dum multaj jaroj ĝuis libertempojn en Cipro en la Klubo Mediteranea, kaj okaze kun bluaj kaskoj gardis la barelojn, perdis la ŝancon lerni kio okazas kiam greko renkontas grekon. Antaŭ nur kelkaj jaroj la celo de la grekoj pri cipro estis ke ĝi fariĝu **inoza**, sed post kelkaj jaroj evidentiĝis, ke **inuza** ne estas bona politiko.

En Libano la Israelanoj serĉis ombron sub la cedroj, sed ili sukcesis nur suĉi la cedratojn kaj intermiksi kun la siringoj. La Usonanoj, francoj kaj italaj ankaŭ serĉis liberan amon per la cedoj sed trovis nur drozerojn kaj falangojn. En Libano la ĉefa sporto por ĉiuj estis la POLOO. Post streĉaj bataloj la palestina teamo suferis **aran faton**, kaj devis eliri el la tripoloo konkurso!

(Daŭrigota.)

## K O R E K T O

En la kongresa raporto okazis eraro en la kompostajo. Jen la korekta teksto:

**S.A.T.** Nur tre malmultaj ĉeestis tiun kunvenon. **S.A.T.**-Peranto Volo Gueltling klarigis la celon de **S.A.T.** kaj petis membrojn pagi la kotizon. Se vi ne povis ĉeesti la kunvenon, bonvole sendu la kotizon al Volo Gueltling, 9/45 Alt Street, Ashfield, NSW, 2131. La jara kotizo estas \$23.00 (membrecio kun gazeto "Sennaciulo"). Se vi deziras ricevi ankaŭ la "Sennaciecan Revuon", bv. aldonu \$4.50.

**Kunsido de Veteranoj** okazis dum la Kanbera kongreso. Ĉeestis 11 personoj. Kelkaj veteranoj ne povis ĉeesti ĉar okazis samtempe kunsidoj de SAT kaj PAPIE. Ne sendis salutojn al D-ro Caldera kaj Norman Collier, la Dojenon kaj Vic-Dojenon de Esperanto en Aŭstralio.

Ni diskutis kiamaniere la veteranoj povos helpi la Movadon en nia lando, kaj decidis: 1-e. Ĉiam porti la Verdajn Stelon; 2-e: propagandi kie kaj kiam ajn; 3-e: aktiviĝi kiel eble en la kluboj kaj societoj.

Nia rezolucio: "Esperanto estas nia



heredaĵo, ni transdonu ĝin al niaj heredantoj kiel vivantan lingvon.”

— Wre. CHANDLER.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH.** En la Jarkunveno (7-12-84) la jena estraro elektigis: prezidanto, Rene Smeets; vic-prezidanto, Vera Payne; sekretario-redaktoro, Chris Dean; kasisto, Owen Loneragan; informado, Idyss Einihovici; biblioteko, Dolly Dean.

Ni festis la Zamenhofan Tagon je 15/12 en la mem-serva restoracio de Nedlands College of Advanced Education. Malgraŭ varmega vetero ĉeestis 56 esperantistoj kaj gastoj, inter kiuj estis vizitanto Sino Ludmila Deskalova el Bulgario, kaj S-ino Renata Stepien, nun loĝanta en Esperanto Way, kiu antaŭ ol migri Aŭstralian instruis Esperanton en la Universitato de Bydgoszcz, Pollando. Festparoladis Vera Payne, omaĝe al Zamenhof. Por ne-esperantistaj ĉeestantoj Jacquie Walker prezentis anglalingve informan paroladeton. Interalie okazis teatraĵeto, aŭkcio - kaj honorigo. Pro elstaraj kaj longtempaj servoj al la Ligo kaj al la idealoj de Esperanto prezidanto Rene Smeets prezentis atenton pri Dumviva Aneco al la sindonemaj geedzoj Chris kaj Dolly Dean. La honorigo bele surprizis la ricevintojn. Ĉiuj aliaj fervore ovacis.

Nur kelkajn tagojn post tiu ĝuinda evento, estis granda ŝoko sciigi pri la subita morto de la ĉambona humora kaj amikca Sro Gino Gobba kiu, kiel kutime, bele muzikis por ni per sia akordeono dum la Festo kaj ŝajnis tute bona.

Ĉeestis 18 personoj en la kunveno 8-2-84 Jack Hawks mallonge raportis pri la kongreso en Canberra kaj la prezidanto invitis sugestojn pri la venonta kongreso en Perth. Oni ankaŭ diskutis programojn por klubkunvenoj. Vera Payne verve — kaj sukcese! — pledis por individuaj aliĝoj al AEA.

Denove estis 18 personoj en la kunveno 22/2, sed ne tute la samaj! Okazis la konstantaj eroj — vigligaj demandoj de Jack Hawks kaj novaĵoj el la E-gazetaro de Dro Einihovici. S-ino Eini-

hovici prelegetis pri esperantista vizito al Ĉinio al kiu ŝi partoprenis. Jack Hawks montris diapozitivajn pri Canberra kaj Manly. Vera Payne raportis pri sukcesa komenciĝo de trijara E-kurso por instruistoj kaj aliaj kiun ŝi gvidas ĉe Mount Lawley College of Advanced Education. Bedaŭrinde la vespera kurso ĉe Subiaco nuligiĝis pro nesufiĉa subteno, tamen Rene Smeets instruas kelkajn aliĝintojn en sia hejmo.

Elstaran eron prezentis Chris Dean en la kunveno 14/3. Temis pri la nun forvelkinta planlingvo Ido kaj li ilustris ĝin per interesa serio da poŝtkartoj skribitaj en tiu lingvo, kiun ricevis sinjoro en Kalgoolie. La nun maljuna filo de la ricevinto de la kartoj donacis ilin al la Ligo.

Lastatempe en la ĵurnalo "The West Australian" aperis kelkaj informoj pri Esperanto. En decembro pasintjare estis raporto, kun granda foto, pri Esperanto Way. Poste estis raporteto pri la sukceso en la kongresa dramo-konkurso. Sekvis artikolo pri la kurso ĉe Mount Lawley, kaj estis tre bona letero de akademiano Donald Broadribb.

Kun granda bedaŭro ni raportas pri lastatempa malsaneco de Chris kaj Dolly Dean. Post operacio Chris grade plifortiĝas, sed Dolly ankoraŭ grave malsanas.

—R.McG.

● **ADELAJDO:** Nia Zamenhof-Festo okazis je 10-a dec., 1983. Partoprenis 22 personoj, kiuj manĝis, trinkis kaj kantadis. Mavis Elliott kaj Peter Ellyard deklamis poemojn. Audrey, Peter kaj mi partoprenis en skeĉoj. George Clarke tre bone agis kiel aŭkciulo kaj vendis multajn malnovajn librojn kaj gazetojn kaj bonvena monsumo eniris la kason de nia societo. Neill Hart gvidis la komunan kantadon. Entute bonega vespero, kiun ĉiuj ĝuis.

La ĝenerala kunveno okazis je 6-a de marto, 1984. Bob Felby raportis pri la jaro 1983. Ĉeestantoj decidis donaci \$25 al la Nacia E-Biblioteko en Kanbero, memore al Sam Ellyard. Ni decidis, ke kotizoj restu kiel antaŭe, t.e. \$10 kaj \$5 por familianoj kaj senlaboruloj. Lloyd Noble, nia nova membro, proponis presin nian bultenon "Tamen Plu". Tio ŝparus al ni multe da mono.

Elektiĝis la jena estraro: Prez: George Clarke, Kasisto: Beryl Randles, asistanto Neill Hart, Sekretario kaj Bibliotekisto:

Bob Felby, Libroperanto; Audrey Felby.  
—BOB FELBY.

● **LAUNCESTON, TAS.:** London, la 27-an de februaro okazis Esperantista festo por adiaŭi Zenon Pasieczny, kiu translokiĝas al Bowen sur la 'Whitsunday'—marbordo de Kvinslando. Zenon estas juna ĵurnalisto, kiu laboris dum 2-3 jaroj ĉe la tagĵurnalo "Mercury" en Tasmanio. Nur antaŭ nelonge Zenon amikiĝis kun la Launcestona Esperanto-Grupo, sed li rapide helpis kaj skribis artikolon en la "Mercury" bone menciante pri Esperanto.

Ĉe Bowen Zenon estos raportisto ĉe "The Northern Leader". Ŝajnas, ke estas bona oportuno por tieaj Esperantistoj havi bonan kaj valoran amikon, kiu helpas propagandi nian lingvon.

—MAC LE FEVRE.

● **MELBURNO:** Kvardek du esperantistoj kaj amikoj (lastjare 35) partoprenis en la Zamenhof-Festo, kiu okazis je sabato, 10-a de decembro, 1983, en la halo de la skoltinoj. S-ino kaj F-ino Sanders komencis la programon per piano-duetoj. La prezentisto de la vespero estis S-ino Fay Koppel, kiu memorigis la ĉeestantojn pri la mortintoj de 1983: S-roj Robert Reed, N. Butkunas, L. Toth kaj Ilja Grahovac, iama Melbourne membro, kiu mortis en Sidnejo.

F-ino Isabel Gale bele ludis la stilonon, la Waverley-grupo prezentis kantojn kaj membroj de la Oakleigh-grupo legis kelkajn rakontojn kaj skeĉojn. La Malvern-grupo ludis skeĉon "Mi fariĝis ordemulo".

Detalan "Revuon 1983" donis Gerald Tumman kaj la fest-paroladon faris S-ro Herbert Koppel, kiu parolis pri la "Helpantoj de Zamenhof".

Bonvena gasto ĉe nia kunveno de 6-a de februaro, 1984, estis D-ro Piero Bracchi el Livorno (Italio), kiu venis al Melbourne por viziti parencojn. La parolanto de la vespero estis Harry Beechey, kiu parolis "Plue pri la Vitaminoj". Semajnon poste membroj rakontis pri siaj ferioj.

La Jarkunveno okazis je 20-a de februaro. Nur 4 membroj ĉeestis. La kasisto (Errol Chick) raportis bonvenan pluson por 1983 de \$112.68 (\$37 pli ol en

1982). La sekretario (Herbert Koppel) raportis, ke en 1983 la societo havis 32 membrojn 3 lernantojn (1982: 32 membrojn). La estraro por 1984 estas: Prez: S. Kanaĉki; Vic-Prez: Harry Beechey; Sekretario: Herbert Koppel; Kasisto: Errol Chick; Bibliotekisto: Fay Koppel; Kaskontrolisto; Ken Linton.

Okaze de la amuzvespero je 27-a de februaro, S-ro S. Kanaĉki montris diapozitivojn kaj parolis pri la Kanbera Kongreso.

● **KANBERO:** La jarkunveno, 6-an de februaro, elektis la sekvantajn oficistojn por 1984: Prezidanto: Ralph Harry; Sekretario: Marj. Ellyard; Kasisto/Bibliotekisto; Katherine Lewis; Vic-Prezidantoj: Patti Anson, Brenda Birkett. La Klubo decidis daŭrigi sian kontakton kun la Aŭstralia Instituto de Internaciaj Aferoj kaj kunvenas ĉiun lundon (ardon post publikaj ferioj) je la 7.30-a p.t.m.

● **MANLY:** La 23-an de januaro klubanoj ĉeestis la Jarkunvenon en la hejmo de Marjorie Duncan. Elektiĝis Robby Robertson kiel Prezidanto, Frank Preacher kaj Eunice Graham, vic-prezidantoj, Betty Cleminson, sekretario, Frank Mangan, kasisto kaj Helen Stone, libroagento.

La 7-an de februaro komenciĝis la unua trimestro en la Eduka Centro. Marjorie instruas la komencantojn.

—EUNICE GRAHAM.

● **SIDNEJO:** Jen la nova estraro de la Sidneja E-Societo: Prezidanto sekretario kaj AEA-Raportisto: M. Chaldecott; Vic-Prezidantoj: Sylvia Burkitt, David Gould; Kasisto: David Gould; Bibliotekisto: James Harwood; Kaskontrolistoj: Mavis kaj Tom Elliott.

Ĉe la "Wesley Central Mission" novaj klasoj komenciĝis la 5-an de februaro; gvidantoj estas Myrtle Straker (4-7 komencantoj); Sylvia Burkett (4-5 progresantoj). Robbie Robertson kaj Marjorie Duncan estas la plej altgradajn grupojn.

Je 20-a de februaro Volo Gueltling parolis pri KURIOZAJOJ — tre kurioza estas la fakto, ke li nun vivas; dum li estis juna multfoje necesis ke iu savu lin — ĉefe la patrino — sed ŝajnas ankaŭ ke li havis sian propran "anĝelon", kiu prizorgis lin.

Semajnon poste la programo estis "Kunportu 3 bildojn". James Harwood montris bildojn de tri veturiloj, kiuj gravis por li; unu estis biciklo, kiu kostis £15 kaj, se oni kalkulas tiun sumon kontraŭ la semajna salajro, kaj la nuntempa salajro, la kosto estus pli ol £1000. Inter la diapozitivaj de Volo Gueltling estis birdo tiel stranga, ke ni dubis ĉu ĝi estis vera. La Marabuo staris sola en la Hamburga bestĝardeno. Margaret Chaldecott havis kutiman mikspoton da diapozitivaj, inter ili estis vidaĵo trans rivero je sunsubiro kaj samloke sunleviĝo.

Je 5-a de marto ni laboris pri diversaj libroj kaj ĵurnaloj ricevataj por nia biblioteko. Semajnon poste ni ludis Mozaikon kaj decidis, ke estus pli bone forĵeti la tablon kaj ludi sur la planko.

—M. CHALDECOTT.

● **BRISBANO:** La Societo kunvenis la 31-an de januaro por diskuti kaj aranĝi aferojn dum 1984. Samtempe la Prez. Ray Ross raportis pri la plensukcesa kongreso en Kanbero kaj pri kontentiga progreso rilate la Universalan Kongreson en 1988. La 6-an de februaro kvar klasoj komenciĝis jene: Literatura Grupo (gvidas Trevor Steele); Diskut-Grupo (Tom O'Grady); Post-Komencanta Grupo (Annie Spencer); Komencantoj (Ray Ross).

La Konversacia Rondo denove okazas, vice en la hejmo de anoj kaj estis plezuro bonvenigi Jennifer kaj Jim Dimo, kiuj intencas viziti Brisbanon ĉiun duan semajnfinojn.

Kvinslandanoj ege bedaŭras la perdon de amiko, Sam Ellyard, samtempe gratulas al la nemultaj anoj de la Kanbera Grupo, kiuj tiel multe laboris por la plensukcesa AEA-Kongreso en 1984; kaj al la anoj de Manly pro la sukcesega Post-Kongreso en tiu bela loko.

—RAY ROSS.

● **ST. LUCIA:** La grupo kunvenas ĉiun merkredon en la hejmo de Winsome Greenhalgh. La membroj jam aranĝis la venontan Konferencon de la Kvinslanda Federacio je 31-a de marto kaj 1-a de aprilo.

● **TOOWOOMBA:** Membroj starigis budon ĉe la "Hobbies & Crafts Exhibition" (17-19 feb) en la Toowoomba Ekspoziciejo. La Konversacia Rondo

kunvenas en la hejmo de Jean Lehane ĉiun unuan lundon en la monato, la monata kunveno okazas ĉiun trian lundon kaj la legada rondo kunvenas ĉiun kvaran lundon.

## EL LA FEDERACIO

● **VIKTORIO:** La 13-a Generala Kunveno de la Federacio okazis en la Esperanto-Domo en Richmond je 3-a de februaro. Dek kvar membroj el 4 Melburnaj E-Societoj ĉeestis. La kasisto (Eva Trainor) raportis, ke la Federacio havis en 1983 pluson de \$179.99. En la Fiksdato Deponkonto estas \$651 (inkluzive de \$151 de la Fonduso por la Centjara Jubileo).

Elektiĝis la jena estraro: Prezidanto: David Rockell; Vic-Prez: Jack Fallu; Sekretario: Ivy Fallu; Kasisto: Eva Trainor; Redaktoro: Herbert Koppel; Publikaj rilatoj kaj UNO-reprezentanto: Gerald Tuman.

### Letero al la Redakcio

Mi gratulas por bonega kongresa numero de "Aŭstralia Esperantisto". Kiel ne-partopreninto mi tre ĝojis ricevi tiel abundajn informojn. —R.McG.

"**BONA ESPERO**", organo de Sud-Afrika E-Asocio, invitas esperantistojn ensendi diversajn artikolojn por publikigo. Artikoloj estu proks. duon-ĝis unupaĝaj. Adreso: "Bona Espero", P.O.B. 12271, Centrahil, Port Elizabeth, 6006, South Africa.

### SAM ELLYARD — MEMORAĴO

La Esperanto-Klubo de Manly, kaj partoprenintoj en la postkongresa Renkontiĝo kolektis \$100 por starigi memoraron al Sam Ellyard. La Kanbero E-Klubo aldonos almenaŭ \$50 al tiu sumo.

Oni sugestis, ke taŭga memoraĵo estus libroreto aŭ ŝranko en la Nacia Biblioteko de A.E.A., pri kies meblaro Sam sindoneme laboris. La Biblioteko bezonas ŝlosleblan ŝrankon/bretaron por gardi kaj ekspozicii la valorajn malnovajn librojn kaj binditajn gazet-kompletojn. Oni povus surmeti gravuritan latunan aŭ arĝentan plateton.

La Estraro aprobis tiun planon kaj invitas membrojn, kiuj deziras kontribui,

sendi sian donacon al la kasisto, Brenda Birkett, P.O. Box 48, Jamison Centre, Canberra, 2614.

### NOV-ZELANDA KONGRESO

La 49-a Kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio okazis inter la 6-a kaj 10-a de januaro, 1984 en Auckland. Malfeliĉe ĉeestis nur 32 personoj. La kongreson malfermis S-ro Davis Lange, estro de la Laborista Partio. Li diris, ke li ĝojas, ke ekzistas idealistoj, kiuj predikas racian solvon de la lingva problemo.

Kiel Prezidanton oni re-elektis la ankaŭ en Aŭstralio konatan D-ron Don Rogers. Vic-Prezidanto denove estas Ralph Dearnley, Sekretario F. Adams kaj Kasisto Mary Richardson.

Pri la Librofako okazis diskuto. La ĝisnuna prizorganto, Majoro Petersen malsanas kaj transdonis en 1983 la taskon al s-ro Roy Curtis. Sed tiu ne deziras daŭrigi la laboron. Oni sugestis, ke S-ino Colleen Larsen (iama lbroperanto preta malfermi ĝeneralan libro-vendejon kaj havos spacon por Esperanto-libroj. La estraro konsideros tiun proponon baldaŭ. Majoro Petersen estis elektita kiel Honora Dumviva Membro, pro sia multjara servo kiel sekretario, redaktoro kaj libro-peranto.

La jubilea 50-a kongreso okazos en januaro 1985 probable en Wellington.

**MEDITERANEA DIETO:** Oliva oleo, farunajoj kaj legumenoj, la klasikaj elementoj de la mediteranea manĝostilo, estis dum kelkaj jaroj la "medikamentoj" de milo da finnoj, 48-ĝis 52-jaraj, kiuj serioze riskis infarkton. La traktado, daŭrinta 6 jarojn, donis "bonegajn rezultojn", kun malpliigo je 50% de la mortado kompare kun la paralela kontrolgrupo, kiu praktikis la kutiman finan dieton, riĉan je butero, viando, animalaj grasoj. Pri la eksperimento, okazinta en du finnlandaj hospitaloj, parolis en Romo Profesoro Lennart Hansson de la sveda Universitato de Gotenburgo, en la kadro de internacia seminario pri hipertensio kaj koronariaj malsanoj.

(A. De Salvo en la Esperanto-Emisio de Radio Roma).

**SANAJ DENTOJ:** Havis sanajn dentojn niaj praaĵoj de antaŭ tri mil jaroj. Dum ĵusa elfosa kampanjo ĉe tomboj apud Kaltaĝirono (Sicilio), oni trovis, interne de kelkaj tomboj riĉaj je objektoj de antaŭ tri mil jaroj, multajn dentojn senkariajn de plenkreskuloj. La analizo de tiuj dentoj — unuafoje en Italio — estis prizorgita de du esploristoj de la Universitato de Katano, kiuj utiligis, kiel referencan specimennon, la emajlon de nekarigiintaj dentoj elŝiritaj, ĉe la sama Universitato, al pacientoj malsanaj je "forpuŝa gengivito". La diversaj elementoj ĉeestaj en tiuj specimenaĵoj estis evidentigitaj de tiucela rivelaparato funkcianta per ikso-radioj, kaj la unuopaj kvantoj estis mezuritaj per elektrostatika akcelilo. El la esploroj montriĝis, ke ni havas la saman dentemajlon de niaj prauloj de antaŭ tri mil jaroj, kaj ke la plioftigo de dentoputriĝo en la lastaj jarcentoj ŝuldiĝas al eksteraj kaŭzoj, precipe al la modifoj en la nutraj kutimoj: hodiaŭ oni manĝas nutraĵojn tro rafinitajn kaj kun tro da sukero.

(A. De Salvo en la Esperanto-Emisio de Radio Roma)

La edzo al la edzino:

—Tralegu ĉi tiun artikolon pri la fiŝoj, Anna, kaj vi lernos, kiel oni povas silenti.

—Bone, sed unue lernu vi ĉiam trinki nur akvon! (Bud. Inf.)

—Bonvolu doni al mi vitaminojn por la infano.

—Ĉu "A", "B" aŭ "C", demandas apotekisto,

—Tute egale, ĝi ankoraŭ ne scipovas legi. (Bud. Inf.)

Bela kaj eleganta fraŭlino rakontas al amikino:

—"Ho, kia teruro? Pasintnakte mi sonĝis, ke mi iris surstrate tute nuda kun tre granda florornamita ĉapelo surkape".

—"Verdire terure! Ĉar ĉi-jare neniu portas tiajn ĉapelojn".

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603

**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

**Kasisto:** S-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 214 (294)

MELBOURNE

Aprilo-Majo, 1984

---

## NOVA MEMBRO POR LA EKZAMENA KOMISIONO



Kun granda plezuro ni anoncas, ke **RALPH LINDSAY HARRY, A.C., C.B.E.** sukcesis kun honoro ĉe la Ekzameno por la Norma Klereca Diplomo

Apenaŭ necesas, ke oni prezentu al la legantoj de "The Australian Esperantist" nian plej eminentan membron. Kiu ne scias, ke Ralph atingis la apogeon de sia elektita kariero, kiam li estis nia ambasadoro ĉe UNO? Li ankoraŭ okupiĝas pri internaciaj aferoj (en honora ofico) kaj estas entuziasma praktikanto de la kartludo briĝo. Sed probable li konsentus, ke lia ĉefa nuna intereso estas nia internacia lingvo.

Ralph, konata al esperantistoj ankaŭ

kiel RLH aŭ RoLo, okupis diversajn oficojn en nia movado, lastatempe kiel tre iniciatema prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Inter liaj kontribuoj al nia literaturo estas traduko de la Carto de Unuiĝintaj Nacioj, "Saluton Amiko" — Konversacio inter Sportuloj por la Olimpiaj Ludoj kaj vortaretoj pri la aŭstralia(j) dialekto(j) kaj pri briĝo Li klopodas enkonduki solvon por unu el la malmultaj lingvaj problemoj en nia lingvo, nome terminaro de land-kaj landan-nomoj. Ralph emfazas, ke estus ege embarase, se UNO montrus fortan intereson pri Esperanto kaj trovus, ke mankas unueca sistemo por esprimi la nomojn de la membro-ŝtatoj de la monda organizaĵo. Li estas ankaŭ regula kontribuanto al tiu rimarkinda periodaĵo MONATO. Lastaloke mi menciuj sen detaloj, kiuj eble embarasus lin, ke Ralph estas malavara mecenato de nia movado.

Esperanto povas fieri, ke tiel multflanke meritoplena homo pretas labori por ĝi. Bonvenon, klerulo Ralph!

**Trevor Steele, Komisionestro.**

D-ro Arthur Baur en Svisa Radio Internacia

## LA SVISA REFORMATORO HULDRYCH ZWINGLI

En 1983 oni memorigis en Germanujo kaj en multaj aliaj landoj la germanan reformatoron, Martin Luther, ĉar kvincent jaroj estis pasintaj post lia naskiĝo.

En 1984 oni memorigas, ke antaŭ kvincent jaroj naskiĝis la svisa reformisto ULRIKO ZWINGLI, kiu por Svislando ludis la saman rolon kiel Luther por Germanujo.

Zwingli naskiĝis kiel filo de respektata kamparano en orienta Svislando kaj lia patro ebligis al li la studadon por ke li fariĝu klerikulo. Zwingli studis en la latinlernejoj de Bern kaj Basel kaj poste studis en la universitatoj de Basel kaj Vieno. Dudek-du-jara li fariĝis pastro en Glarus. Zwingli estis profunde influita de la humanismo, lernis mem la grekan lingvon kaj legis la antikvajn aŭtorojn. Kun gvidaj humanistoj de sia tempo, kiel la granda Erasmo, li korespondadis.

Legante la Novan Testamenton en la originala lingvo li trovis, ke inter la parolo de Dio, kiun li trovis en la biblia teksto, kaj la tiama stato de la eklezio, al kiu li ja mem apartenis, estis abismo. Kiel predikisto en Einsiedeln, la fama pilgrimejo, li estis tre populara kaj kiam oni en Zuerich bezonis novan pastron oni vokis lin kiel predikiston al la Zurika ĉefpreĝejo.

Tio estis en 1519, kam Zwingli estis 35-jara. Li predikis sole sur la bazo de la Nova Testamento, kiun li interpretis. Tion li jam faris antaŭ Luther kaj oni devas substreki, ke li ne fariĝis reformisto influita de Luther.

Sole per siaj predikoj Zwingli ankoraŭ ne disiĝis de la eklezio, kiun li akre kritikis, sed li ekkonis, ke ne nur la parolo sed ankaŭ agoj devas sekvi liajn teologiajn ekonojn. En 1522 li kune kun sampensantoj publike rompis la eklezian postulon pri karesmo, t.e. fastado. Tiam la episkopo kaj multaj kontraŭuloj de la ideoj de Zwingli plendis ĉe la aŭtoritatoj de Zuerich kaj nun la granda batalo malfermiĝis. La aŭtoritatoj ne punis Zwinglin, sed organizis grandan publikan disputadon, en kiu 600 personoj ĉeestis en la urbodomo de Zuerich por aŭskulti, kiel Zwingli defendis sian vidpunkton kontraŭ la delegito de la episkopo. La argumentoj de Zwingli venkis, kaj la registaro de Zuerich decidis, ke Zwingli kaj ĉiuj

aliaj pastroj en la kantono de Zuerich daŭrigu prediki sole sur la bazo de la Nova Testamento. Tio estis la komenco de la granda reformacio, laŭ kiu la meso estis abolita, la monaĥejoj fermitaj, la adorado de relikvajoj abolita, pilgrimadoj abolitaj, la edziĝoj de pastroj permesitaj, la sanktuloj sensanktigataj, kaj la papo sentronigita. El la preĝejoj oni forigis ĉiujn bildojn.

Ĉiuj eksteraj elementoj de la malnova kredo do estis forigitaj, sed kompreneble la esenco de la nova kredo estis io alia. Laŭ la reformita kredo la homo rekte rilatas al Dio kaj ne povas influi la gracon per konkretaj agoj kiel pilgrimado, konfesoj, preĝado kun rozario, akto de indulgenco, dum laŭ la malnova kredo la homo bezonas la peradon de la eklezio por atingi la gracon de Dio. Tio estas, tre mallongigita kaj simpligita, la esenca diferenco inter la katolikismo kaj la protestantismo.

En tiuj rilatoj la Luterismo kaj la Zwinglismo ne distingiĝas kaj la samo validas por la Calvinismo, sed restis inter Zwingli kaj Luther unu diferenco, kiu estis nesuperebla. La grafo Philipp de Hessen kunvenigis Luther kaj Zwingli en Marburg por unuigi la du branĉojn de la reformita konfesio, sed, en la interpretado de la sankta manĝo, konsento ne estis ebla. Luther kredis, ke la vino vere fariĝis la sango de la Sinjoro kaj la pano lia korpo, dum Zwingli opiniis, ke pano kaj vino havas nur simblan signifon. Kiam ili ne povis interkonsenti Zwingli etendis la manon kaj diris al Luther, ke tamen ili volu esti fratoj, sed Luther rifuzis la manon dirante, "vi havas alian spiriton ol mi". Luther montris sin nepacigebla, sed lia diraĵo estis vera. Zwingli estis pli influita de la humanismo, dum Luther ankoraŭ radikiĝis en la mezepoko kredante al la diablo kaj kaj al sorĉistinoj.

Ekzistis ankoraŭ unu profunda diferenco inter la sviso kaj la germano. Zwingli estis ne nur religia reformisto, sed ankaŭ politikisto, kaj lia celo ne nur estis la reformo de la kredo sed ankaŭ de la ŝtato. En tiu tempo la publika vivo en la svisa federacio troviĝis en profunda krizo. Post la sensaciaj venkoj de la svisoj kontraŭ la duko de Burgundio, kontraŭ Habsburg kaj kontraŭ la germana

regno, regis en Svislando ĝenerala senbrideco kaj la junuloj forkuris al eksterlando por dungigi sin kiel militistoj kaj rapide riĉiĝi. La eksterlandaj potenculoj aliflanke subaĉetis per koruptiga mono la aitoritatojn por facile povi dungi la svisajn militistojn. Zwingli, kiu partoprenis mem en svisaj militiroj al norda Italio ekkonis, kiel tiu sistemo ruinigis la bonajn morojn kaj tial li energie kontraŭbatalis ĝin. En Zuerich li sukcesis, sed en la kamparanaj kantonoj, kie oni rigardis la militdungadon kiel ekonomian necesajon, oni pro tio tre malamis Zwingli-n. En tiuj kantonoj la opozicio

kontraŭ la religia reformo kaj kontraŭ la politikaj celoj de Zwingli sumiĝis. Dum la reformo de Zwingli inter 1520 kaj 1530 disvastiĝis tra la t.n. urbaj kantonoj, la t.n. kamparanaj kantonoj ne aliĝis. La sekvo estis eĉ milito inter reformitaj kantonoj kaj katolikaj kaj en unu tia milito Zwingli mem estis mortigita sur la batalkampo en 1531. Svislando ankoraŭ hodiaŭ estas duone reformita, duone katolika, sed la du konfesioj hodiaŭ tre pace vivas unu apud la alia kaj la ekumenismo ludas fortan rolon.

## ANALOJ DE 1983

### (Daŭrigo)

En la Meza Oriento konstante daŭris la milit-ludo de komunikiloj inter la Iraĉoj kaj la Iranoj. Ambaŭ landoj eldonis multajn komunikakojn, pretendante, ke ili superis en la ŝakoj de **l'Arabo!** La Francĉoj helpis la Iraĉojn per sendo de modernaj flugfolioj. Aliaj ŝtatoj ankaŭ helpis versi petrolon sur la maltrankvilan akvon de la persa **golfejo**. Pro tio la milito nun nomiĝas la **Golfa Milito!**

En Azio ankaŭ estis kelkaj komunikakoj kaj sportaj problemoj. En Hongkongo estis iom da frikcio aŭ frakaso inter la angla kaj la mandarena. Kvankam en Hongkongo ordinare mono parolas ambaŭlingve nun oni ne povas paroli monotone. Nun oni diras, ke ne tempo, sed mono flugas. Tiu situacio nomiĝas la hongkonga doloro.

La Koranoj havis en 1983 tre gravajn komunikilojn kaj sportajn problemojn. Aviadilo, kiu perdis sian vojon en Kampokaĉo penis komuniki kun la ruĝaj ĉastulaj aviadistoj per ŝvebado de la flugiloj Sed ili ne sukcesis. Pro tio la gloraj sovetaj ĉastuloj ĝin plenigis per truoj, kaj atingis ĝin detruo. Post tio grupo de parolamantaj koranoj vizitis Birmon por iom da sporto kaj ripozo, sed ilia ridpozo estis interrompita per bombazeno, kiu ne ŝatis la regulojn aŭ la decidon de la arbitro.

La japanoj ankaŭ celebris la jaron de komunikiloj per parlamenta balotado kaj sportaj festivaloj. Oni ludis goon kaj judon, sed unu antikva ludo perdis multajn adeptojn. Japanaj parolamantaj deputitoj nun akceptas ne eviteblan kalvecon kaj, eĉ se evidentiĝas, ke la kapo fariĝas tute nuda, oni ne celas harakiron!

En Sudorienta Azio estis kelkaj kvereloj en la familio de azenoj. En la Filipinaj Insuloj la reĝimo estis riĉa, eĉ mark-oza. La Prezidentedzino, Sinjorino Markizo, post tro da bombonoj penis elimini aknon. Kiam la popolo kriis: "Donu al ni panjon", ŝi komentis "Se ili ne havas panjon kial ili ne manĝas kapitanan Kukon!

Estis malbonaj rilatoj inter la azenaj landoj kaj Aŭstralio. La aŭs-anoj insistis, ke la aŭstraliaj flagoj por aŭstralia tago kaj la memoraĵoj kaj suveniroj kiujn ili vendadis al turistoj el Singapuro estu fabrikataj en Aŭstralio, super ĉio la koalo-ursoj faritaj el kangarufeloj. La malajzianoj protestis pri tiu dogona politiko, kiu ekskludis la produktojn de la azenlandoj. Ili diris, ke kvankam en Aŭstralio la koaloj estas malpuraj bestetoj, kaj faras malbonan influon kaj elfluon sur la vestoj de la portanto, en Malajzio oni povas dorloti ursetojn senmakule. Pro tio la nomo de la ĉefurbo estas Koalo Lumeputra

En Aŭstralio la komunikiloj konstante pliboniĝis. Oni povis komuniki per aeroŝto kaj telefoni al ĉiu parto de la mondo per diskado de kelkaj ciferoj. Oni diskutis ankaŭ instalon de satelitoj por ebligi al loĝantoj en la foraj regionoj komuniki kun la "So Po"-(startprezaj)-vetistoj en la ĉefurboj. Bedaŭrinde oni ofte ne povis uzi la novajn komunikilojn ĉar la teknikistoj ludis la ŝatatan aŭstralian ludon - nigrajn vetojn kaj strikadon.

En Aŭstralio okazis nur unu vera milito — kun la patrino lando, Irlando. La milito komenciĝis ĉar la Ambasadoro de Irlando protestis pri la vendado en Meiburno de libro de maldecaj ŝercoj pri irlandanoj, ekzemple pri Patriko kaj Mikaelo. La bataloj furiozis ĝis la Prezi-

danto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio trovis pacigan solvon. Li proponis, ke oni traduku ĉiun ŝercon en la neŭtralan internacian lingvon, Esperanto. Fakte, per tiu metodo li senfuzeigis ĉiujn etnajn sercojn. Ekzemple:

Du Esperantistoj laboris por konstrui domon. Unu estis alte sur la tegmento kiam la alia Esperantisto kriis: "Ne mal-supreniru laŭ la ŝtuparo, samideano, mi forprenis ĝin".

Jen alia ekzemplo:

Du Esperantistoj iris al la preĝejo. Kiam oni alportis teleron por kolekti mondonacojn unu Esperantisto svenis kaj la alia forportis lin el la preĝejo.

En Esperantujo en 1983 ĉio estis normala. En Eŭropo la afero stagnis, sed oni propagandis, ke en Ĉinio estas mirinda progreso. En Aŭstralio manpleno de junaj entuziasmuloj donis

novajn ideojn kaj esperon al la amaso. La slogano de Aŭstralia Esperanto-Asocio estis: Esperanto komunista lingvo por agrikultura socio". Oni daŭre disputis en ĉiuj esperantaj rondoj pri la geografiaj nomoj, kaj pri la supersignoj. Oni inventis novan koktelon — maizan viskion kun funda mento!

Monato luktis por ekzisto, eĉ post la rivelado, ke la sekretario de la landa asocio en Sovetunio estas ruĝbetulo. Kaj en Budapeŝto oni pretendis, ke la nombro de partoprenantoj atingis 5000, se oni enkalkulis la infanojn ekgeneritajn dum la kongreso!

Je la fino de la jaro 1983 ĉiuj atendis la novan jaron — jaron de nova espero kaj egaleco, jaron de granda frateco, jaron de novparolo — la orvelan jaron 1984!  
—ROLO.

## AŬSTRALIA ANTOLOGIO

El la listo publikigita en "The Australian Esperantist" de marto, 1983, la jenaj pecoj jam estas tradukitaj aŭ tradukataj:

Harpur: A Midsummer Noon.

Boldrewood: Robbery Under Arms.

Gordon: The Sick Stockrider.

Kendall: The Last of his Tribe.

Collins: Such is Life.

Paterson: Waltzing Matilda; The Man from Snowy River.

Gilmore: Old Botany Bay

O'Dowd: Australia.

Brennan: The Epilogue.

Neilson: The Sundowner.

Dennis: The Traveller. (Neniu ĝis nun kuraĝis provi traduki "Songs of a Sentimental Bloke"!)

Slessor: Country Towns.

Marshall: Pat Corrigan. (Marshall mem konsideras ĉi tiun sia plej bona verko.)

Mackellar: My Country.

White: The Tree of Man.

Stewart: The Fire on the Snow.

Wright: Bullocky; Black Cockatoos.

West: The Shoes of the Fisherman.

McAuley: Terra Australis.

Walker: We Are Going.

Lawler: Summer of the Seventeenth Doll.

Dutton: The Island.

Rowland: Landscape.

Park: The Harp in the South.

Stow: Dust.

Lindsay: Picnic at Hanging Rock.

Advance Australia Fair.

Se vi kredas, ke eltraĵo el longa verko ne estas memstare sufiĉe komprenebla, mi sugestas, ke vi aldonu mallongan resumon de la intrigo aŭ rakonto.

Mi estus ankaŭ aparte dankema, se ĉiu tradukanto (inkluzive de tiuj, kiuj jam sendis tradukaĵojn!) indikus al mi, kiu nun tenas la kopiraĵton.

Tio estas kutime trovebla en la libro, en kiu troviĝas la originala verko. Sed tio ne necesas por pecoj, kies verkinto mortis antaŭ 1938.

—ALAN TOWSEY

Komisito por la Antologio.

## "KONSULTU LA KONSILANTON"

Kelkaj legantoj estas malkontentaj ĉar ni ne plu havas "Who's Who", kaj demandas, ĉu la serio daŭros.

Nu, ni ne povas aranĝi tion, sed ni povas promesi alian serion, kiu, esperable malsimilos niajn kutimajn artikol-

ojn. Vi aŭdis pri "Dorothy Dix" kaj "Dear Abby". Vi certe vidis "Ask the Leyland Brothers". La nova serio similos ilin. Estos mikspoto.

Se vi havas problemon, pri Esperanto, Esperantaj aferoj, k.t.p., skribu al "Konsilanto", c/o "The Australian Esperantist", angle aŭ Esperante. Se la demando



estos angla, la respondo estos per la angla lingvo, sed li preferas Esperanton kaj respondos tiamaniere. Ne timu, vi restos tute anonima.

Kompreneble, "Konsilanto" ne scios ĉiujn taŭgajn respondojn, sed li strebos respondi — interese — per nia ĵurnalo.

"Konsilanto" mem restos anonima, sed ni povas "diri", ke li ne ekzistas, t.e. li ne estas individuo. "Li" estas grupo de lertuloj, kiuj promesis helpi per kunlaboro. "Li" ne estas eĉ tute virsekse. De tempo al tempo vi vidos la virinan vidpunkton.

Kiam? "Li" esperas komenci post du aŭ tri monatoj.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **BRISBANO:** Ĉirkaŭ 20 anoj de la Societo partoprenis la Konferencon de nia Federacio dum la semajnfino, 31 Mar./1 Apr. organizitan de la St. Lucia Grupo kaj tre ĝuis plensukcesan renkontiĝon. Ni gratulas al la anoj de St. Lucia pro la tre taŭgaj aranĝoj.

Krom la 4 klasoj ĉiulunde en la klub-ejo, la konversacia/kantrondo kuniĝas ĉiun sabaton, posttagmeze; samtempe okazas ĉiun duan sabaton kunveno de la LKK rilate al la projektita Universala Kongreso en 1988.

Sabaton la 7-an de aprilo, kelkaj anoj veturos al Coominya por starigi Esperantan Budon ĉe "Bellevue Historia Domo". Oni anticipas ke 10,000 vizitantoj ĉeestos dum la tago! Anoj de la Toowoomba Societo ankaŭ helpos per disdonado de folioj ktp. —RR

● **KANBERO:** La klubo decidis korespondi per leteroj kaj sonbendoj kun grupo en Brazilo. Je 5-a kaj 12-a de marto klubanoj registriĝis kantadon de "Antaŭen Aŭstrali'" kaj "Valse Matilda" Brenda Birkett donis kelkajn faktojn pri Aŭstralio, Katherine Lewis parolis pri Kanbero kaj ties historio, Patti Anson priskribis sian hejmon kaj Marj Ellvard parolis pri la aŭstralia lingvo. Ralph Harry agis kiel anoncisto kaj aliaj membroj aldonis salutojn.

● **MANLY:** Ok el niaj membroj gvidas grupetojn (kun entute 48 studentoj) en

Sidnejo kaj nordaj regionoj. Kvar kursoj okazas ĉiumarde en la "Manly"-Eduka Centro. Dufoje en la trimestro ni okazigas kunvenon, 8-9ptm., kun paroladetoj kaj montrado de lumbildoj.

Je 9-a de marto klubanoj prezentis distran vesperon por la "Amika Klubo de la Manly Uniting Church", laŭ aranĝo farita de Malcolm Ross. Helen Stone estris kaj rolis en diversaj du-lingvaj skeĉoj. Dum la paŭzo, Marjorie Duncan parolis pri la praktika valoro de la lingvo.

Radio "Manly Warringah" jam komencis elsendi programojn, kiujn organizis Roger Springer kaj prezentis Manly kaj Bathurst membroj. En tipa semajno oni uzas proks 30-minutojn da Esperanto-materialo.

Dufoje dum la trimestro kursanoj kunvenis por unu horo da distraĵo. La unuan fojon Betty Cleminson, Bette Hart, Russell Rea kaj Eunice Graham montris lumbildojn kaj je la fino de la trimestro, je 10-a de aprilo, ni ĝuis programon en kiu membroj kunportis kaj preparolis interesajojn.

—EUNICE GRAHAM.

● **SIDNEJO:** "Impresoj pri la Kanbera Kongreso" estis la temo je 16/3. Ĉiuj donis siajn impresojn pri kunvenoj, paroladoj kaj distraĵaj vesperoj. Je 2/4 Tom Elliott prezentis "poemojn por la animo", el la vasta aro da tradukitaj kaj originalaj poemoj. Volo Gueltling, 9/4, parolis pli pri siaj travivaĵoj Semajnon poste M. Chaldecott, uzante ideon el malnova eŭropa libro pri la maniero gvidi grupovesperon, disŝiris artikolojn el ĵurnalo, por ke membroj rearanĝu ilin en la ĝusta ordo.

—M. CHALDECOTT

● **MELBURNO:** Je 7-a de marto Jan Makowski interese prelegis pri "La historio kaj regantoj de Japanio". Aron da bone verkitaj, pensinstigaj artikoloj legis Ken Linton je 9-a de aprilo. "Kiel mallumaj estis la mallumaj epokoj?", rivelis ke tute ne "malluma", sed vere klera estis almenaŭ unu tiutempa reganto. "Pli ol vasta Universo" montris kiel neeble estas koncepti la vastecon de Universo en kiu nia tero estas kvazaŭ punkto. "La psiko de ĉiu homo", priskribis psikologian problemon, kiun nur post jaro Sigmund Freud solvis en stranga maniero.

Je 30-a de aprilo Errol Chick montris diapozitivojn pri ferio en la "Snowy"—montaro.

## EL LA FEDERACIO

● **KVINSLANDO:** Okazis la 31-an de marto/1-an de aprilo la unua konferenco dum 1984. La gastiga klubo estis St. Lucia, kiu bonege aranĝis ĉiujn detalojn. En la halo de la Anglikana Preĝejo partoprenis sabate ĉirkaŭ 30 anoj el St. Lucia, Toowomoba kaj Brisbano la ĝeneralan kunvenon, la vespermanĝon kaj la distraĵojn. Post kantado de "La Espero", ĉiuj staris silente, memore al Sam Ellyard.

La atendita novaĵo pri korporaciigo de la Federacio ŝajne nur realiĝos post kelkaj semajnoj, laŭ oficiala letero de la Departamento de Justeco. Anoj decidis aranĝi la unuan konferencon en 1985 apud la Sunbrila Marbordo. Post luksa, sed ne multekosta vespermanĝo, anoj partoprenis la distran parton de la vespero. Anoj de St. Lucia lerte prezentis la unuan parton de la programo; la Brisbana kantgrupo kontribuis 3 kantojn kaj Ges-roj Dimo muzikis per akordionoj. Kiel kutime Kay Andersen pianludis.

Pro la normalaj "aĉetu kaj alportu" budo kaj "hazard-elekto" skatolo, la profito atingis kontentigan nivelon. Dimanĉe, ĉirkaŭ 20 anoj renkontiĝis en parko ĉe la sportejo "Chandler", kaj tre ĝuis freŝan aeron, sunbrilon apud rivereto plenplena de florantaj akvo-lilioj kun burĝonaj akacioj ktp. Inter babilado kaj ĝuado de la naturo, ĉiuj kaptis la okazon vagi kaj inspekti lokon kie eble okazos la Universala Kongreso en 1988. Post rost-freŝa lunĉo kaj pli da diskutoj ĉiuj hejmeniris. Ĝis Gaton en septembro.

—R.R.

● **N.S.K.:** Finfine ni vendis la domon apud la Esperanto-Domo, kaj, esperas, ke la nuna renovigo de nia kunveno alportos pliajn sukcesojn. Post la aprila konversada posttagmezo, la grupo kune manĝis en la korto de la Esperanto-Domo, kaj ĝuis la eblecon renkonti anojn, kiuj ne ofte vizitas la Doman, inter ili kelkajn novulojn de la "Wesley"-Centro kaj "Manly"-grupo.

—M. CHALDECOTT

## NEKROLOGOJ

**IRENE COURTENAY** naskiĝis Irena TRAUM(OWNA) en Tarnow, Pollando, la 13-an de julio, 1909. En 1925, nur 16-jara, ŝi trovis malgrandan Esperanto-lernolibron en la libraro de ŝia nelonge mortinta patro. En 1929 ŝi fariĝis mem-

bro de U.E.A. kaj en 1931 UEA-delegito por Tarnow. En 1932 ŝi sukcesis en Esperanto-instruista ekzameno en Krakow.

En 1936 ŝi edziniĝis al Benjamin Fink jam sep jarojn turista agenteo en Casablanca, Maroko. Al la paro naskiĝis filo kaj du filinoj. En 1937, ŝi fariĝis prezidanto de la Maroka Esperanto-Asocio kaj de 1940 ĝis 1948 ŝi estis redaktoro de ties oficiala organo "La Verda Flamo" (poste "Afrika Revuo"). Ŝi estis ĉefperanto de Internacia Esperanto-Ligo de 1940 ĝis 1948. Ŝi multe interesiĝis pri ĵurnalismo kaj pentrado.

La familio migris, en oktobro, 1948 al Melburno, kie dum 10 jaroj la geedzoj penadis establi sin per nekutima manlaboro. La streĉo de tiu periodo tiel malbone efikis, ke en 1966 la geedziĝo estis laŭleĝe nuligita.

En 1961 ŝi fondis la "Esperanto-Klubon de Orientaj Antaŭurboj", kiu poste fariĝis la nuna Oakleigh Esperanto-Grupo. Ŝi mortis pace kaj neatendite pro koratako dum dormo, je 4-a de januaro, 1984

**BERYL RANGLES:** A.E.A.-anoj, precipe kiuj partoprenis la 23-an Kongreson en Adelajdo en 1982, certe ricevos kun bedaŭro la novaĵon, ke, je 21-a de marto, ŝi Beryl Randles mortis pro koratako post sukcesa operacio por anstataŭigo de kokso-artiko.

Beryl, kiu naskiĝis 1/3/1912 en Elsternwick, Vik. unue interesiĝis pri Esperanto, en Adelajdo, iam en la milita periodo, post diskutoj kun Kol. Fulton, ŝia unua instruisto. Ŝi poste entreprenis korespondajn kursojn kun Len Newell. Ŝi ankaŭ partoprenis studrondojn sub gvidado de F-ino Win Addis

Elstaraj travivaĵoj por ŝi estis vojaĝoj transmare en 1972 kaj 1979, kadre de kiuj ŝi kontaktis esperantistojn ĉe U.E.A.-sidejo en Roterdamo, kaj renkontis gravan norvegan fervojista-estranon en Oslo.

Ŝi estis ano de A.E.A., kiel ankaŭ de Sudaŭstralia E-Societo, kiun ŝi servis kiel kasisto ekde ties fondiĝo (25-2-1980). Gravan laboron ŝi plenumis samofice kiel ano de la Loka Komitato por okazigo de la Kongreso en 1982, kaj elstaris ŝia kontribuo al ties distra programo per parolado pri lokoj vizititaj dumferie. Tiun ŝi ilustris montrante proprajn pentraĵojn, kiuj pruvis ŝin artisto, kiu sciis bildigi egale bone per peniko kaj vortoj.

Nur la familio ĉeestis ŝian kremacion, sed sekvintan dimanĉon okazis memorservo en ŝia preĝejo

Ŝia forpaso estas granda perdo al Societo kaj Asocio, kies membroj esprimas samtempe sinceran bedaŭron kaj koran kondolencon al ŝiaj edzo, Wes, filino kaj du filoj.

—FAY KOPPEL

**LA "A.E."**  
**SUBTEN — FONDUŜO**  
**1984/85**

|   |              |
|---|--------------|
| S-ino T. Metherall, Marmong Pt, N.S.W. ....                                   | \$5          |
| S-ino Eunice Graham, Manly .....  | 5            |
| S-ro E. C. Tronerud, Kenmore, Q. 10   |              |
| F-ino S. Connors, Toowoomba, Q. ...   | 10           |
| <b>Ges-roj T. &amp; I. Einihoviĉi, Perth</b> .....                            | <b>20</b>    |
| S-ro D. McQueen, Warragul, Vic. ....  | 10           |
| S-ino Marj. Ellyard, Canberra .....   | 5            |
| S-ino E. C. Oliver, Orelia, W.A. ....   | 10           |
| S-ro A. C. Oliver, Orelia, W.A. ....  | 10           |
| F-ino A. Curtis, Eagle Heights, Q. ...  | 5            |
| <b>S-ro H. Koppel, Melbourne</b> .....  | <b>25</b>    |
| S-ro Stan Kelly, Melbourne .....  | 1            |
| S-ro S. Kanaĉki, Melbourne .....  | 2            |
| <b>S-ino G. Huelin, Sydney, Fratino de S-ro Frank Banham (mortinta)</b> ..... | <b>50</b>    |
| S-ino D. Morrison, Wonthaggi, Vic. ...  | 5            |
| S-ino M. Sanders, Melbourne .....   | 5            |
| S-ro D. Mason, Mansfield, Vic. ....   | 5            |
|   | <b>\$183</b> |

**KIU SEKVOS ?**

**RECENZOJ**

"La Lingva Esenco de Esperanto" far Atanaso D. Atanasov, eldonita de U.E.A. Prezo \$11.75 plus franko ĉe AEA-Libroservo.

Ĉi tiu tre interesa verko analizas ĉiujn facetojn kaj problemojn en la Internacia Lingvo, kaj pro tio estas nemalhavebla por ĉiu serioza esperantisto.

Tiajn aferojn, kiaj vortordo, vortfarado, propraj nomoj, neologismoj, kaj multajn similajn aferojn la aŭtoro plene traktas el neutrala, senantaŭjuĝa, sentendenca, kaj tre kapabla maniero.

Tre interesis min, ekzemple, liaj rimarkoj pri la prepozicioj "kun" kaj

"per", kiuj en kelkaj etnaj lingvoj estas intersangeblaj, kiel ekzemple en la angla frazo: "He mixed the red paint with the white and stirred it with a stick", en kiu frazo la prepozicio "with" havas du apartajn signifojn tiel, ke la frazo fariĝas en Esperanto: "Li miksis la ruĝan farbon kun la blanka, kaj kirlis ĝin per bastono". Nun la du signifoj estas facile distingeblaj. Tiu sama vorto, "kun", en la vorto "kunveno", estas nelogika, sed Zamenhof intencis kuracian tion per la enkonduko de la prepozicio "kum" (maldis), sed la eksplodo de la Ido-krizo malebligis tion. La ĝemela vorto, "kunsido", estas tute logika. En tiu sama listo estis la prepozicio, "par", por uzo post pasiva participo. Tamen mi opinias, ke li estus tute kontenta pri "far", Oponantoj de "far" argumentas, ke "far" jam havas alian signifon, sed tiu komento validas ankaŭ por "par".

Mi tute konsentas kun li, ke la vorto "por" funkcias ankaŭ kiel konjunkcio, precipe antaŭ infinitivo aŭ la subjunkcio "ke". Mi vere ne trovas ion por kritiki, kaj mencias nur tiujn punktojn, kie povas esti alia opinio. Mi tre konsentas kun liaj vortoj pri Zamenhof: "Kiam li vivis, verkis, kaj parolis, des pli antaŭniaj okuloj, aperas la grandiozo de lia persono kaj lia kreaĵo, sed tiu aprezo ne atingis idolismon". Por iuj personoj la sugesto, ke Zamenhof faris eraron, estas sakrilegio. Unu eraro, kiun li konstante faris, estis "ne devas" anstataŭ "devas ne", kiun Pastro Downes devis korekti per notoj en la 1954-a eldono de "Fundamenta Krestomatio", sed mi ne povus imagi, ke Pastro Downes perdis sian profundan estimon kaj admiron al la genia kompilito de nia lingvo.

La tro ŝarĝita prepozicio estis problemo, kun kiu Zamenhof luktis, sed nur por du signifoj: por indiki la aganton kaj la objekton, kaj tiuj du funkcioj ankoraŭ ĝenas la adaptantojn de la lingvo por la komputila uzo de la lingvo, kiel mi rimarkis en la artikolo far Bruce Sherwood. Vidu paĝon 7 de la januara numero de "Esperanto", kie li proponis ĉi tiujn du uzojn: "la manĝado far la muso" kaj "la manĝado den la muso". Kalocsaj jam uzis la unuan kaj mi certas, ke li aprobus la duan, ĉar li longe cerbumis pri tiu problemo.

Ni pensas pri iuj agoj, kiel elirantaj, kaj por tiuj la prepozicio "al" ŝajnas natura, kiel ekzemple: "konsili", "kon-

soli", "persvadi" "riproĉi" kaj "insulti", dum aliaj verboj estas eniremaj, kiaj ekz. "preni", ricevi" kaj ŝteli," kaj por tiuj la prepozicio "de" ŝajnas pli natura. Mi ankaŭ emas uzi "al" post "proksima" kaj "de" post malproksima, sed mi devas konfesi, ke tion povus kaŭzi la angla influo pro esprimoj, kiaj "near to" kaj "far from".

La aŭtoro plene diskutis la nelogikan uzon de "el", kiel prefikson por indiki "gisfunde", kiel en la vorto "ellabori" kiun ni angle-parolantoj emas akcepti pro la angla verbo "elaborate", sed ĝi restas nelogika uzo. Solvo povus esti la enkonduko de la germana "aus", sed mi ne kompetentas diskuti germanajn vortojn.

Pri la negativa adverbo, "ne", ni devas konstati, ke ĝi negas la vorton, antaŭ kiu ĝi staras. En la esprimo "Li ne devas fari tion", la "ne" klasifikas la verbon "devas", dum en la esprimo, "Li devas ne fari tion". Ĝi klasifikas la verbon "fari". Mi ofte rimarkas ĉi tiun pekon kun la adverbo "ankoraŭ", en la esprimo "ne ankoraŭ" anstataŭ "ankoraŭ ne". Mi povas kompreni, ke franco povus esti influita de la franca "pas encore".

Kiam mi vidis turistan afiŝon pri Jugoslavio, kaj legis la nomon de la lando, "Jugoslavija", venis al mi en la kapon la ideo, ke tiu sufikso povus solvi la problemon pri landnomoj. Mi opinias, ke "Britujo", "Francujo" kaj "Germanujo" sonas pli nature ol "Britujo", "Francujo" kaj "Germanujo". Kion opinias la slavoj pri tio?

Mi ne povas konsenti kun li pri la prepozicio "po", ĉar li konsentas pri la uzo de la nominativa kazo post tio, kion mi opinias rekta objekto de la verbo. Mi konstatas, ke PAG donas la ekzemplon: "Ili ricevis po kvin poemoj", sed mi ne imitiĝis tiun uzon en mia "Studlibro por la Supera", dirante, ke "po" rilatas al numeraloj. Kial komplikigu la lingvon! Mi opinias, ke estas tute egale ĉu ni metas la objekton antaŭ la po-prepozitivan aŭ post ĝin. Ĉu "Ili ricevis poemojn po kvin" aŭ ĉu "Ili ricevis po kvin poemojn". Rekta objekto estas ankoraŭ rekta objekto, ĉu ĝi staras antaŭ aŭ post la po-prepozitivo.

Mi komentas pri nur kelkaj punktoj, sed nia bulgara amiko analizas multajn.

Ken G. Linton.

**HISTORIO DE POŬTO:** La termino "poŝto" devenas el la latina vorto "posita", kiu indikis la lokojn, kie oni ŝanĝis ĉevalon laŭlonge de la romiaj stratoj. Jam 400 jarojn antaŭ Kristo Romo adoptis poŝtan komunikadon, sed tiam nur por ŝtataj celoj.

Je la epoko de la imperiestro Aŭgusto, poŝto akiris rimarkindan gravecon, kaj la poŝta reto ampleksiĝis aron da postenoj, kie oni povis ne nur ŝanĝi ĉevalojn, sed ankaŭ ricevi manĝon kaj tranokton.

En la postaj jarcentoj, pro la kompleksaj politikaj eventoj, poŝto fariĝis privilegio por nur kelkaj personoj. Oni komencis reparoli pri organizita poŝta servo nur komence da la 15-a jarcento: tiam la kreskantaj intersanĝoj, akcelataj de la fiouroj, pelis la komercistojn organizi servon por liveri negocajn leterojn. La folioj estis faldataj triope, sen koverto, kaj kiel sigelilon ĉiu komercisto utiligis personan emblemon stampitan sur sigelvakso.

La kosto de la poŝta servo estis, ĝenerale, eltenata de la adresatoj, tiel ke la leterportisto havis intereson plenumi sian servon diligente kaj rapide. La tarifoj variis laŭ la distanco, la urĝo kaj la jarsezono. Por kompreni, kiom multekosta estis tiutempe la poŝta servo sufiĉas diri, ke por porti leteron de Romo al Civitavecchia, 70 kilometrojn for, oni pagis en la jaro 1450 la egalvaloron de la afranko de 200 hodiaŭaj leteroj. Nur la Papo, tiutempe, povis permesi al si la lukson vivteni 53 kurierojn; kaj kiu aŭdacis malhelpi ilin, tiu ricevis ekskomunikon.

La unua vastaskala poŝta reto estis aranĝita de Venecio, je la tempo de ties plej granda komerca prospero, ĉirkaŭ la jaro 1550 kaj tiam la poŝta servo komencis fariĝi iel alirebla ankaŭ de pli modestaj sociaj tavoloj. En la postaj jarcentoj, la ŝtatoj komencis alpreni senpere tiun taskon, emfazante ke temas pri ŝtata monopollo, kaj ke la civitanoj povas utiligi la servon nur pro koncesio de la suvereno.

(A. De Salvo en la Esperanto-Emisio de Radio Roma)

—Kiel vi simple klarigos kio estas franĉino?

—Virino, al kiu estonta edzo promesas ĉion, kion ŝi ne ricevas, estante lia edzino. (Bud. Inf.)

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 215 (295)

MELBOURNE

JUNIO, 1984

## DU NOVAJ FRATULOJ DE A.E.A.

Okaze de la Kanbera Kongreso, la estraro de A.E.A. anoncis, ke du novaj Fratuloj estis elektitaj.

Jen la biografioj de la du nove honorigitaj, kiuj nun rajtas uzi la literojn F.A.E.A. ("Fratuloj de A.E.A.") post siaj nomoj:

### MARJORIE DUNCAN, F.A.E.A.



Naskiĝis 18-3-1912 en Coventry, Anglujo. Farigis instruistino en 1932 en aĉa kvartalo de industria urbo Huddersfield, kie ŝi devis instrui klason de pli ol 50 geknaboj, sub tre malbonaj kondiĉoj. Por eskapi de tiuj preskaŭ netolereblaj kondiĉoj ŝi venis post 6 jaroj al Aŭstralio. 1938/39 ŝi estis "interŝanĝ-instruistino" en Sidnejo kaj Kanbero. Ekiris hejmen 1-9-1939, sed devis reveni de Nov-Zelando pro la milit-deklaro kaj denove instruis en Sidnejo.

Jan. 1942 - Jan. 1946 ŝi veturigis armean ambulancon en Sidnejo, Port Kembla kaj Newcastle. Feb. 1946 reiris al Anglujo (Bournemouth). Eklernis Esperanton frue en 1947, en kafeja ĉambro en Southbourne (antaŭurbo de

Bournemouth) kie kunvenis la sola Esperanto-grupo en la regiono. Fondis grupon en Westbourne (alia antaŭurbo de Bournemouth) kaj instigis la tiutempe velkintan Bournemouth-societon revigliĝi. En 1948 instruis Esperanton en la 3 kluboj de Bournemouth, Southbourne kaj Westbourne. En 1949 Marjorie kunorganizis la 34-an Univ. Kongreson en Bournemouth.

Edziniĝis en Oktobro 1953 al Archie Duncan (Aŭstraliano), kun kiu ŝi elmigris al Aŭstralio. En 1959 Marjorie komencis Esperanto-klason ĉe la Vesper-Lernejo de Manly, el kiu formiĝis en 1961 la Manly E-Klubo, kies prezidanto ŝi estis dum dek jaroj. Ŝi nun estas Honora Dumviva Membro de la klubo. Kunorganizis la aŭstralian kongreson en 1968 kaj tre sukcesajn post-kongresojn

en 1976 kaj 1984. Pro sia senlaca kaj lerta gvidado, la Manly Esperanto-Klubo

estas nun unu el la plej fortaj kluboj en Aŭstralio.

**PROF. ROBERT GEORGE (ROBBY) ROBERTSON,  
M.A.(Oxon), M.E.(NSK), F.A.E.A.**



Naskiĝis 7-4-1917 en Penrith, Norda Anglujo. Gajnis stipendion por la Universitato de Oxford, kie li unue studis matematikon, poste eniris la inĝenieran fakon. Post diplomigo li desegnigis maŝinojn por elektro-centraloj Nur 23-jara li fariĝis Inĝenier-leŭtenanto en la aviada fako de la militmaristaro, kaj estris 800 subulojn en la inĝeniera fako.

En la jaro 1944 Robbie estis sendita al Aŭstralio kiel staba inĝenieroficiro. Post la milito, en 1946, Robby reiris al Anglujo, kie li de 1946 ĝis 1950 laboris en fabriko por helikopteroj. En 1950 Robby decidis migri al Aŭstralio. Li fariĝis lekciiisto ĉe la Universitato de Teknologio en Sidnejo.

Malfeliĉe, en la jaro 1956 li havis gravan akcidenton dum judo-ekzercedo. kiu devigis lin resti en la lito dum kelkaj monatoj. En 1963 li fariĝis Supera Lekciisto kaj en 1972 Asociito-Profesoro por Mekanika Inĝenierado kaj li emeritiĝis en 1977.

Robby komencis lerni Esperanton en la Sidneja Klubo en la jaro 1965 kaj fariĝis Prezidanto de la Aŭstralia E-Asocio en januaro 1972, kiun postenon li okupis ĝis junio 1980. En tiu jaro la Manly Esperanto-Klubo elektis lin kiel Prezidanton.

## KIU REVIZIOS LA REVIZION ?

**BERNARD GOLDEN**

Kiu legas multe en diverstipaj publikigaj eldonitaj en Esperantujo, ja scias, ke malofte estas troveblaj ekzemploj de absolute perfekta senerara lingvouzo. Ne temas pri preseraroj aŭ stilaj nebulaĵoj, sed pri malĝusta kontraŭregula esprimado en Esperanto. Laŭ la opinio de pluraj redaktoroj, aŭtoroj mem ofte ne kapablas senerarigi siajn proprajn verkojn; bezonataj estas la okuloj de alia homo, lingve kompetenta kaj kvalifikita por okupiĝi pri la reviziado de tekstoj. Kelkaj periodaĵoj kaj eldonejoj transdonas siajn publikigotajn verkojn al tiaj spertuloj, por ke ili elsarku la plej gravajn misaĵojn antaŭ publikigo. Aliaj redakcioj lasas la respondecon pri la lingvonivelo de la aperigotaj artikoloj kaj beletraĵoj ĉe la aŭtoroj mem. Ĉiokaze, malgraŭ reviziado, kelkaj eraroj ĉiam sukcesas eviti la ruĝan krajonon de redaktoroj kaj legantoj de presprovaĵoj. Tio daŭre okazas en la redaktejo de monata periodaĵo eldonita en ĉefurbo de eŭropa lando. Ni rigardu kelkajn ek-

zemplojn ĉerpitajn el unu el la pasintjaraj numeroj.

A. La transitiveco de verboj estas aspekto de la gramatiko de Esperanto, kiu kaŭzas preskaŭ nesupereblajn obstaklojn sur la vojo de primajstrado de la lingvo.

1. "La konferenco urĝigis la aplikadon de Esperanto en kooperativaj instancoj".

2. "La impeta, eksplodsimila kresko de kvanto da esperantistoj kaj gazetoj komencis eksponenciale de 1902".

En la unua frazo la verbo "urĝi" estas transitiva, do la sufikso "-ig" estas superflua. Kontraŭe, en la dua frazo "komen-ci", kiu estas transitiva, ne estas uzebla en tiu kunteksto; bezonata estas la ne-transitiva formo "komenciĝis".

B. La adjektivoj "soveta" kaj "sovetia" havas malsamajn signifojn.

1. "Raporto pri la plenkunsido de soveta krea intelekularo".

2. "25-jara soveta esperantisto deziras korespondi pri la Esperanta

literaturo . . . ”

“Soveta” rilatas al “soveto, speco de registara organo, dum “sovetia” laŭ **Plena Ilustrita Vortaro** (PIV) signifas “rilata al Sovetia aŭ al ĝia registaro”. En la unua frazo temas pri la intelektularo de la tuta lando, Sovetio, kaj ne de iu soveto. La adjektiva formo “sovetia” estas ĝuste uzata en la dua frazo.

C. La dulitera vorteto “po” estas verŝajne la plej malfacila en la tuta zamenhofa lingvo.

1. “La revuo aperas kvarfoje en ĉiu jaro kaj enhavas ĉ. po 40 paĝojn.

En tiu ĉi frazo “po” estas superflua, ĉar la esenca signifo estas: la revuo havas ĉ 40 paĝojn. Temas pri nur unu numero de la revuo, kaj la cetera parto de la frazo “kvarfoje en ĉiu jaro” ne rilatas al la paĝnombro. Male, se oni reverkas la frazon jene, “po” estas bezonata: Kvar numeroj kun po ĉ. 40 paĝoj aperas en ĉiu jaro. Estas klare, ke ĉiu el la kvar numeroj havas ĉ. 40 paĝojn, kaj en la jarkolekto estas ĉ. 160 paĝoj. Ellasante “po”, oni ŝanĝas la signifon: Kvar numeroj kun ĉ. 40 paĝoj aperas en ĉiu jaro. Nun la paĝnombro de la kvar numeroj ne estas entute ĉ. 160 sed nur ĉ. 40! “Po” vere estas senutila vorteto, se oni uzas “ĉiu” en la ĝusta loko: Kvar numeroj, ĉiu kun ĉ. 40 paĝoj, aperas jare.

D. “Absorbi” estas verbo, kies semantika tereno en Esperanto estas malpli vasta ol en etnaj lingvoj.

1. “Ĉiu nudigita terpeco, sarkita bedo tuj rekovriĝas per verdaj, kiu absorbas, transformas kaj stokas la energion”.

PIV difinas “absorbi” kiel “ekskluzive okupi (la spiriton aŭ atenton)”. En la citita frazo oni devas diri “sorbi” aŭ “ensorbi”.

E. Ankoraŭ unu malgranda vorto, kiu estigas grandajn problemojn por kelkaj esperantistoj estas “la”.

1. “La kongresanoj tre atendis la merkredan aŭtobus-ekskursion al la Balatono”.

2. “. . . la kvanto de altproduktivaj aŭtoroj estis ĉirkaŭ kvadrata radiko el tuta kvanto de verkistoj.”

En la unua frazo la propra nomo Balatono estas difinita loko, do en Esperanto la artikolo ne estas bezonata. La sekva frazo lamas pro manko de la difina artikolo, antaŭ “tuta”. Ĝi estas adjektivo kaj akceptas la difinan arti-

kolon. Cetere, temas pri kvanto da verkistoj jam menciita en la artikolo — ne iu ajn kvanto.

Ankoraŭ ne estas finita la lingva analizo de la koncerna numero de la periodaĵo, sed la eraroj jam pritraktitaj sufiĉas por montri, ke unu lingva revizianto ne sufiĉas. Estas necesa superrevizianto, kiu revizias la unuan revizion, kaj eble ankoraŭ pli supera revizianto . . . Ĉio dependas de la limo de eraroj, kiun toleras la redakcio kaj legantaro. La termino de tiu limo estas tre delikata afero kaj tikla tempo por diskutado. Ĉu estos eble pritrakti ĝin sur la paĝoj de **The Australian Esperantist**?

## OMAGO AL JUAN REGULO PEREZ

Okaze de la emeritiĝo de Juan Regulo Perez, membro de la Akademio de Esperanto kaj ĉefo de la fama eldonejo “STAFETO”, la Universitato de La Laguna, Tenerife, en la Kanariaj Insuloj decidis eldoni libron por lin omaĝi. La libro iros al ĉiuj hispanaj universitataj bibliotekoj kaj al multaj alilandaj.

Je la sugesto de Profesoro Regulo la Rektoro de la Universitato invitis kontribui studon ĉiujn membrojn de la Akademio de Esperanto, kaj ankaŭ aliajn “famajn esperantistojn”. Inter ĉi tiuj estis la Prezidanto de A.E.A., Ralph Harry, kiu verkis specialan 20-paĝan artikolon: “La Internacia Juro pri la Maro”. S-ro Harry estis ĉefo de la Aŭstralia delegitaro al la Tria Konferenco de Unuigintaj Nacioj pri la Mara Juro.

La titolo de la Libro estos, latine: SERTA GRATULATORIA IOHANNI REGULO SEPTUAGENARIO OBLATA (Gratula girlando por Johano Regulo, okaze de lia 70-a Datreveno)

## NEKROLOGO

“MONATO” (1980-1984)

Kun bedaŭro ni lernis, ke MONATO, internacia magazino sendependa estas sur sia mortolito. Post la numero 5/84 ĝi ne plu aperas.

MONATO estas unika inter ĉiuj revuoj en Esperanto, ĉar ĝi raportis ne pri la Esperanto-movado, sed pri la vivo de la mondo. Ĝiaj ilustritaj artikoloj, verkita de ĉ 300 korespondantoj en ĉiu regiono de la terĝlobo, estis aŭtentaj respieguloj de la situacio en la koncernaj

landoj. La diskutado en leteroj al la redaktoro estis vigla kaj trafa. La satiroj estis amuzaj kaj pikaj. La rubrikoj por virinoj kaj infanoj estis legindaj eĉ de virviroj kaj plenkreskuloj.

Ligitaj al MONATO estis du gravaj eldonaĵoj. En 1981, 1982 kaj 1983 TK/STAFETO eldonis Praktikan Poŝkalendaron de MONATO kompilitan de la kunlaborantoj kaj redaktitan de Stefan Maul. Ĝi entenis 160 paĝojn de utiliga informajo, inkluzive liston de la landoj de la mondo, iliaj loĝantaro, ĉefurbo, reĝimo, mono, kaj membreco en internaciaj organizaĵoj. En 1983 aperis libreto kun gvidlinioj por raportantoj, vera resumo de la ĵurnalista metodo.

En sia komuniko Stefan Maul atribuas la fiaskon al la fakto ke pro nesufiĉa subteno de multaj rondoj movadaj ĝi ne atingis tavolojn de ebla abonantaro, kiu . . . aprezus kaj aĉetus tian revuon, se ĝi konus ĝin.

A.E.A. subtenis "MONATON". Du membroj ofte verkis artikolojn kaj aliaj de tempo al tempo. Estis 40 abonantoj en Aŭstralio. La Asocio kaj aliaj societoj abonis. Mi mem persvadis "Canberra Times" inviti la publikon donaci abonojn por homoj kiuj ne povis pagi. Sed tamen ni partoprenas la honton, ke ni lasis morti la unuan ampleksan ilustritan novaĵgazon en Esperanto.

Esperable Heroldo de Esperanto kaj ankaŭ la organoj de landaj asocioj, post la bona modelo de MONATO, eldonos pli da aktualaj raportoj pri naciaj kaj internaciaj eventoj.

Kaj, eĉ se MONATO mortos, la ideo kaj idealo de helpo al interkompreno per internacia novaĵgazeto en la internacia lingvo certe ne mortos. Unu tagon Stefan Maul, aŭ alia genia redaktoro, aŭdacos rekomenci, kaj Esperantujo denove havos sian "MONATON" aŭ sian "SEMAJNON". Kiam tiu tago venos la Esperantistoj de Aŭstralio devos duobligi, triobligi siajn klopodojn por certigi, ke tiu revuo vivu kaj floru.

—RALPH HARRY.

## FONDUSO MATASIN FUNKCIAS

A.E.A. helpas eldoni "Sed Nur  
Fragmento"

Dank'al bona vendiĝo de "Sur La Bordo" la Fonduso Matasin jam pretas helpi pri la eldono de dua libro de aŭstralia aŭtoro.

La Estraro decidis provizi \$2000 kiel antaŭmendon de 200 ekzempleroj de "Sed Nur Fragmento" grava originala romano de Trevor Steele, pri vivo en Kvinslando kaj Nov-Gvineo.

Oni esperas, ke "Sed Nur Fragmento" aperos antaŭ la fino de la nuna jaro, aŭ tre frue en la jaro 1985.

## STRATO COLLINGRIDGE

Dum la vizito de la kongresanoj al Strato Collingridge en Weston (Kanbero) en Januaro oni rimarkis, ke la nomo estis malbone literumita, kaj la anonc-tabulo defektita.

Sendube dank'al la publiko, kiun ni aranĝis en la "Canberra Times," la tabuleto estas nun freŝe kaj korekte pentrita, kaj restarigita rektangle. —R.L.H.

## "KONSULTU LA KONSILANTON"

"How long does it take to learn Esperanto?" — Beginner.

Dear Beginner,

If you mean how long will it take you to learn Esperanto, I can't be at all precise. It depends on what kind of a learner you are and what you mean by "learn".

The second part first. I've been learning English for well over half a century, but there are many, many words that I still don't know. Yet I suppose one could say that I have **learned** English. I can read it without any trouble, I can converse comfortably in English, I can write it intelligibly (even if not intelligently).

Now how long will it take you to read Esperanto with reasonable ease? I still can't answer. It is said that Leo Tolstoy learned to read Esperanto in half an hour, but he was already a very competent linguist and one language often helps another. By the same token, I knew three language teachers, fluent in French and German and "knowing" Latin and Greek, who had no trouble in reading Esperanto at sight. If you are of average ability (i.e. not a great deal smarter than I am) I'd reckon you could probably read pretty well after six months.

Writing, except on a very limited range of topics, should take you perhaps a year, although many beginners start overseas correspondence after only 3 or 4 lessons.



Finally, speaking Esperanto often scares learners, who become slaves to the written word. Ideally, speaking should be learned at least as fast as writing. However adults often seem reluctant to hear themselves speak, so fear turns them into mutes. If you are a "fraidy cat", fluency in speech might take you 10 years; if, however, you dare to "have a go" (and why shouldn't you?) you should become quite fluent in, say, five years.

The official journal of the Esperanto Teachers Association (Britain) states, "A usable competence in Esperanto could be gained, at least by above average pupils, in a course of only one year's duration. Even less able learners would be more likely to use their Esperanto after one or two years.

—Konsilanto.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** Dimanĉon, la 11an de marto, en bela vetero, proksimume 20 klubanoj kaj amikoj piknikis ĉe la hejmo de S-ino Elaine Piana en Woodlands. Post lunĉo en la bela ĝardeno oni rigardis per la videoaparato de Raffaele Alvaro eventojn de la Kongreso en Kanbero, kiujn surbendigis Tom Elliott.

Denove nia inform-oficisto, S-ino Idyss Einihovici, estris viglan atakon kontraŭ la nescio pri Esperanto de la vasta publiko. La okazo estis 'Open Day' ĉe la Universitato Murdoch, la 15an de Aprilo. Per la helpo de bibliotekisto Hugh Malcolm, Idyss ricevis permeson de la universitataj instancoj informi pri Esperanto en la ĉambro mem kie troviĝas la Esperanto-kolekto de la Ligo. En tiu tago amase venis la ordinara publiko por inspekti la universitaton kaj diverse maniere sin distri surloke. Helpate de malgranda grupo Idyss tuttage informadis al la multnombraj vizitantoj al la ĉambro. Inter siaj helpantoj estis Len Edgington kaj S-ino Norma Broadribb, kiuj lastatempe diplomigis ĉe Murdoch, kaj Jacquie Walker, kiu estas studentino pri medicino en la Universitato de Okcidenta Aŭstralio.

S-ino Vera Payne prezentis kaj prikrabis en la kunveno 28/3 diapozitivon pri San Francisko kaj kelkaj aliaj lokoj

vizititaj de ŝi. Si ankaŭ informis pri peto kiun ŝi ricevis de kampara filio de la Asocio Ruĝa Kruco, kies membroj volis lerni Esperanton. Okazis la kutimaj eroj —vigligaj demandoj de Jack Hawks kaj informoj el Esperantujo de Dro Tim Einihovici kaj fine, en grupetoj, oni diskutis pri la Olimpiaj Ludoj.

Nova membro John Harvey kaj informis kaj distris nin (11/4) per diapozitivon pri Hong Kong, Ĉinio kaj Macau, kiujn li informe komentaris. Ni ankaŭ diskutis pri la problemoj de emeritoj.

Dek naŭ anoj spitis malbelan veteron por ĉeesti la kunvenon je la 9a de majo. En ĝi ni baraktis kun traduktaskoj elpensitaj de Peg Barkley en San Francisko, pasintjara gastigantino de Vera Payne. Temis pri tiu trouzata vorteto PUT. Tamen, laboro alternis kun distro, ĉar ŝtudento, S-ino Val Graham, afable preparis surbendan akompanaĵon por komuna kantado, kio multe kuraĝigis la hezitemulojn. Prezidanto Rene Smeets venis kun brako subtenata per skarpo. Antaŭnelonga bicikla akcidento rompigis ĝin. Kun li ni simpatias kaj al Vera Payne ni gratulis pro freŝdata sciigo pri sukceso (kun honoro) en la Norma Supera Ekzameno de A.E.A. Ni deziris bonan vojaĝon al S-ino Riet Bennet, kiu baldaŭ foriros por ses-monata vizito al Eŭropo.

Nia kara Dolly Dean, tre malsana, estas nun en la Hejmo de Paco, Subiaco.  
—R McG.

**Kun granda malĝojo ni devas informi nian legantaron, ke "Dolly" Dean, Esperantistino dum 30 jaroj, komitatano kaj bibliotekisto de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio, mortis en Perth en majo. Ni esperas publikigi nekrologon en nia venonta eldono.**

● **ADELAJDO:** Je 10-a de aprilo ni diskutis gramatikajn aferojn de Esperanto. Speciala kunveno okazis je 26-a de aprilo en la hejmo de Ges-roj Felby, por bonveni A.E.A.-sekretariinon Marj Ellyard. Nia gasto rakontis al ni multon pri la pasinta aŭstralia kongreso en Kanbero.

Ankaŭ ĉe la klubkunveno de la 8-a de majo ni diskutis gramatikaĵojn. Kun bedaŭro ni devis akcepti la rezignon de Neill Hart, kiu venis al la konkludo, ke li estas tro maljuna por lerni Esperanton. Ni esprimis al Neill nian sinceran dankon pro la multaj horoj de bona muziko

kaj ŝercado, kiun li provizis dum niaj klubvesperoj. Car Neill estis nia kasisto, ni devis elekti alian. Prezidanto George Clarke konsentis transpreni tiun postenon.  
—BOB FELBY.

● **KANBERO:** Klubanoj kunvenis je 2-a de aprilo en la hejmo de la Prezidanto por rigardi vidbendon kaj filmon pri la 24-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso.

La vidbendo, farita de Tom Elliott, rememorigis la ĉefpunktojn de la Kongreso, inkluzive de la teatraĵo "Diplomatia Dilemo", prezentita de la Kanbera Klubo. La filmo, farita de Ralph Harry, montris precipe la ekskursojn al Cockington Green, la Nacia Sportejo, la Botanikaj Ĝardenoj kaj Lago Burley Griffin.

Dum la speciala kunveno en majo membroj devis rakonti anekdotojn. Ankaŭ oni kunmetis kaj pinglis 3 20 ekzemplerojn de la AEA-Adresaro.

● **SIDNEJO:** Margaret Chaldecott, 16/4, prezentis du artikolojn el la korea ĵurnalo "La Espero". Ŝi distranĉis la artikolojn laŭ paragrafoj; sciante nur la temojn la ĉestantoj devis decidi kiu estas la unua paragrafo kaj legi ĝin kaj aliaj legis la 2-an, 3-an ktp. paragrafojn. Interesa ekzerco.

Je 30-a de aprilo Tom Elliott prezentis pli da eroj el la Kanbera kongreso, fari-taj per vidbendo. Ni, kiuj ne povis ĉeesti, tre ĝuis la agojn de Jim D'imo kaj de aliaj kongresanoj.

Je 7-a de majo M. Chaldecott strebis prezenti la ideon de "Taiĉi", la ĉinan korpekzercadon; ĝis nun ŝi ne eltrovis ĉu la muskoloj de la partoprenantoj ĉesis "grumbli".

Je 14-a de majo Kitty Gassner prezentis eseon pri la franca pensisto Coue. Semajnon poste, Tom Elliott devis ĉiun el ni paroli. Li volas scii kio estas nuntempe la plej grava manko en la mondo. Mono, honesteco amo, fido estis proponitaj

Je 28-a de majo Jim Harwood parolis pri la ludiloj de plenkreskuloj, kiuj aĉetas komputilojn. Li ankaŭ montris la simplajn kalkulilojn de la orientuloj, la abakojn

Je 4-a de junio ni plue diskutis la vortaron de aŭstraliaj vortoj kaj frazoj, ellaboritan dum la somera lernejo en

Armidale. Ni havis la plezuron bonvenigi inter ni vizitanton el Svislando, Jean Waldvogel.  
—M. Chaldecott.

● **MANLY:** Je 19/3 Profesoro R. G. Robertson parolis pri Esperanto al la "Probus"-klubo en Sidnejo; je 11/4 al la "St. Ives Lions" Club; je 12/4 al "Eastwood Public School Special Interest Group". Post la laste menciita parolado Robbi kaj Katie Wright prezentis al la infanoj du-lingvan skeĉon verkitan de Helen Stone.

En la Vespera Lernejo, dum la unua trimestro, ĉeestis meznombre 17 ĉiumarde. Dum la lasta vespero ĉiu kursano kontribuis eron al la programo. En aliaj kursoj en nia regiono sume ĉeestis 15.

Dum la lernejaj ferioj kursanoj renkontiĝis de tempo al tempo en la hejmoj de membroj. Je 8/5 okazis speciala vespero en la hejmo de Bettie kaj Eric Hart, kiuj bonvenigis Manly kaj Sidnejaj klubanoj al festo okaze de la 36-a datreveno de sia geedziĝo. Ĉeestis 20.

Mac Le Fevre vizitis Sidnejon por prezidi ĉe specialaj kunvenoj de kvin Tasmanajaj Parlamentanoj. Li pasigis la vesperojn en Esperanto-rondoj: 8/5 ĉe Bettie kaj Eric Hart; 9/5 ĉe Bess kaj Les Scott; 10/5 ĉe Rita Dunbar. En ĉiu vespero ni bonege manĝis kaj ĝuis la kuneston kun Mac kaj aliaj esperantistoj.  
—Marjorie Duncan.

● **BRISBANO:** La 26-an de aprilo okazis renkontiĝo inter la estro de la Kongresa Fako de Qantas kaj Trevor Steele kaj Ray Ross. Qantas promesis du senpagajn vojaĝojn al Vankuvero (1984), Frankfurto (Aŭgsburgo) 1985, Pekino 1986, Frankfurto (Varsovio) 1987. Plus, ili subtenos la Kongreson per mondonacoj kontraŭ reklamado kaj varbado de turistoj kaj delegitoj; ankaŭ kie estas oficejo de Qantas eksterlande, ili portos senpage dokumentojn, broŝurojn kaj helpos pri distribuado. Estis la intenco, ke Trevor Steele kaj Ray Ross iros al Vankuvero, sed ĉar Trevor ne ricevis forpermeson de la Eduka Departamento, Ray Ross kaj Jim D'imo flugos je 7-a julio al Vankuvero.

Niaj du reprezentantoj kunlaboros kun la LKK en Vankuvero antaŭ kaj dum la 68-a Universala Kongreso por akiri sperton rilate al ĉiuj aspektoj de kongres-organizado.

Plue, la Kvinlanda Turista Korporacio, la Brisbana Oficejo por Vizitantoj kaj Kongresoj forte subtenos la Kongreskomitaton, rilate al broŝuroj, loĝejoj, ekskursarangoj kaj per provizo de reklam-filmoj pri Brisbano. — R.R.

● **TOOWOOMBA:** Ĉeestis nian majan kunsidon gesinjoroj Dimo. Jim Dimo montris kaj klarigis lumbildojn pri sia vojaĝo tra Eŭropo. Je 28-a de majo membroj kunvenis en la hejmo de S-ino Stower por vidi la vidbendon pri la Aŭstralia Kongreso en Kanbero.

### LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1984-85

|  |           |
|--|-----------|
| Antaŭe raportita .....                     | \$183     |
| S-ro Lucien Four, Sydney .....             | 10        |
| S-ro Malcolm Ross, Manly .....             | 15        |
| <b>S-ro W. Chandler, Sydney .....</b>      | <b>25</b> |
| S-ro D. Mason, Mansfield, Vik. ....        | 5         |
| S-ro C. Dunstan, Brisbane .....            | 5         |
| S-ino Jean Lehane, Toowoomba ..            | 10        |
| S-ino S. Sobey .....                       | 5         |
| S-ro Ilja Slavoff, Melbourne .....         | 10        |
| F-ino Brenda Birkett, Kanbero ..           | 10        |
| S-ino M. Eatt, Perth .....                 | 5         |
| F-ino Hertha Mueller, Sydney ....          | 10        |
| S-ino D. Sinclair, Sundale (Q.) ..         | 20        |
| S-ro N. Collier, Buderim (Q.) .....        | 10        |
| "Anonima" Melbourne .....                  | 10        |
| S-ino M. Chaldecott, Sydney .....          | 10        |
| S-ro Ralph Harry, Canberra .....           | 20        |
| S-ino G. Phillips, Brisbane .....          | 5         |
| S-ro D. McQueen, Warragul (V.) ..          | 10        |
| S-ro W. Leah, Curlewis, NSW .....          | 10        |
| S-ino R. Mason, Brisbane .....             | 10        |
| S-ino W. Greenhalgh, Brisbane .....        | 10        |
| S-ro J. R. Harry, Melbourne .....          | 25        |
| Ges-roj L. Scott, Manly .....              | 10        |
| S-ino A. Pal'ng, Melbourne .....           | 10        |
| S-ino K. Schwerin, Sydney .....            | 25        |
| S-ino A. Eden .....                        | 5         |
| S-ino Vera Payne, Perth .....              | 5         |
| S-ino L. Fr'denbergs, Melbourne ..         | 5         |
| S-ro V. Timmins, Sydney .....              | 50        |
| F-ino M. Straker, Sydney .....             | 20        |
| S-ro F. McDonnell, Mt. Hagen,<br>PNG ..... | 20        |
| S-ro Marcel Leereveld, Melb. ....          | 10        |
| S-ino Marjorie Duncan, Manly ..            | 25        |
|  | <hr/>     |
|  | \$618     |

## NEKROLOGO

**HERBERT GEORGE ONN** mortis 12-an de marto, 1984 en Adelajdo. Li naskiĝis en Melburno je 29-a de januaro, 1902.

Dum sia junaĝo li loĝis en Hobarto: Li laboris multe sursipe. En 1921 li edziĝis en Port Pirie kaj komencis labori en ferfandejo kiel fakestro de kemio ĝis sia emeritiĝo en 1964. Laŭ la diro de lia edzino Alice, li jam estis bona esperantisto kiam ŝi konatiĝis kun li en 1925.

Post sia emeritiĝo li loĝis en Adelajdo kaj estis malavara subtenanto de la Sud-Aŭstralia Esperanto-Societo.

Al liaj edzino, Alice, filo, Trevor kaj kvin fratoj A.E.A. esprimas sincerajn kondolencojn.

## RECENZOJ

**SINDEFENDOLOGIAJ STUDOJ**, redaktis: Ing. Jindrich Novak, eldonis: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1983 (Jilska 10, 110 00 Praha 1, Ĉeĥoslovakio. Prezo: 20 ĉeĥaj kronoj (proks. A\$1.50, plus af-ranko) aŭ menu de AEA-Libro-Servo.

De post la dua mondmilito intereso kreskis inter okcidentuloj pri ekzotikaj el Azio sufiĉe diversaj, kiel jogo, akupunkturo, transcenda meditado, karateo, judo, "tai ĝi" kaj eĉ metempsikozo. Nu, ofte la teoria bazo de tiaj aferoj ŝajnas erara, laŭ okcidenta scienco, ekzemple en "tai ĝi" la "ĉi" devas esti enspirita en la "tan tien"-on, kiu situas en la ventro sub la umbiliko, kiel tiamaniere oni "malaltigas la mascentron".

Ĉiu sciencisto aŭ inĝeniero bone scias, ke ne eblas enspiri en la ventron kaj tiel malaltigi la mascentron, kaj simile oni povas argumenti pri la bazoj de jogo aŭ akupunkturo.

Lastatempe inĝenieroj el Ĉeĥoslovakio studas la bazon de la sporta judo, kaj oni devas gratuli ilin pro la tute racia klarigo per grafikoj kaj matematiko. Spaco mankas por trakti ĉiujn bonegajn erojn de ilia libreto, sed aparte menciindaj estas diskutoj pri "svepoĵeto" kaj "repo-ĵeto" (angle "sweeping" and "reaping" throws.)

Oni rajtas esperi, ke aliaj verkistoj same lertaj troviĝos por verki similajn sciencajn artikolojn pri aliaj orientaj importoj. Tamen mi bedaŭras, ke la titolo

ne estas tute ĝusta, ĉar temas pri "evertoj" en la sporta ĵudo. En sindefendo oni evitas evertojn preferante la fraĵojn de karateo.

(Glosa—"everto" estas batalago per kiu oni ĵetas kontraŭulon surteren)

— R. G. ROBERTSON.

**UNIVERSALA LIGO — Memoriga Libreto:** Rilate al la 40-a datreveno de sia formiĝo en 1942, U.L. aranĝis eldonon de "LA MIRAKLA INSULO BARATARIO". Esperantistoj konscias la heroan starigon de U.L. dum la Nazia regado en Nederlando. Pro diversaj problemoj, ne fariĝis havebla ĉi tiu memoriga libreto ĝis post 1982. Alloga kaj pensiga, ĝi pritraktas ekonomikon en tre originala maniero. Ĉefa temo estas nia monsisistemo, kiu instigas priskribadon en U.L.-aj cirkuleroj. Tial, UL-anoj elektis germanan verkaĵon de reformema ekonomikisto, Silvio Gesell (1862-1930).

En sia antaŭparolo, la tradukinto, Petro Rulofido, informas pri la multflanka kariero de Gesell. La eminentega angla ekonomikisto, John Maynard Keynes trafe profetis "ke la estonto lernos pli de la spirito de Gesell ol tiu de Marks".

Baratario troviĝas "je la sama latitudo kiel Utopio". Ekde 1612, supozeble 500 hispanaj familioj estis izolitaj tie. komence, la baratarianoj praktikis komunisman ekonomion". Fidela kronikisto raportis iliajn postajn ekonomiajn aranĝojn. Bezonante monsisistemon, ili improviziis.

Oni emisiis bankbiletojn kun terpomoj kiel kovro. Imagu bankon kies granda kelo estas plena de terpomoj, kiuj fine putriĝas! Tio kondukis al grava konsidero. Ĉu fakte, varoj en la merkato ne plej bone servus kiel banka kovro? Progreseme, la insulanoj decidis uzi nuksojn de aparta pino kiel monon. Laŭpeze, kontentigaj rezultoj sekvis. Tamen, posta uzado laŭvolumene kondukis al doloriga socia disfalo. Kia stranga! Pri la lerta klarigo, mi ne antaŭu vian interesigon.

Ĉu mono taŭgas en sia interŝanĝila rolo, sed malfunkcias kiel valorkonservilo? "Jes" diras Gesell. Laŭ li, nia monsisistemo kaj ĝia intereza ŝarĝo, kune kun kondiĉoj de terproprietaj kaj politikaj, kondukas al maljusteco kaj mizerio. Eĉ Moseo, kaj la spartano Likurgo, ŝajne

interkonsentis! En la libreto, humana instruisto,, Diego Martinez, kvazaŭ parolas por Gesell. Okazis katastrofo ĉar kuninsulanoj ĉesis akcepti lian konsilon. Aliflanke, pro ties idealogia vidpunkto, ĝojis Carlos Marques kiam okazis socia disfalo. Multe profitante, la avida ekspluatinto, Sansom Carracco, manipulis kuninsulanajn konfuziĝojn. Trafas leganton, ke tiom da aktiveco troviĝas en nur 24 paĝoj. Argumentoj abundas, komunikante ideojn per metodo de demokratia debato sur Baratario. Reakciaj komentoj notinde kontribuas al instrua dialogo en la ekonomika kampo.

"La Mirakla Insulo Baratario" kostas 5 stelojn, Mendu ĉe Universala Ligo, Vosseveldlaan 16, NL-3768 GM SOEST, Nederlando, aŭ pere de AEA Libro-Servo.

—David McQueen.

**KURACADO DE ARTERIOSKLEROZO:** Nova tipo de kuracado estis eksperimentita de italaj sciencistoj (kiuj, tamen, laboras en Houston en la usona ŝtato Teksaso) kontraŭ la malsano de la moderna homo, arteriosklerozo.

La kuracado baziĝas sur la injektado en la organismon de proteino, nomita HDL, kiu ĝenerale ne estas sufiĉa ĉe arteriosklerozuloj. Scienca referaĵo pri tio estis prezentita de Profesoro Giancarlo Ghiselli dum internacia kunveno pri kemio kaj biologio. La italaj sciencistoj jam listigis dudekon da aminoacidoj, kiuj produktate sinteze, konsistigas la formulon HDL: la proteino jam donis bonajn rezultojn, ne nur por eviti arteriosklerozon, sed ankaŭ por ĝin retroirigi.

(De Salvo en la Esperanto-emisio de Radio Roma)

#### POR LA DEFENDO DE CIGANOJ:

Estis prezentita al la Komisiono pri Socialaj Demandoj de la Eŭropa Parlamento raporto, kiu pledas la starigon de reguloj por la defendo de Ciganoj Laŭ la statistikoj, en 7 el la landoj de la Eŭropa Komunumo (Francio, Italio, Germanio, Britio, Greklando, Nederlando kaj Belgio) vivas duonmiliono da ciganoj, submetitaj al diskriminado neakordigebla kun la komunaj principoj. La raporto, kiu estos baldaŭ pridiskutata, petas faciligojn por la liverado de legitimitaj instruoj de la infanoj.

(De Salvo en la Esperanto-emisio de Radio Roma).

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Krucio and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 216 (296)

MELBOURNE

Julio Aŭgusto, 1984

## NI AŬDACU!

"La antaŭa moro cedas al la nova", kaj post kelkaj tagoj mi transdonos la prezidantecon al Mac LeFevre.

Mi deziras danki al ĉiuj membroj pro ilia laboro, en la kluboj kaj societoj, en la federacioj, kaj por A.E.A. dum la pasintaj kvar jaroj. Kune ni faris multon.

Ni ne nur daŭrigis la vivon de la movado, lernante, instruante, informante la publikon. En tiu periodo ni kreis tute novan bazon de rilatoj kun la Registaro, la Parlamentoj, kaj super ĉio kun simpatiantaj ne-registaraj organizaĵoj. Sur tiu kampo, mi certas, ke nia nova Prezidanto havos eĉ pli da sukceso.

Ni ankaŭ aŭdacis inviti U.E.A. okazigi Universalan Kongreson en Brisbano. U.E.A. principe akceptis tiun inviton, kaj espereble decidis fakte elekti Brisbanon por la 73-a en nia lando en 1988. Nia ĉefa devo, tiam, estos subteni la organizan komitaton en Brisbano.

Estos aliaj defioj en la venontaj jaroj. Individuoj devos decidi, ĉu ili faru paŝon antaŭen, kiel instruantoj aŭ kiel ofikanditatoj. Federacioj devos sentime decidi pri la starigo de Esperanto-domoj. La Asocio devos elspezi monon por

novaj aventuroj de eldonado kaj publika informado.

Ni nepre devas aŭdaci! Ĉar nur se ni aŭdacas venos novaj fortoj al la movado, novaj lernantoj, novaj entuziasmuloj. Kaj se la Asocio ne kreskas, ĝi ne estas "movado".

Tial, dankante al miaj kolegoj, la estraranoj, kaj al komisiitoj kaj kunlaborantoj mi rekomendas al vi la vortojn de Zamenhof:

"Ĉiu kiu ne faris al si en la fino de ĉiu monato la demandon 'Kiom da novaj amikoj mi alportis al la afero', tiu ne povas sin nomi amiko-laboranto de nia afero, se li eĉ tute bone ellernis la lingvon".

ANTAŬEN AL MIL MEMBROJ!

—Ralph Harry.

## LA BIBLIOTEKO DE A.E.A.

### DONACIOJ

La Biblioteko ricevis en la pasinta duonjaro valorajn donacojn de libroj, periodaĵoj kaj dokumentoj.

Dum la 24-a Kongreso alvenis dudeko da libroj el la periodo 1906-1913, el la libraro de George Collingridge, kiujn prizorgis S-ro V. J. Timmins. Multajn dankojn al li.

Ankaŭ Ken Linton donacis al la Biblioteko valorajn librojn, el kiuj kelkaj originale apartenis al Cedric Cowling. Ili ankaŭ estas el la frua periodo de Esperanto.

Volo Gueltling donacis librojn, broŝurojn kaj ekzemplerojn de gazetoj, kiuj ebligis la bindadon de kompletoj de "Esperanto".

Ni ricevis eldonaĵojn ankaŭ de D-ro K. Bowling kaj Ann Hearn, kaj de la familio Wybenga.

Ni dankas al aliaj, kiuj kunportis librojn dum la Kongreso, sed kies nomojn ni ne scias.

### MEMORAĴO AL SAM ELLYARD

La Asocio aĉetis taŭgan ŝrankon/bretaron, kiu portos ŝildon memore al S-ro S. W. G. Ellyard, kasisto de A.E.A. 1982-1984.

N dankas al ĉiuj, kiuj faris donacon. La kosto de la ŝranko estis iom pli alta ol la sumo donacita, kaj pli da donacoj

estus bonvenaj. La Asocio tamen decidis aĉeti la ŝrankon, ĉar la Biblioteko konstante kreskas !

### KOPIADO DE GAZETOJ KAJ DOKUMENTOJ.

La Biblioteko pretas fari kopiojn de dokumentoj kaj gazetoj por organizaĵoj kaj membroj, kiuj volas pagi la koston. Ĉar estas malfacile kopii niajn binditajn kompletojn, ni kolektas duan ne-binditan kompletan de "Suda Kruco", "La Rondo" kaj "Australian Esperantist". Se vi posedas ekzemplerojn de "Suda Kruco" kaj "la Rondo" bonvolu informi nin, por ke ni povu pruntericevi, se necese. Kompreneble ni ankaŭ dankeme ricevus donacojn !

### NI DANKU AL A.I.L.A. KAJ K.E.K.

Ni dankas al la Instituto de Internaciaj Aferoj, en kies Biblioteko la nia loĝas, kaj al la membroj de Kanbera Esperanto-Klubo, kiuj laboras ĉe 200 "personajn horojn" kiel lupagoj.

## LA TRIA PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO

La 14-an de julio, 1984, Portland, en la ŝtato Oregon, Usono, urbo nomata "La Rozurbo", bonvenigis ĉ. 140 Esperantistojn el 12 landoj por la 3-a Pacifika Esperanto-Kongreso. La simbolo de la Kongreso — rozo sur verda stelo — indikis la diversajn ejojn en la Universitato de Portland, konata katolika universitato, fondita en 1901, kaj apud la ĉefa tavolo de la Universitato estis granda tabulo, kiu bonvenigis la Esperanto-Kongreson.

La 15-an de julio, post ekumena Diservo en la loĝejo Mehling, okazis la Solena Malfermo, kun salutoj de la landaj reprezentantoj (Usono, Kanado, Ĉinio, Japanio, Koreujo, Nov-Zelando kaj Aŭstralio). Marj Ellyard salutis nome de A.E.A. Yosimi Umeda, Vic-Prezidanto de U.E.A. legis salutojn ankaŭ de la sekretario de U.E.A., kaj de Herbert Koppel, Redaktoro de "Australian Esperantist" kaj organizinto de la unua Pacifika Kongreso en Melburno en 1976.

Ralph Harv, Prezidanto de A.E.A., elektitis Prezidanto de la Kongreso kaj prelegis pri "Esperanto, Komuna Lingvo

por Multkultura Komunumo en la Pacifiko". Li substrekis la bezonon de justa internacia komunumo, kiu povus konservi la internacian pacon kaj sekurecon sen grandega elspezo por armiloj. Tia komunumo, li diris, bezonas bazon de reciproka kompreno, kiun oni povas atingi nur per komuna lingvo. Oni povus komenci en la Pacifika regiono, kie estas kultura diverseco, sed kiu havas komunajn ekonomian kaj aliajn interesojn, kie komuna vivo ekonomia, sporta, kaj kultura jam komenciĝis. Komuna lingvo helpus pri la starigo de tia komunumo kaj ankaŭ pri ties funkciado.

La 6 reprezentantoj el Ĉinio raportis, ke, post la 2-a Pacifika Kongreso en Vankuvero, Esperanto estas ekinstruata en pli da universitatoj kaj lernejoj kaj ke 60,000 ĉinoj, komencis lerni la lingvon. Ili urĝis ĉiujn partoprenantojn registri sin por la Universala Kongreso en Pekino en 1986. Ili ankaŭ proponis, ke oni strebu vigligi la Esperantistojn de Hongkongo kaj Singaporo, kaj ke Aŭstralio kaj Nov-Zelando stimulu lernadon en la sud-pacifikaj insuloj.

Partoprenantoj el Koreujo raportis bonan progreson, ekzemple la eldonadon de "La Espero el Koreujo". Ili anoncis, ke la Korea Esperanto-Asocio planas festivalon en 1986 en Seulo, kiun vojaĝantoj al kaj el Pekino povos viziti.

Japanaj delegitoj raportis siajn preparojn por 1987, inklude de kongreso en oktobro de tiu jaro (post la UK en Varsovio).

La Usonanoj prezentis duonhoran filmon por televido, kiun ili ĵus finis, kun la kanadanoj. Stelrolas Steve Allen, populara usona intervjuisto, al kiu parolas Vilĉjo Hamon de Kalifornio.. La filmo estos havebla post kelkaj monatoj por aliaj angleparolantaj landoj.

Aŭstralianoj raportis pri rilatoj kun la registaroj kaj kun ne-registaraj organizaĵoj, la kurso en Mt. Lawley kaj la eldono de "Sur la Bordo", kiu estis aĉetebla en la libro-servo de la Kongreso. Kompetente organizita. La Kongreso bonvenigis la decidon de UEA, prinсипе, organizi la UK en Brisbano en 1988.

Nov-Zelandano Fred Wood indikis, ke NZEA konsideras sugeston, ke NZEA organizu la kvaran pacifikan kongreson en Nov-Zelando antaŭ la UK en Brisbane. Koreanoj informis, ke ili ankaŭ studas la eblecon inviti la Kongreson. Aferkunsido decidis lasi la iniciaton al la koncernaj landaj asocioj, sed S-ro J. Deer de Usono konservas arhivon. La celo intertempe devas esti ebligi kun-

ordigon de agado, eldonaĵoj, vizitantoj ktp. per intersanĝo de landaj gazetoj, kaj per korespondado.

La kongresan bankendon distris Gonzalo Bermudez de Kolombio, kaj Alberta Casey, la kantistino el Sandiego.

Ekskursoj inkludis viziton al la Monto St. Helens, kiu malrapide reverdiĝas post la erupcio de 1980, kiam ĝi perdis 1300 futojn (400 metrojn). La 19-an de julio ĉiuj ekkaravanis al Vankuvero, kun tranokto en Seattle.

—R.L.H.  
(Samtempe kaj samloke okazis ankaŭ la 21-a Kongreso de la Esperanto-Ligo de Norda Ameriko)

Aldone ni ankaŭ ricevis raporton de Arthur Cocking. Li diris:

Ni Aŭstralianoj tre fieris. Ni legis liston de la Estraro. Jen, kiel unua estis Ralph Harry, Prezidanto kaj tuj poste Herbert Koppel, konsilanto. Ralph ĝojigis la aŭdantaron per bonhumora, signifoplena parolado.

En la listo de ĉeestantoj estis 10 Aŭstralianoj: Ralph Harry, Sylvia Burkitt, Arthur kaj Phillis Cocking, Marjorie Ellyard, Bettie Hart, Terrey Metherall, Bess kaj Les Scott kaj Myrtle Straker.

La vetero kaj la aranĝoj estis perfektaj kaj la tuta okazo ĝuinda. Elkorajn dankojn kaj gratulojn al niaj helpemaj, ĉiam ridetantaj gastigantoj. Pri la estonteco de la Pacifikaj Kongresoj oni diskutadis, sed ne atingis firman decidon. Jes, ni havos alian, sed kiam kaj kie ni ne scias, sed ni ja havos alian!

## VANKUVERO — NOVA VENKO

### 69-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Denove UEA okazigis sukcesan kongreson ekster Eŭropo. La 69-a Universala Kongreso, la unua en Kanado kaj nur la 4-a sur la nordamerika kontinento, malfermiĝis en la Universitato de Brita Kolumbio, dimanĉon, la 22-an de julio 1984. 800 registris sin (el 43 landoj) kaj ĉ. 650 fakte partoprenis. Kvankam ĝi estis la plej malgranda post la Dua Mondmilito, ĝi estis tamen altnivela kaj ege ĝuebla.

Bonvenigis la Prezidanto de L.K.K., Wallace du Temple. Salutis la kongreson grupo el la "Infana Kongreso" kaj Judith Bormann Germanio), kiu raportis pri la Kongreso de TEJO en Swan-

wick, Anglio, en kiu partoprenis 300 junuloj. La Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko salutis pere de 9-jara ĉarmulino, Sara Sue Jones, kiu poste ludis la violonon en la Internacia Koncerto.

Nome de A.E.A. salutis ties Prezidanto, Ralph Harry, kiu informis, ke en 1988 Aŭstralio celebros Jubileon. Antaŭ 200 jaroj estis en la kontinento multaj kanguruoj, sed nur kelkmil homoj, kiuj havis interesajn lingvojn kaj arton. Tiam venis la britoj kaj Aŭstralio fariĝis unulingva kontinento. Sed post 1945 enfluis milionoj da homoj el ĉiuj mondpartoj kaj Esperantistoj, kiuj venos al Brisbano en 1988 trovos multkulturan

popolon. Li invitis ĉiujn ĝui novan sperton kiam UEA kongresos la unuan fojon en la 5-a kontinento.

Plaudo kaj ridado respogulis la feliĉan familian etoson dum la Interkona Vespere la antaŭan tagon, kiam multaj kongresanoj ĝuis komunan kantadon kaj dancadon kun la muziko de Jim Dimo. Jim kaj Ray Ross, membroj de la L.K.K. por la 73-a U.K. en Brisbano, laboregis en Vankuvero kun la kanadanoj. Ili ne nur lernis multon, sed faris utilajn kontaktojn. Tiujn intensigis Les Scott, kiu anstataŭis Ken Linton en la komitato de UEA, kaj Ralph Harry, kiu kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA rilatas kun la Prezidanto kaj Estraro de UEA. Ankaŭ helpis AEA-Sekretario Marj Ellyard, kaj la aliaj 9 Aŭstralianoj.

En la Solena Inaŭguro, 23-an de julio, kiun alparolis la Vic-Guberniestro de Brita Kolumbio, kaj la Ministro pri Lingvaj Aferoj, partoprenis la Aŭstralia General-Konsulo en Vankuvero, S-ro John N. McFarlane, kiu diris, ke kvankam la Kongreso estas lia unua kontakto kun Esperanto, ĝi ne estos la nura. La 26-an de julio li vizitis la Libro-Servon kun sia edzino Yolande, kaj aĉetis lernolibron. Oni prezentis al ili la duan eldonon de "La Eta Princo", ĵus eldonitan de K.E.A. (S-ino McFarlane estas francino). Poste Ge-sinjoroj McFarlane partoprenis en akcepto en la "rezidejo" de la aŭstralia teamo. Venis la Prezidanto de UEA, la Estraranoj, kaj la Redaktoro de "Heroldo de Esperanto", S-ino Ada Fighiera-Sikorska, kiuj ĝuis la aŭstraliajn vinojn provizitajn de la General-Konsulo.

La Estraro rekonfirmis sian deziron, principe, okazigi la 73-an U.K. en Brisbano, rajtigis AEA intertrakti kun fluglinioj kaj aliaj instancoj en la nomo de UEA, kaj promesis ke, se AEA sukcesos plenumi la financajn kondiĉojn, fina decido povos esti anoncita en Aŭgsburgo. En 1986 la U.K. estos en Pekino kaj en 1987 la jubilea kongreso denove okazos en Varsovio.

La programo de la Kongreso estis laŭ tradicio varia. La Prezidanto, Gregoire Maertens, en malferma prelego, substrekis la fakton, ke UEA en sia laboro celas kontinuecon, por ke komencita laboro daŭru. Li notis, ke la membraro de UEA kreskas, same kiel la nombro da landaj asocioj. Li atentigis, ke multe pli

da libroj nun eldoniĝas ol en la pasinteco. Tion indikis la impona stoko de la Libro-Servo. Inter ili troviĝis "Sur la Bordo", eldonita de AEA de kiu kelkaj ekzempleroj vendiĝis dum la kongreso. S-ro Umeda kaj S-ino Isobe de Japanio informis, ke post recenzo far Umeda la libro estas vendata en Japanio.

S-ro Maertens raportis pri preparado de UEA por la Jubileo en 1987. Li diris, ke UEA deziras kunlabori kun aliaj E-organizaĵoj, sed nur kondiĉe, ke UEA prezidu. Kelkaj organizaĵoj ne akceptas tiun kondiĉon.

La kongresan temon — "Lingvaj Minoritatoj, ĉu nur nacia fenomeno" — enkondukis en la malfermo D-ro Jonathan Pool kaj en la inaŭguro John Wells. Oni diskutis kun fakaj ne-esperantistoj kaj, en Generala Kunsido, analizis la diferencojn inter naciaj kaj internaciaj lingvaj minoritatoj.

La profesoroj de la Internacia Kongresa Universitato inkludis Juan Regulo Perez (de "Stafeto"). Li diris private, ke, kvankam antologioj de unulanda literaturo povas esti tro naciisma, eĉ ŝovinisma, li tamen bonvenigas la decidon de Aŭstralio eldoni antologion, ĉar multaj kiuj tute ne konas aŭstraliajn aŭtorojn ŝatos gustumi iliajn verkojn.

En la kadro de la 7-a Esperantolog'a Konferenco prelegis D-ro J. C. Wells pri Lingvoj de Norda Ameriko, Minoritataj Lingvoj de Eŭropo, de Afriko kaj de Aŭstralio. Li informis, ke fine de la 18-a Jarcento, la loĝantoj de Aŭstralio estis ĉ. 600 aboriginaj triboj (el po ĝis 500 homoj), ĉiu kun propra dialekto. Tio estis do proks. 200 lingvoj. Nun re tas malpli ol 50.000 pursangaj aborigenoj. el kiuj eble tri kvaronoj iom scias aborigenan lingvon.

Ekumena Diservo okazis je 22/7 en "Unuigita" Preĝejo, kie Pastro Kevin Laughery el Usono celebris la Sanktan Meson. Arturo Cocking, Bess Scott, Myrtle Straker kaj Ralph Harry estis inter la partoprenantoj. La Arta Programo estis bona, kvankam iom malpli varia kaj ampleksa ol en, ekzemple, Budapeŝto. En la Nacia Vespere estis Kvadrtdancado, ind'ana danc-grupo, virina kvarteto, vira "barbireja" kvarteto, franc-kanada muzikgrupo kaj bonega franc-kanada danctrupa. En la Internacia Vespere violonludis Sue Jones, kantis Alberta Casey de San Diego kaj



deklam's kanadano longan kortuŝan poemon. En la **Bankedo** aperis sinjorino kiu kiel knabino triris veturilon en kiu sidis D-ro Zamenhof.

Inter la fakaj kunvenoj estis aparte interesaj "TEJO prezentas sin", "Agado de landaj asocioj" kaj "Rilatoj kun UN kaj UNESKO". Parolado de Ralph Harry rilate la sperton de AEA pri konsultado kun la registaro kaj ne-registaraj organizaĵoj aperos en "Esperanto" aŭ alia gazeto.

La Komitato akceptis du novajn "kunlaborantajn" fakajn organizaĵojn — Esperantlingva Verkista Asocio (neŭtrala) kaj Mondpaca Esperantista Movado. Oni nomis du novajn anojn de la Honora Patrona Komitato: Paul Rriste, estona lingvo-ciencisto kaj Hujucz, fondinto de "El Popola Ĉinio". Al la Honora Membro aldoniĝis Emmanuel Chicot, gv danto de la laborgrupo ĉe UNESKO, Kiril Drajev (Bulgario), Miyamoto Masao (Japanio), Juan Regulo Perez (Kanariaj Insuloj) kaj Bruno Vogelmann, kiu antaŭenigis "Esperanton en Komercio".

(Laŭ raportoj ricevitaj de Ralph Harry kaj Les Scott)

## "KONSULTU LA KONSILANTON"

"Scivolema" skribas: "Kio estas 'BONA ESPERO'? Ĉu ĝi estas Esperanto-vilaĝo en la regiono 'Cape of Good Hope' de Sud-Afriko?"

Kara 'Scivolema': Nia spertulo pri "Bona Espero" estas Trevor Steele, kiu antaŭ kelkaj jaroj loĝis kaj laboregis tie, do mi sendis vian demandon al li. Jen lia afabla kaj informplena respondo: (Mil dankojn, Trevor)

BONA ESPERO estas bieno-lernejo en Brazilo, 250 km norde de la nacia ĉefurbo Brasília. Ĝi fondiĝis en 1958 kiel esperanto-komunumo dediĉita al la edukado de orfoj kaj senhejmaj geknaboj (kiuj bedaŭrinde abundas en Brazilo). En la fruaj jaroj oni akceptis tie ĉefe knabojn kulpintajn ian krimon, sed la prizorgado ne estis io, pri kio ni fierus. En 1974 alvenis la ital-germana paro, Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, kaj tio ekigis novan epokon en BE Multaj esperantistoj el diversaj landoj kaj brazilanoj (ne ĉiuj esperantistoj) iris kaj iras tien por labori (aŭ foje pigri) dum pli-

malpli longa periodo, sed nur la paro Grattapaglia kaj ia brazila veterano Arturo Vellozo vivas tie konstante.

BE situas 18 km for de la vilaĝo Alto Paraíso. Kiel tiu nomo supozigas, la regiono prezentas la supron de la vasta Brazilia Altebenaĵo, kaj oni dire la vetero "originas" t.e. Ĉiukaze oni vidas fascinantajn nubformiĝojn dum la sesmonata pluvsezono, sed de aprilo ĝis oktobro la lando brunas, kaj oni povus imagi sin esti en iu aŭstralia duondezerto, ĉar la arboj estas malaltaj kaj tordformaj — se ne estus multaj riveretoj. BE havas propran homfaritan "lagon", en kiu eblas naĝi tutjare. La homoj de tiu regiono estas laŭ niaj materiaj kriterioj tre malriĉaj, sed ili fartas multe pli bone ol la loĝantoj de nordorienta Brazilo (la sudo de la lando estas relative riĉa). BE iom memorigas pri mezepoka monaĥejo kiu servis kiel sola edukejo al analfabeta ĉirkaŭaĵo.

M'a edzino Edith kaj mi pasigis la jaron 1977 en BE. Tiutempe oni provizis hejmon kaj edukadon (laŭ la regularo de la ŝtato) al 12-15 gajnboj. Komprenoble ni du ne kapablis instrui per la portugala (tiam faris brazilanoj), sed bonŝance preskaŭ ĉiuj geknaboj sufiĉe bone uzis la IL. Mi formale instruis Esperanton al la pli progresintaj, kaj Edith enkondukis la etulojn, sed fakte ili lernis ĉefe per ĉiutaga uzado. Por doni kelkan ideon pri tiu ĉiutaga vivo, mi faru liston de niaj plej oftaj taskoj. Edith laboris precipe en la domo mem, purigante, bakante, farante fromaĝon, kaj prizorgante la plej junajn intanojn. Mia taskaro estis pli agrabla, plej ofte subĉiela. Mi prizorgis la bovinojn (kaj devis unue konstrui etan melkejon) kaj klopodis elradikiĝi la belaspektan, sed terure venenan fihieron "yerba doce", kiu abundas laŭ la riveretoj; malgraŭ ĉiuj penoj ni perdis du el niaj plej bonaj bovinoj. Krom tio mi helpis ĉe multspecaj konstru-laboroj (ponto, bariloj, aŭtovojetoj); katalogis la surprize grandan bibliotekon, kaj fine de la jaro tradukis libreton el la portugala en Esperanton (tiutempe oni esperis establi eldonejon — evidente tiu revo ne realiĝis).

La manko de polucio kaj la ĝenerale trankvila vivritmo de BE tre altiras, kaj foie la amaskomunikiloj aplikas la epiteton "paradizo" al tiu "insulo de paco

kaj amo" (titolo de televido-elsendo pri BE). Multaj homoj vizitas la paradizon, eble kredante, ke ilia nura ĉeesto tiel ŝojgas la komunumon, ke oni ne atendas de ili laboron aŭ financon helpon. Tiu sinindulga romantikismo estas vera problemo por homgrupo, kiu devas laboregi por sin vivteni sur bieno, kiu vendas nenion kaj dependas de mono kaj materialo, precipe de germanaj esperantistoj. Sed esperantistoj, kiuj pretas labori estas tre bonvenaj: kaj mi ne hezitas diri, ke 1977 estis la plej spertoriĉa jaro de mia vivo.

—Trevor Steele.

Kiel vi nun scias, "Bona Espero"-komunumo estas en Sud-Ameriko. Sed vi preskaŭ pravis. "Bona Espero" ankaŭ estas en Sud-Afriko! Ĝi estas la nomo de la oficiala gazeto de la esperantistoj en la regiono "Cape of Good Hope".

Konsilanto.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **ADELAJDO:** Okazis, en kunveno je 12-a de junio, interesa diskuto pri blasfemaj kaj sakrajaj en Esperanto. Unu diskutinto opiniis, ke oni regas la lingvon nur kiam oni scias sakri.

Membro de nia societo, Lloyd Noble, prezentis sian pupteatraĵon en "Thornodon Park Primary School". Li sukcese informadis tie pri Esperanto kaj tiu lernejo dungis Bob Felby kiel instruiston de Esperanto por du horoj ĉiuvendre. Li gvidas 2 unuhorajn klasojn kaj entute partoprenas 17 gelnantojn.

Je 10-a de julio okazis kunveno, dum kiu ni vidis lumbildojn pri nia pasinta Zamenhof-Festo. — Bob Felby.

● **SIDNEJO:** Dum junio niaj kunvenoj malgrandiĝis, pro feria tago kaj pro la malvarma vetero. Do, ni ne sekvis niain kutimajn programojn, sed ni diskutis inter ni diversajn temojn, ekzemple, el la libro "La lingva renco de Esperanto" de Atanasov, ĉu ni bonvenigu neologismojn. Ni parolis pri la stilo de nia preferata domo kaj pri tio, kion ni ne deziras havi en domoj, kiel ekzemple tiun stultaŭn

de travidebla vitro, kiun ne pensanta laboristo instalas en ies banĉambro. Du lernantoj venas semaje.

—M. CHALDECOTT.

● **MANLY** Malgraŭ la malvarma vetero kaj la foriro eksterlanden de pluraj el niaj membroj, la klasoj ĉe la Eduka Centro bone daŭras. Marjorie Duncan forflugis al Anglujo post kiam ŝi ricevis la malfeliĉan novaĵon pri la forpaso de la patrino, kaj Betty Cleminson, Arthur Cocking, Bess kaj Les Scott ĉeestas la Universalan Kongreson en Vankuvero.

Helen Stone instruas la klason de Betty dum ŝia foresto, ŝi ankaŭ prizorgas la sekretariajn aferojn. Robby Robertson anstataŭas Marjorie kiel instruisto de la altrada grupo.

—EUNICE GRAHAM

● **NEKROLOGO:** Fine de februaro mortis en Manly unu el la originalaj membroj de la "Manly"-E-Klubo, **S-ino Ruth CARRUTHERS**. Ĉiam amika, ĉiam ĉarma kaj gastama ŝi ofte gastigis nin en sia hejmo, kie okazis kunvenoj kaj Kristnaskaj Festoj. Ŝi multe ŝatis paroli pri diversaj aferoj, sed post kiam atakis ŝin apopleksio, ŝi ne plu povis paroli. Estis terure vidi la angoron, kiam ŝi vane provis paroli eĉ unu etan vorton.

Dormu pace, kara amikino.

—Betty Cleminson.

● **BATHURST, NSK.** Krom la 5-minutaj radio-programoj, kiujn Stacio 2MCE-FM jam elsendas dum pli ol 4 jaroj, je lundo 7.45 ptm, oni povas aŭdi 15-minutajn programojn de Esperanto-Muziko. Je 20-a aŭgusto, "Jen Nia Mondo" anstataŭos la muzikajn programojn. La program-libro jam enhavas 4-paĝan suplementon ĉiumonate de la dialogoj kaj mallongaj notoj de kvar lecionoj de "Jen Nia Mondo". —Roger Springer.

● **BRISBANO:** La kvar klasoj ĉiun lundvesperon daŭras en la klubejo. Ŝajnas ankaŭ, ke nova klaso por komencantoj bonvenigos ĉ. 10 anojn, laŭ ĝisdataj aranĝoj. Ĉiun sabaton, posttagmeze, la kutima grupo kunvenas — monate estas por LKK-aj aferoj kaj alie estas aŭ konversacio aŭ kantado.

Bedaŭrinde ni devis adiaŭi al Beryl Hilsdon, kiu translokiĝos al Warwick, sed sendube en la estonteco estos nova grupo en tiu urbo. La 18-an de junio Ray Ross

estis gastparolanto en Ipswich, dum la monata kunveno de loka branĉo de rROBUS. — RAY ROSS.

● **ESPERANTO-JUBILEO:** La UEA-Delegito por Hobarto, **S-ano Eino Loorits**, je 4-a de aŭgusto, 1984, fariĝis 75-jara. Gratulojn al li.

S-ano Eino Loorits naskiĝis en Estonio, kie li lernis Esperanton kaj en 1932 li faris Esperanto-prelejojn en Eŭropo. Post la milito, en 1949, li enmigris Aŭstralion kiel rifuĝinto.

Lia edzino Erika gajnis en julio, 1983, konkurson de Televida Stacio TVT-6 Hobarto. Sia premio estis 2 biletoj por ŝip-krozado sur la ŝipo "Princess Mahsuri". En marto/aprilo, 1984, ges-roj Loorits vizitis per la ŝipo "Princess Mahsuri" la havenojn Vila, Suva kaj Noumea dum 13-taga interese ga krozado.

**CITY TATTERSALLS CLUB, SYDNEY**

**"ESPERANTO" DINING ROOM**

Laŭ la peto de Prezidanto Ralph Harry, mi vizitis "City Tattersalls" Klubon en Sidnejo por demandi ĉu oni povas diri al mi la originon de la nomo "Esperanto", kiel nomiĝas ties manĝo-ĉambro sur la unua etaĝo.

Ĉi tiu peto okazis, ĉar S-ro Harry ĉeestis "City Tattersalls"-kurĉevalo-kunveno en kie unu el la ĉevaloj nomiĝis "Esperanto". Kiam li demandis la kialon, oni ne povis diri al li, sed menciis ke la Klubo havas manĝo-ĉambron kun tiu nomo.

La Proviant-Direktorino de la manĝo-ĉambro, S-ino Smith, edzino de S-ro Ray Smith, Kluba Sekretario-Direktoro, diris al mi, ke la nomo estiĝis en 1973, post kiam la tiama manĝo-ĉambro, la "Chandelier" estis pligrandigita, kaj la aldonita nomiĝis "Esperanto" de la tiama Klubo-Komitato ĉar ĝi signifis "International". La du manĝo-ĉambroj nun estas unuigitaj kaj nomataj "La Esperanto-Ĉambro", de tiam laŭmodigita kaj re-ornamita.

S-ino Smith estas juna virino, kiu naskiĝis en Jugoslavio, kaj parolas kelkajn lingvojn. Ŝi lastatempe reunigis sian komercon kaj akceptis sian nuntempan postenon ĉe "City Tattersalls Klubo". Ŝi diris al mi, ke ŝi interesiĝas pri la koncepto de la internacia lingvo, kaj plaĉus al ŝi ricevi gazeton, informadon k.t.p. pri Esperanto en Aŭstralio. Post

konsulto kun Marjorie Duncan mi donis al ŝi taĝajn broŝurojn por ŝia informo. — Myrtle Straker, Sidnejo.

**LETEROJ AL LA REDAKCIO**

Jus atingis m.n la plej aktuala numero de "A.E.", kaj mi legis sur paĝo 254 pri "Taiĉi" sed sur paĝo 255 pri "tai ĝi". Laŭ "Tai Chi" de Sue Mackie, bazita sur "Zenyang Lianxi Taijiquan" de la Shanghai Education Press:-

Oni ne konfuzu "Ch'i" kun "chi". Kvankam ili similas literume kaj prononcmaniere (al okcidenta orelo), la du vortoj havas tute diversajn signifojn kaj estas skribataj tute malsame per ĉinaj ideogramoj. "Ch'i" (diru "ĉi") signifas kaj "spiro" kaj "vivenergio"; "chi" (diru "ĝi") kiel en "tai chi ch'uan" signifas "la fina punkto", aŭ "la lasta".

Kredeble iu ĉina samideano povos precizigi la signifojn kaj la ĝustajn prononcmanierojn.

—Robby Robertson.

**LA "A.E."**

**SUBTEN — FONDUSO 1984/85**

|  |       |
|--|-------|
| Antaŭe raportita .....                     | \$618 |
| S-ro L. S. Eddington, Inglewood, W.A. .... | 10    |
| S-ro C. Strochetter, Launceston            | 5     |
| S-ro S. Bruton, Castlema'ine, Vik          | 10    |
| S-ro Eino Loorits, Hobart                  | 20    |
| F-ino J. Turner, Rockhampton               | 30    |
| D-ro J. Somogyi, Port Hedland, W.A. ....   | 50    |
| S-ro Trevor Steele, Brisbane               | 10    |
| S-ro Vlado Kosef, Cobar, NSW               | 20    |
| S-ro E. Errey, Geelong, V.                 | 10    |
|  | <hr/> |
|  | \$783 |

**INTERNACIA KOMPUTADO:** Ten nova gazeto, eldonata de la Komputista Grupo de Hungara E-Asocio, kaj kiu plenumos multe bezonatan rolon en Esperantujo. Ni ankoraŭ ne koncias la etendiĝon de la nova scienco, kiu jam penetris nian vivon, kaj tiel influas ĉiun sferon de la nuna mondo, kie eĉ lernejanoj portas komputilojn en siaj sakoj.

La nova gazeto inkludas ĉiun fazon de la nova tekniko, kia maŝina tradukado, en kiu Esperanto ludas ĉiam pligrandigantan rolon, traktante la enkondukon de novaj terminoj por funkcioj, pri kiuj ni antaŭe ne povis eĉ revii.

Havebla ĉe la peranto, Ken Linton, 4/2 Lyons St., Glenhantly, 3163. La prezo estas \$11.30 por 4 numeroj jare. Tiu, kiu abonos por la nuna jaro, ricevos ĉiujn pasintajn numerojn.

### INTERNACIA ASOCIO DE HANDIKAPITAJ ESPERANTISTOJ

Kredu aŭ ne, sed nur el Parizo ni ricevis la novaĵon, ke "nia" Prof. Robert R. Robertson estis elektita kiel prezidanto de la nova "Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj". Tiu asocio eldonas luksan revuon "Voĉo de handikapuloj", kiu aperas sesfoje jare. Abonon de 5 usonaj dolaroj sendu al "Voĉo de handikapuloj" 56227 Borovo, Skolska ul. 2, Jugoslavio.

### HOMO DE ANTAŬ UNU MILIONO DA JAROJ:

Dum konstruado de nova aŭtovojo inter Kampobaso kaj Isernia, en la mezitala regiono Molizo, okazis unu el la plej sensaciaj malkovroj en la historio de arkeologio: reaparis militista kampadejo de antaŭ unu miliono da jaroj, entute la plej malnova homa restaĵo, pri kiu oni trovis restaĵojn.

La kampadejo, kiu situis en zono iam marĉoplana, estis transportita per speciala teknologio al la Arkeologia Muzeo de Isernia, kiu nun fieras pri ĝi.

Temas pri iu speco de mozaiko, formita el bestaj ostoj, prilaboritaj ŝtonoj, primitivaj iloj: ĉio lokita sur cedema tavolo, kovrita pli poste de aluviaj stratumoj, kaj alveninta senŝanĝa al nia epoko. El tiu aro da objektoj, la spertuloj ĉerpis surprizajn kaj tre valorajn donitaĵojn. La homoj, kiuj vivis en tiu loko, ne estis similaj al simioj aŭ brutoj. Provizitaj per inteligenteco kaj sociemo, ili konis fajron, kiu postlasis en la kampadejo evidentaĵojn spurojn. Ili uzadis farbilojn kaj ĉasadis grandajn bestojn, inkluzive de specioj jam malaperintaj en Eŭropo: elefantoj, rinoceroj, bizonoj, cervoj, ursoj, lupoj kaj multegaj ronĝuloj.

La Muzeo de Isernia estas pli kaj pli vizitata de la scienculoj de la tuta mondo, kiuj kaptas la okazon studi senpere ĉi tiun prahistorian travivaĵon.

(A De Salvo en la Esperanto-Emisio de Radio Roma)

### CORRESPONDENCE COURSES New Price List — 20% Discount to A.E.A. Members.

1. BONAN TAGON \$19 (\$15.20 to AEA members or full-time students)
2. JEN NIA MONDO \$24 (\$19.20)
3. "THE ESPERANTO TEACHER" course \$29 (\$23.20)
4. The "PROGRESSIVE" with "Step by Step" \$34 (\$27.20)
5. "DEK KVIN PASOJ" with "Paŝoj al Plena Posedo" \$39 (\$31.20)

Course 3 is the ideal "refresher" for "rusty" Esperantists and has just been revised, improved and reprinted.

All courses include personal tuition by mail, no time limit, till the course is completed to the student's satisfaction.

John Moore, 7 Pelican St., EMU PARK, Q'ld., 4702.

### NOVAJ LIBROJ

(Mallongigoj: B. ilustrita, I-por infanoj, G-Geografio, N-Romano, S-Teknika, L-Legolibro, b-broŝurita)

|   |        |
|---|--------|
| "Hejmoj de Birdoj" — Ju Zi<br>BI22b                                       | \$2.20 |
| "Ora Hakilo"—Fan Yuang<br>BI 20b  | 1.40   |
| "Malatentema Virino"—Fan<br>Yuang BI 20b                                  | 1.05   |
| "Kiel Kovi" — Lin Songying<br>BI 20b                                      | 1.05   |
| "Vosto-konkurso" — BI 14b   | 0.75   |
| "Knabino Ginseng" — Ĉeng'an<br>BI 35b                                     | 1.50   |
| "40 Vidindaĵoj de Ĉinio" BG<br>250b                                       | 4.20   |
| "Sur Kampo Granita" — I<br>Nemere N 127b                                  | 8.30   |
| "Mikrokomputilo" S 60b  | 4.30   |
| "Esperanto Esperante" E. Benicka<br>L 127b                                | 6.05   |
| "Taskofolioj por Komencantoj"<br>"Hungaraj Fabeloj" — E.<br>Benedek N 70b | 5.15   |
| "Telegra" (ludo)  | 1.20   |
| "Skandalo pri Jozefo" — V.<br>Vinar N 68b                                 | 2.85   |
| "Transdorso'eto" — Novak<br>S 70b   | 2.80   |
| Kasedoj de Literatura Foiro   |        |
| Esperanta Songazeto 2   | 11.20  |
| Esperanta Songazeto 3   | 11.20  |

Mendu de: A.E.A. Book Service,  
P.O. Box 230, Matraville, NSW 2036

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 217 (297)

MELBOURNE

SEPTEMBRO, 1984

## LA PATRIARKO MORTIS

Preskaŭ 98-jara, mortis en perta hospitalo, la 9-an de aŭgusto, 1984,

### D-RO CYRUS J. CALDERA,

fondinto de la Aŭstralia Ekzamen-Komisiono, unua klereca diplomito kaj iama ĉefekzamenanto de A.E.A.

Cyrus J. Caldera naskiĝis en Bussolena (Torino) en norda Italujo je 19-a de decembro, 1886. Li pruvigis brila studento kiu, kun honoro en 1910 diplomigis pri medicino ĉe la Universitato de Torino. Dum la unua Mondmilito li estis Kapitano en militsanitaro servo kaj dufoje ricevis medalon pro kuraĝo. Li dum kvar jaroj servis ankaŭ kiel ĉef-fakulo ĉe hospitalo en Verona, kaj tre frue famigis kiel specialisto pri la orelo, nazo kaj gorĝo.

En 1922 li gajnis altan konkurson por okupi katedron tiufakan ĉe la Unversitato de Pavia, kie li organizis tre modernan klinikon, sed tion li devis forlasi post du jaroj pro sia antifaŝista sinteno. Li komencis praktiki private en Verona, sed pro la daŭra turmentado de la faŝista reĝimo, li decidis forlasi

Italujon. Universitatoj en pluraj landoj proponis al li katedron, sed li elektis Aŭstralion kiel la lokon plej malproksiman de Italujo, kaj fuĝis tien en 1926. Alveninte unue en Brisbano, li poste vizitis Okcidentan Aŭstralion, kaj fine translokiĝis al Perto.

Li renkontis sian estontan edzinon, Irene, flegistinon, ĉe la hospitalo de Fremantle, kie, en 1929, li starigis la unuan klinikon por la traktado de orel-, nazkaj gorgmalsanoj. Ili laboris kune, kaj tie kaj en Perto, dum pluraj jaroj ĝis geedziĝo en 1939.

Proksimume samjare D-ro Caldera interesiĝis pri Esperanto, instigite de S-ro Isor Masel. Kune ili kreis novan Esperanto-Ligon, kaj proprakoste D-ro Caldera provizis kunvenejon, kie li unue propagandis kaj poste instruis la lingvon al multaj gelnantoj. Li mem diplomigis ĉe Brita Esperanto-Asocio en 1942, kaj poste instigis, ke multaj aliaj, inklude la nunan verkanton, same faru.

En 1946 li fariĝis Sekretario de A.E.A. por du jaroj, kaj en 1950, ĉe la A.E.A. Kongreso en Melburno, li elektiĝis Prezidanto. Estis dank' ankaŭ al lia plua stre-

bado, ke establiĝis A.E.A. Ekzamena Komisiono Li mem gajnis la unuan Klerecan Diplomon en 1958, kaj li prezidis la Komisionon ĝis Len Newell transprenis la torĉon en 1962. En 1976 A.E.A. danke honoris la Doktoron per aljuĝo de sia Honorinsigno.

Li esperantigis ankaŭ sian edzinon, kun kiu post emeritiĝo, li faris plurajn transmarajn vojaĝojn. Li estis dumviva ano de A.E.A., kaj en sia 85-a jaro partoprenis kun ŝi la A.E.A. Kongreson en

Perto en 1970. Li restis vigla kaj mense kaj fizike ĝis post la 87-a naskiĝtago, sed poste suferis apopleksion, rezulte de kio ĝis la morto li bezonis multe da flegado kaj helpo.

Lia kremaciĝo okazis private en la Krematorio Karrakatta, kies konstruon li mem instigis, kaj kies malfermon li ĉeestis en 1937.

Al lia edzino, Irene, ni plej kore kondolencas.

—FAY KOPPEL

## DENTA PROFILAKTIKO EN SVISLANDO

### D-ro Arthur Baur en Svisa Radio Internacia

La batalo kontraŭ la ruiniĝo de la dentoj faris en Svislando en la lastaj jaroj tiel frapajn progresojn, ke valoras la penon analizi tiun evoluon iom pli detale.

La kario de la dentoj, aŭ pli simple parolante ilia putriĝo, kaj la paradontito, t.e. la inflamo de la gingivo, estas la plej oftaj malsanoj. Estas nun jam multaj jardekoj, ke oni enkondukis la regulan kontroladon de la dentoj en la lernejoj, sed komence la lernejaj dentistoj limiĝis al la riparado, t.e. la plombado de la jam difektitaj dentoj. La stato de la dentoj en Svislando en tiu epoko estis alarmo, kaj maloftaj estis infanoj, kiuj ne jam havis truojn en la dentoj. Antaŭ 30 jaroj komenciĝis kvazaŭ revolucio en la lerneja prizorgado de la dentoj, nome oni komencis konsideri la profilaktikon kiel la plej gravan celon. Pli bone estas preventi malsanon ol poste kuraci ĝin.

La bazo estis la scienca studado de la kaŭzoj de la dentmalsanoj kaj de la metodoj preventi ilin. Sur tiu kampo estis faritaj enormaj progresoj kaj oni ne povas pretervidi la tute apartajn atingojn de la estro de la sekcio pri profilaktiko en la dentmedicina instituto de la universitato de Zuerich, Prof. Th. M. Marthaler.

Devis esti plenumitaj du taskoj, unue la sciencaj studoj kaj due la disvastigo kaj pratika utiligo de la eltrovaĵoj en la lernejoj kaj la ĝenerala publiko. Unu tre grava eltrovaĵo estas la efiko de la fluoridoj, t.e. (NaF aŭ CaF<sub>2</sub>) idoj de la kemia elemento fluoro en la protekto de la dentoj. Oni komencis disdoni al la infanoj en la lernejoj regule tablojdojn

de fluorido, la produktistoj de la dentpastroj aldonis fluoridon al la dentpastroj, kaj la plej ampleksa entrepreno en la senco de sociala higieno estas la fluoridigo de la mangosalo. En 1955 la svisa salfarejoj komencis aldoni fluoridon al salo, samkiel oni jam pli frue komencis aldoni jodon kaj kun plena sukceso venkis per tio la kropon. 70 procentoj de la svisa popolo nun uzas tiun fluoriĝigitan salon, espereble la scio pri la valoro de tiu salo disvastiĝos ankoraŭ pli. Ek de la jaro 1983 la fluoriĝigita salo en Svislando enhavas 250 miligramojn en unu kilogramo.

Dua grava elemento en la batalo kontraŭ la kario estas mezuroj kontraŭ la sukero. Oni nun scias ĝenerale, ke la sukero estas la preferata nutraĵo de la mikroboj vivantaj en la homa buŝo. Ili transformas la sukeron en acidon, kiu siaflanke detruas la dentojn. Do necesas ĉiam tuj purigi la dentojn post konsumo de dolĉaĵoj. En 1969 la federacia ofico pri sanitaraj servoj dekretis difinon pri la karaktero de dolĉaĵoj sensukeraj, kaj nuntempe jam la duono de la vendataj maĉgumoj kaj bombonoj rajtas nomi sin nedamaĉantaj la dentojn.

La tria elemento en la dentprotektado estas la regula kaj teknike ĝusta maniero purigi la dentojn por forigi la plako sur la dentoj, en kiu vivas la mikroboj. Tiu sistema instruado de la infanoj komenciĝis en la kantono Zuerich en la jaro 1962 kaj la afero nun estas leĝe reguligita pere de dekretoj de la kantona parlamento. En la aliaj kantonoj estas simile. La sukceso de tiuj mezuroj estas

frapa. En la jaroj 1963/64 71% de la infanoj havis karion en la antaŭaj dentoj, en 1967/68 42%, 1971/72 21% 1975/76 8% 1979/80 6%.

Mi ne volas amasigi ciferojn antaŭ vi kaj rezignas pri la citado de similaj rezultoj aliloke kaj ankaŭ en eksterlando, ĉar Svislando ne estas sola. Ŝajne tamen, ke Svislando estas plej progresinta sur tiu kampo, tiel ke oni parolas pri "svisa sistemo". En tiu progreso havas meritojn ne nur la universitataj institutoj kaj la ŝtate dekretitaj agadoj en la lernejoj, sed ankaŭ la profesiaj dentistoj. La svisa dentista asocio havas propran komisionon por la antaŭenigo de la denta profilaktiko. Ĝi organizas prelegojn kaj disponas por tio pri diapozitivaj kaj filmaj kaj precipe okupiĝas ankaŭ pri la klerigo de la gepatroj, por ke ili klopodu, ke la infanoj purigu la dentojn regule kaj korekte kaj ke ili ne manĝu dolcaĵojn dum la tago.

En la nuna momento la dentista asocio okupiĝas pri nova sistemo, t.e. lernejoj por tiel nomataj profilaktikaj asistantinoj, t.e. estas dentistaj helpantinoj, kiuj ricevas apartan trejnadon pri la prevento de dentmalsanoj. Estas nova profesio apud tiu de la denthigienistinoj. Unu problemo estas ankoraŭ la prizorgado de la junuloj, kiam li forlasis la lernejon, kie iliaj dentoj esti regule kontrolataj kaj se necese riparataj. Laŭsperte la periodo inter la 16-a kaj la 20-a jaroj estas danĝera tempo por la dentoj. En la kantono Zuerich oni solvis la problemon donante al la junuloj kupononjn, kiuj ebligas al ili senpagan kontroladon de la dentoj. Tre multaj junuloj uzas tiun ŝancon. Dum la lerneja tempo apartenaŝ la instruado de denta higieno kaj de ĝusta dentbrosado al la lerneja programo. Sesfoje meze la infanoj ricevas tiun instruadon. Por tiu la plej multaj komunumoj disponas pri propraj fakulinaj. Ofte tio estas parttempa profesio tre taŭga por iamaj dentistaj helpantinoj, eble ankaŭ edzinoj de dentistoj, kiuj regule estas retrejnataj en tiu fakoj.

La kario estis konsiderata antaŭ kelkaj jardekoj kiel amasmalsano, kiel vera sociala problemo. Montriĝis nun, ke dank' al la progresoj de la sciencoj kaj al sistema efektivigo de la ekonoj en la praktiko estis eble kontraŭbatali tiun malsanon kun sukceso. Sed estis necese ne laciĝi kaj pli kaj pli disvastigi tiujn en la tuta popolo.

## 10-A INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Ci tiu Konferenco okazis de la 22-a ĝis la 28-a de julio 1984 en la bela kaj moderna konferenĉejo Leeuwenhorst, komunumo Noordwijkerhout, Nederlando, kun la temo "Komunikado kaj Homaj Rajtoj". Partoprenis pli ol 70 personoj el 10 nacioj. Honora Protektanto de la Konferenco estis Mag. F. Winkel, la urbestro de la komunumo Noordwijkerhout, kiu mem estas esperantisto kaj tiel povis rekte — sen tradukisto — alparoli la ĉeestantojn dum la inaŭguro.

Konforme al la konferenca temo, Prof. D-ro Ivo Lapenna en sia inaŭgura parolado traktis pri la temo "Fundamentaj liberecoj laŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj la Esperanto-Movado". Ankaŭ la prelegoj dum la Konferenco estis altnivelaj kontribuoj en kunteksto kun "Komunikado" kaj "Homaj Rajtoj": Parolis Ing. J. O. de Kat (Universitato de Leiden, Nederlando) pri "Masintradukado", F. Munniksma (la konata aŭtoro de la 9-lingva komerca-ekonomika vortaro) pri "Amnestio Internacia: Campiono de Humaneco", Stefan Maul (ĉefredaktoro de "Monato", F. R. Germanio) pri "Monda komunikado", Prof. D-ro Ivo Lapenna (Universitato de Londono) pri "Komunikado: Fundamenta Homa Rajto" kaj Prof. D-ro Stefanos Anagnostakis (Universitato de Tesaloniko, Grekujo) pri "Rajtoj de Malliberuloj". Aldone Prof. D-ro Lapenna prelegis pri "Tridekjara datreveno de la Rezolucio de UNESKO favore al Esperanto, kaj UNESKO hodiaŭ" Ci tiu lasta prelego estis speciale interesa, ĉar Prof. Lapenna, kiel konate, mem estis tiu homo, kiu per sia lerta agado povis atingi tiun fame konatan rezolucion. Do li povis rakonti laŭ sia propra sperto kaj ankaŭ prezentis sonbendon pri parto de la debato kaj voĉdonado en Montevideo 1954.

Rilate al la Jubilea Jaro la Konferenco devis konstati kun bedaŭro, ke la preparaj laboroj flanke de la koncerna komitato stagnas, tiel ke supozeble ne okazos komunaj aranĝoj. Tamen la Neŭtrala Esperanto-Movado plu etendas la manon por efika kunlaborado surbaze de interkonsentita komuna agadprogramo kaj egaleco de la partoprenantaj organizaĵoj.

Al la kultura parto de la Konferenco apartenis ankaŭ la Arta Vespero, dum kiu estis prezentitaj diversaj poemoj, precipe pri temoj en kunteksto kun la Homaj Rajtoj. I.a. la ĉehdevena, nun en Nederlando vivanta poetino kaj aktorino Jana Beranova legis mem kelkajn poemojn en Esperanta traduko. Du nederlandaj artistinoj prezentis tre lerte muzikon per fluto kaj piano.

La Oficiala Akcepto fare de la Urbestro okazis en la komunuma centro "De Schelft". Poste oni vizitis la "Blankan Preĝejon", konstruaĵon el la 13-a jarcento, kie okazis orgenkonzerto, prezentita de s-ino Gony van der Maten, kiu en 1983 gajnis la unuan premion en la internacia orgenkonkurso 'Albert Schweitzer'. Samvespere konferencanoj veturis al la vilaĝo "De Zilk", kie okazis la Bankedo en la Centro "De Duinpan".

Ankaŭ okazis 2 ekskursoj. Tuttaga ekskurso gvidis al la t.n. Orient-Skeldaj Verkoj, t.e. grandioza sistemo de digoĵoj kaj kluzoj por protekti la landon de inundoj de la maro. Dum la duontaga ekskurso oni vizitis la pitoreskan malnovan universitatan urbon Leiden.

La Konferenco en Leeuwenhorst estis tre sukcesa, kion oni dankas ankaŭ al la bona organizo de s-ino M. Vermaas, Rotterdam. Oni jam decidis pri la loko de la Konferenco en 1985: ĝi okazos en Metz, Francio. —KLAUS PERKO

### S.A.T. KONGRESIS EN FRANCI

La 57-a kongreso de SAT okazis de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto, 1984, apud la sudfranca urbo Bordeaux. Partoprenis 260 esperantistoj el 20 landoj. Salutparoladon faris D-ro A. Albault, prezidanto de la Akademio de Esperanto.

La regiona gazeto "Sud-Ouest" plurfoje raportis pri Esperanto kaj la diversaj kongresaranĝoj, inter kiuj elstaris la inaŭguro de Esperanto-strato en la apudurbo Lormont.

Kiel kutime la kongreso aprobis Deklaracion, kiu atentigis i.a. "ke pli kaj pli oftigas mensmanipulado de la amasoj pro religiaj kaj ideologiaj fanatikecoj", "ke la enstrudigo de militista propagando en la lernejojn estas neakceptebla kaj preparas la terenon al totalismo"; "ke la kreo de mondo sen armeo estas celo atingenda"; "ke malantaŭ la ĉiam pli ofta misuzo de la vortoj 'libera' kaj 'libereco'

sin kaŝas kontraŭliberecaj sintenoj" kaj konkludis "ke la Internacian Lingvon la juna Zamenhof iniciatis ne por kontentigi intelektan aspiron, sed por kontraŭbatali la malamon inter la gentoj".

La venonta, la 58-a Kongreso de SAT, okazos fine de julio 1985, en Amersfoort, Nederlando.

## KOREKTENDAĴOJ SUPLEMENTO AL LA STUDLIBRO POR LA AŬSTRALIA NORMA SUPERA DIPLOMO

**Paĝo 10:** En "La Subjunkcia Subordita Propozicio". Sangŭ la vorton "Subordita" al "Subordigita". La aŭtoro imitis la vortojn en PAG, sed nun ne konsentas, ke "ordi" estas transitiva verbo. La radiko "ord" estas evidente adjektivkaraktera, ĉar la substantiva formo signifas "eco de io orda". Sangŭ la saman vorton en la unua linio.

**Paĝo 12:** Sub la sekcio "La Infinitivo" la aŭtoro mencias kvin prepoziciojn, kun kiuj oni povas uzi la infinitivon, sed preterlasis la sesan, "anstataŭ". Tamen, en la sekcio, "Prepozicioj kun infinitivo" sur paĝo 13, li inkludis ĝin sed preterlasis la prepozicion "por", kaj ne menciis, ke infinitivo povas esti komplemento de netransitiva verbo.

**Paĝo 15:** En la dua linio antaŭ la vortoj "al mi" enmetu la vorton: "Leteron".

**Paĝo 21:** En la sekcio "La prepozicio De", post la sekcio (3) aldonu la vortojn: "Lastatempe estas tre forta tendenco uzi la novan prepozicion "far". Ekzemple: "libro verkita far" Ĉi tiu uzo ofte mallongiĝas esprimon; ekzemple: "Libro far Zamenhof". Ĉi tiu uzo vere ne estas kontraŭ la fundamento, ĉar Zamenhof intencis enkonduki la francan prepozicion "par". (Vidu paĝon 123 de "Leteroj de Zamenhof" far Gaston Waringhien). Tamen li decidis ne fari tion nur pro la eksplodo de la Ido-skismo. Tamen, tiu motivo jam delonge malaperis. Sur la sama paĝo aldonu post sekcio (4) la vortojn: "Nun estas proponite, ke ni uzu la prepozicion "den" ("de" plus akuzativo. Vidu artikolon far akademiano Bruce Arne Sherwood sur paĝo 5 de Esperanto por januaro 1984). Ekzemple: "kanto den himno", "legado den libro", kaj "instruo den Esperanto".

**Paĝo 22:** Post la fino de tiu sekcio pri prepozicio "de" enmetu la vortojn: "La



plej natura uzo de la prepozicio "de" estas por indiki originon — originon en spaco aŭ tempo, originon de posedo, rilato, aŭ aparteno.

**Paĝo 23:** Post la fino de la sekcio, "La Prepozicio Je" enmetu la vortojn: "La ĉefa uzo de ĉi tiu prepozicio estas por indiki tempon. Ekzemple: "Je sunleviĝo" aŭ "Je la kvara vendredo".

K. G. LINTON.

### "KONSULTU LA KONSILANTON"

"Mi legis en ĵurnalo 'TRE AĜA VIRINO MORTAS EN AŬTOBUSO'. S-ino Mary B., 61—k.t.p." Mi havas 61 Jarojn. Ĉu mi estas "Oldulino"? "Mez-aĝa aŭ maljuna?"

Kara Mezaĝa: Neniu estas **olda**, do neniu estas oldulo aŭ oldulino. Tiaj vortoj ne rajtas ekzisti. Zamenhof kreis logikan, simplan, zorge planitan lingvon, kiu evitiĝ la neceson lerni du vortojn, se unu sufiĉas. Ekzemple varma, malvarma (ne kolda), bona, malbona (ne bada), juna, maljuna, NE olda. Se ni insistas uzi vortojn kiel "trista", "kurtonda" k.t.p. ni helpas ruiniĝi la belan koncepton en la menso de nia Majstro.

Vi ne estas maljunulino. Ĉiuj scias, ke vivo komenciĝas ne je la aĝo de kvardek, sed je sesdek, do mi gratulas vin, ke vi estas **junulino**, ĉar vi estas nur **unuĵara**. Viaj infanoj nun estas plenkreskintaj, preskaŭ certe vi nun posedas vian propran domon, via sano estas ankoraŭ bona; la problemoj de ĉiutaga vivado estas malantaŭ vi. Gratulojn ke vi estas je la plej bona aĝo dum via tuta vivo. Konsilanto.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** Pri la longa silento de nia klubo kulpas nur la raportanto. Oni ne supozu ke okazas nenio. Tute male. Dolorigajn perdojn ni ja suferis pro mortoj de tri aparte valoraj membroj: 'Dolly' Dean, Olive Hunt kaj Dro C. J. Caldera. Ni forte sentas ilian mankon. Tamen la klubo pluvivas kaj la kunvenoj viglas malgraŭ foresto de diversaj anoj — Prezidanto Rene Smeets en Eŭropo, Sekretario Chris Dean kaj kasisto Owen

Loneragan en orienta Aŭstralio, Galena Sliwa en Eŭropo, 'Happy' Huts pro operacio, via raportanto pro studado. Vera Payne kiel vic-prezidanto kaj Jack Hawks kiel vic-sekretario stopas brecojn en la estraro kaj Vera tre sukcese estras ia klubkunvenojn. Multe helpas en tiuj lastaj alfluo de novaj partoprenantoj el ia kraso ĉe Mount Lawley, kiu daŭre prosperas.

Aparte ĝuinda estis la ĉeesto inter ni de Jan van Gorp, juna kaj simpatia esperantisto el Belgio, kiu komencis Australian libertempon ĝuste en Perth, tute de aŭgusto. Gastigis lin diversaj anoj kaj 4-foje oni intervjuis lin en la radio. 27 personoj partoprenis al tre sukcesa societa aranĝo por li en la hejmo Einihovici (5/9). Li ankoraŭ partoprenis al klubna pikniko ĉe Wireless Hill Park (2/9), sed bedaŭrinde pluvadis! Post la mango, anstataŭ admiri la sovaĝflorojn pli ol 20 rifuĝis de la pluvo kaj malvarma vento en la domo de Hugh kaj Ruth McGrath, kie ni babilis kaj aŭdis pri la spertoj de Jan.

Dekduo da kuraguloj, kiuj spitis similan veteron por 'pikniki' en la domo de la eterne juna Dorothy Threlfall (15/7) bele sin distris per muziko, babilado — kaj manĝado!

Ottile Stremple, ankoraŭ malforta post iom grava malsano, grade resaniĝas.

—R.McG.

### OLIVE HUNT MORTIS

La 2an de julio mortis en Perth Olive Hunt, 70-jara. Ŝi aliĝis al kurso gvidata de la vizitanta W. L. Simpkins en 1964 kaj fariĝis Dumviva Membro de A.E.A. en 1971. Dum preskaŭ jardeko (1971-9) ŝi tre kompetente servis kiel Libroparanto por A.E.A. en Perth, kaj partoprenis al kongresoj en Manly, 1968. Perth, 1970 kaj Melbourne, 1976. Instruisto de junaj infanoj laŭ profesio, ŝi gvidis diversajn kursojn de Esperanto por infanoj kaj por plenaĝuloj kaj kontribuis per multaj vigligaj eroj al klubaj kunvenoj. Eĉ en la lastaj jaroj kiam, unue pro akcidento kaj poste pro malsano ŝi ne plu povis aktive partopreni en klubaj aferoj, ŝi tamen kontribuis multajn ĉarmajn manfaraĵojn por vendo profite al la Ligo. Personeco aparte bela, ŝian malaperon ni forte sentas.—R.McG.

● **ADELAJDO:** Chris Dean el Perto estis nia bonvena gasto je 7-a de aŭgusto,

1984, kiam li montris filmon pri belaj lokoj en Okcidenta Aŭstralio. Li ankaŭ montris la lokon kie okazos la venonta AEA-Kongreso en 1986.—R. FELBY.

● **SIDNEJO:** Je 16-a de julio S-ino M. Chaldecott prezentiĝis tradukojn el la libro "Under the Northern Lights", pri vivo de ĉasanto en norda Kanado. Je 6-a de aŭgusto, D. Gould rakontis historion pri sia maskiĝurbo West Kirby, apud la angla urbo Liverpool. Li ne scias ĉu, aŭ kie estas East Kirby. Lia hejmurbo unue apartenis al unu provinco, poste al alia.

—M. CHALDECOTT.

● **MANLY:** La tria trimestro komenciĝis la 18-an de septembro en la Eduka Centro kun la kutimaj klasoj kaj diskutgrupo.

Niaj mondvojaĝantoj jam revenis hejmen kaj ni plezure atendas aŭdi pri ekscitaj travivaĵoj kaj rigardi ravajn lumbildojn.

Lastatempe, en la Esperanto-Domo, kelkaj Manly-anoj ĝuis la okazon renkonti Chris Dean el Perto. Li Parolis pri la venonta kongreso en Perto kaj allogis nin tien per belaj lumbildoj de Okcidenta Aŭstralio.

—EUNICE GRAHAM

● **MELBURNO:** Je la 4-a de junio ni rememoris la 40-jaran jubileon de la invado de Eŭropo, kiu kondukis al la fino de la 2-a mondmilito en Eŭropo. S-ro Harry Beechey, kiu mem partoprenis en tiu danĝera entrepreno, povis rakonti al ni nekutimajn detalojn pri la planado kaj propraj spertoj.

"Aŭstralio, Lando de Beleo" estiĝas la temo de la Mez-Jara Konkursvespero, je 25-a de junio, kiun kondukis F-ino Margaret Sanders. La premion por la plej bona priskribo en Esperanto, gajnis F-ino I. Gale; dua premio iris al Don Pescod. La premion por la prezentado de la plej interesa loko, gajnis Errol Chick, kiu montris diapozitivajn pri Ayers Rock. Joe Heard kaj S-ino Sanders gajnis premiojn por la plej interesaj rakontoj en la angla lingvo.

Je 23/7 Ken Linton legis tradukitan rakonton pri batalo inter homo kaj kondoro, observata de la aŭtoro. (La kondoro venkis.)

Je 30-a de julio membroj de 3 lokaj grupoj venis al la Esperanto-Domo por vidi la interesajn diapozitivajn de Marcel

Leereveld, pri ties vizito al Japanio kaj Germanio.

**MONATO ankoraŭ vivas:** Post krizo en la komenco de ĝia 5-a jaro, oni sukcesis eviti ĝian anoncitan morton, Stefan Maul restas ĉefradaktoro, sed administros la Flandra E-Ligo. Subtenu la gazeton, detaloj haveblaj de **Ken Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntingly, 3163.** Tiu Peranto akceptos abonojn ankaŭ por 2 novaj gazetoj: "Internacia komputado", 4-foje jare: \$11.30; "Voĉo de Handikapuloj", 6-foje jare: \$8.00. (Se oni abonas por la nuna jaro, tiu ricevos la pa.intajn numerojn.)

## RECENZOJ

**LA LITOMIŝLA TOMBEJO,** de Karolo Piĉ (1920- ). Saarbrücken, Arthur E. Iltis, 1981, 276 p.

Kiel William Auld komentis pri ĉi tiu romano: "Iuj legantoj ĝin ŝategos kaj alte taksos, iuj ĝin malaprobos kaj anatemos — eventuale kelkiuj spertos ambaŭ sintenojn" (**Fonto**, oktobro 1981). Juan Regulo Perez bonvenigis ĝin eŭforie: "... mi estas ĝisekzalte entuziasmigitaj ..." (**esperanto**, aprilo 1982) (sian recenzon Regulo Perez verkis en la tre karakteriza neologisma lingvo de Piĉ). Kriŝ Long skribis pri ĝi: "Jen majstroverko . . . interesa nek ideo nek historie, sed arte" (**Literatura Foiro**, aprilo 1982). Cetere, oni apenaŭ legos recenzon pri ĝi en iu orienteŭropa gazeto; per sia vipa kaj konfesinde kur-aĝa kritiko de la ĉeĥa reĝimo Piĉ rezignis grandan parton de sia eventuala legantaro.

La plej okulfrapa trajto de la verko estas la tre abundaj novismoj. Piĉ pledas por "pli disvolvita" romana lingvaĵo, asertante, ke li nur ĉerpas el la latentoj de la nuna vortstoko. Pravas ja, ke grandega proporcio de niaj vortoj venas el la latina, kaj konanto de tiu lingvo tuj rekonos **enim, aŭtem, tum, ak** kaj tiel plu. Nu, mia (kaj via?) unua reago al tiaj eksperimentoj estas: Ne! Sed se ni mem provas verki iom ambician prozaĵon, ni devas konfesi, ke mankas al nia lingvo multaj vortoj, kiuj tre facile venas en la kapon de nacilingva verkanto. Do ni ne rifuzu ekzameni la proponojn de Karolo Piĉ, kiu estas ja akademiano.

Piĉ prave atentigas pri kelkaj tro ŝarĝataj vortoj, el kiuj de pli ĝemas ol ĉiuj aliaj. Kiel Piĉ diras, la sencoj de de estas foje rekte malaj: jen ĝi signifas originon, apartenon (la nomo de la viro), jen apartigon (mia foriro de la urbo). Li do proponas (kaj ja uzas!) **ab** en ĉi tiu senco. **Nur** en tempa kunteksto estas ambigua: "Mi verkis tiun libron nur en decembro" — ĉu en neniu alia monato; aŭ ĉu ne pli frue ol decembro? Por ĉi tiu senco Piĉ uzas alian vorton el la germana, **erst**. (Rimarkinde, ke pri la eĉ pli ĝena ambigueco de **ĝis** Piĉ silentas). Li uzas **ĝuste** nur en ĝia elementa senco **prave, bonorde**; anstataŭ **ĝuste tiam** . . . (kio ja ne temas pri bona ordo!) Piĉ skribas **ĝus tiam** . . ., kaj anstataŭ **ĝuste ŝin mi volas vidi** la iom kriplan **ste ŝin** . . .

Alia interesa propono estas uzi **eŭ**-kiel la malon de **-aĉ**; pro tre agrabla tuŝo far viro virino **eŭtremas**. Oftege Piĉ uzas **-al**, asertante, ke ĝi jam latentas en **ĵurnalo, finalo**, ktp. Laŭ Piĉ **-al** funkcias "kvazaŭ ia nepersona paralelo de **-ul**". Mi konsentas, ke **trimastalo** estas eleganta formo de **trimasta ŝipo**, kaj **verŝalo** poezie redonas la ideon de **pluvego**. Sed Piĉ ege malplifortigas la valoron de sia propono, ĉar li uzas ĝin kun tro da apenaŭ inter si rilatantaj signifoj, kaj oni efektive bezonas pluan difinon, antaŭ ol kompreni. Kiom el vi tiu divenus la signifon de **kamenalo, paskalo, radikalo, alternalo, patrolo** . . . ? (Respektive **kamentubo, paska kandelo, radikvorto, alternativo**, la preĝo **Patro nia**).

Kelkaj neologismoj, kiuj cetere ne ĉiuj originis ĉe Piĉ, certe meritas pripensadon, ekz.: **blinko** (intermite lumi), **demoli** (malkonstrui), **kiki** (piedfrapi), **neksta** (venonta, plej proksima, sekvanta), **taŝo** (mansako), **vokablo** (lernota vorto).

Aliflanke mi trovas nenecesaj la serion da neologismoj, pri kiuj Piĉ plej emfaze insistas, ke ili necesas por plielastigi la romanon lingvajon. Tiuj estas ĉefe variaĵoj de vortoj, kies ofteco iritas la stiliston Piĉ. Jen kelkaj el ili: **ma** (sed), **nam, enim** (ĉar), **aŭtem** (tamen), **ak** . . . **ak** (kaj . . . kaj), **tunk** (tiam), **poni, stitui** (meti), **nok** (ankoraŭ), **ples** (mi petas), **oŭ kej** (en ordo), **forsin** (eble). Mi provis agi juste kontraŭ Piĉ kaj cedi, ke la proponitaj vortoj nuance diferencas de (ab?) la tiel nomataj sino-

nimoj; sed laŭ mia gusto tiuj novismoj neniel plibonigas la tekston.

Ke Piĉ lerte manipulas la lingvon (precipe kiam li rezignas siajn proprajn novismojn?) neniu povus nei. Li elstaras en la riĉa vortpentrado de la urbo Litomiŝlo, kaj li elvokive kaptas la etoson de katolika sopiro al iu pli bela pasintajo, kiam la amata latina liturgio estiĝis la fono de ĉies vivo. Foje liaj priskriboj fariĝas laŭvorte poemoj en prozo, eĉ kun la majuskloj por signi la komencon de verso.

Sed ĉu la verko estas bona romano?

Mi trovas, ke ne. Ne pro tio, ke min ŝokas la tre eksplikitaj amorpriskriboj; fakte ili finfine tedis min, ĉar ili tiel ofte ripetigas kaj do perdas sian spicon. La "rakonto" en si mem estas nekontentiga, kvankam la heroo vivas en epoko, kiu liverus mil bonajn rakontojn. La sennoma heroo (li nomiĝas "vi", iu, kun kiu la aŭtoro konversacias kaj kiu evidente reprezentas almenaŭ parte unu el la aspektoj de Piĉ mem) havas tri amojn: sian urbon, Esperanton, kaj la "Feminon". Sed Piĉ ne sukcesis interplekti la tri amojn en koheran artverkon. La ĉapitroj pri Esperanto ŝajnas sen rilatoj al la aliaj. Tiuj pri Litomiŝlo estas la plej sukcesaj. La amaferoj kun eble dudek virinoj estas serio da banalaj adoleskaj amoraĵoj; estas sennombraj aludoj al "ĉarmaj koksoj", "belaj femuroj", "rava sino", kaj tuta sinonimaro por la "sekreta buŝo de virino", "buhteto", "ĉiĉeto" ktp. Sed kiel la cetera korpo aspektas, aŭ kion virino faras, kiam ŝi NE seksardas (aŭ kokete rifuzas seksardi), aŭ NE ricevas vipadon pro malĉasto, ni neniam legas.

Mi ne kritikis Piĉ pro tio, ke li ne kreis "noblan" heroon; sed figuro, kies ĉefa trajto estas memkompato, fine tedas. Kaj la melankolio, el kiu fontas la morne belaj poemoj de Piĉ, efikas sufoko en romano: la gamo de humoroj kaj stiloj estas tre limigita.

Tiu ĉi verko malpravigas unu el la premisoj de la aŭtoro: la modesta nivelo de niaj romanoj ŝuldiĝas ne al iu tro-rigideco de la lingvo, sed al la manko de rakonttalento kaj ideriĉeco de la verkistoj.

, —TREVOR STEELE.

**ESPERANTO'S TIME HAS COME:**

Prof. Stanley Nisbet, 22 paĝoj. Esperanto-Asocio de Britujo.

Jen utiliga propagandilo por konvinki seriozajn parolantojn de la angla pri la taŭgeco de Esperanto. La broŝuro prezentas pozitivajn argumentojn laŭ freŝa ŝtuposekvo.

- I. La nuna mondo bezonas mondan lingvon.
  - II. Kvalitoj necesaj en tia lingvo.
  - III. Esperanto posedas tiujn kvalitojn.
  - IV. Kion, do, ni atendas?
- La listo da kvalitoj proponita de Prof.

Nisbet estas:

1. La lingvo devas esti jam sukcese uzita de multaj homoj en ĉiuj mondpartoj.
2. Ĝi devas jam havi sufiĉe longan provperiodon por certigi, ke ĝi ne estas efemera brilajo kaj havas neniu seriozan malfortan aspekton.
3. Ĝi devas jam esti pruvinta sin alloga al internaciemaj politikistoj, ĉar politikaj decidoj eble en la fino determinos ĝian sorton.
4. Ĝi devas esti facila por lerni.
5. Ĝi devas esti agrabla por aŭskultado kaj legado.
6. Ĝi devas jam esti evoluinta sian propran organikan vivon: kulturenan korpon de literaturo, pensado, historio kaj sociaj konvencioj, sed nepre ne devas esti indentigita kun iu specifa ideologio aŭ nacio aŭ grupo de nacioj.

Aldonitaj estas dokumentoj de Eŭropa Konsilio, UNESKO kaj WFUNA. Enestas trafaj fotoj kaj ĝi havas okulfrapan kovrilon. La papero kaj presaĵo estas bonega.

Ĉi tiu broŝuro nepre devas esti en la manoj de ĉiu Esperantisto en Aŭstralio, por prezento al homoj, kiuj sincere deziras konsideri la lingvoproblemon kaj pretas dediĉi 20 minutojn al lego. Bona donaco al bibliotekoj kaj al dentistoj kaj kuracistoj por atendejoj. La libroservo

povos surpresi la adreson de AEA. Lokaj kluboj aldonu sian telefonnumeron.

—RALPH HARRY.

**DU VERKOJ INFORMAJ PRI ĈINIO.**

**1. SKIZO PRI ĈINIO:** La 100-paĝa teksto, kiu inkludas du-facetan "Apendico"n—"Dimensia Tabelo" kaj "Vidindaj Lokoj" — prezentas faktojn kaj ciferojn (en kvin ĉapitroj) pri la Geografio, Historio, Politiko, Ekonomio kaj Kulturo de la Ĉina Popola Respubliko. "Konciza Mapo", kvar paĝojn granda, internen refaldebla, helpas precizigi al la okuloj la formon de la lando kaj la situon de ties multaj provincoj kaj ĉefurbaj. Al ĉio tio aldoniĝis du aroj da bildoj, unu pri pejzaĝoj tre variaj kaj vere senspirigaj, la alia pri diversaj kulturartoj.

**2. 40 VIDINDAJ LOKOJ EN ĈINIO:**

Duoble pli ampleksan, ĉi ties tekston priskriban antaŭas mapo du paĝojn granda kaj 16 paĝoj da belaj kolorbildoj pri selekto el la 40 vidindaj lokoj priskribitaj — ĉiu per aparta artikolo. Multloke vinjetoj fantomece fonas al ĉapitraj enhavoj, dum ĉapitro-finaj notoj klarigas aludojn. Sekvas "Konciza Kronologia Tabelo de Ĉinio" kaj "Indekso de Lokaj kaj Personaj Nomoj".

Ambaŭ verkoj el Popola Ĉinio, ambaŭ en bonstila, facile legebla Esperanto, ambaŭ haveblaj ĉe A.E.A.—Libro-servo.

—FAY KOPPEL.

**LA "A.E."****SUBTEN — FONDUSO****1984/1985**

|                                  |       |
|----------------------------------|-------|
| Antaŭe raportita                 | \$783 |
| S-ino G. Stanway, Creswick, Vik. | 6     |
| S-ro E. Bantick, Hobarto         | 5     |
| S-ro M. Leereveld, Melburno      | 10    |
| S-ro Stan Kelly, Melburno        | 5     |
|                                  | <hr/> |
|                                  | \$809 |

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 218 (298)

MELBOURNE

OKTOBRO, 1984

---

## LA A.E.A. SOMERLERNEJO

7-a ĝis 19-a de januaro, 1985.

La Somerlernejo okazos denove en la bela Kolegio "Duval" de la Universitato de Nov-Anglio en Armidale.

Okazos 4 diversnivelaĵoj kursoj:

(1-e) Kurso por Post-Komencantaj;

Instruos Marjorie Duncan. Por profiti de tiu kurso necesas, ke partoprenantoj jam studis almenaŭ unu lernolibron (kiel "Esperanto Teacher", "Practical Course", "Jen Nia Mondo") Kursanoj bv. kun portu vortarojn de John Wells kaj Montague Butler, Elementan Studlibron de Ken Linton, "Step by Step" de M. Butler. La celo de tiu kurso estos: Studado pri gramatikaj punktoj, kritika, legado de rakontoj, skeĉoj kaj poemoj, konversado, diskuto kaj kantado. Tiuj kiuj deziras povos kandidatiĝi por la Elementa Ekzameno.

(2-e) Kurso por Progresintoj.

Instruos Ray Ross.  
Studlibroj estas: "Studlibro por la Supera" (Ken Linton), "Paŝoj al Plena Posedo" (W. Auld), "Step by

Step" (M. Butler), "Apokrifoj" (Karel Capek). Dum la kurs-periodoj ekzercoj pri rekta tradukado donos praktikon pri tiu flanko de la Supera Ekzameno.

(3-e) Aplikata Lingvo Grupo. Instruos Ralph Harry.

Aplikado de Esperanto per diskuto kaj traduko el: kolekto de "Monato", Ĉefaj Antologioj, "Fonto", "Sciencita Revuo", Ĉarto de UN., Deklaracio de Homaj Rajtoj, Artikoloj pri Arto. Sporto: "Saluton Amiko", "Sporta Terminaro" (Nagy) Diskoj, sonbendoj, kasedoj, kantlibroj.

(4-e) Literatura Stud-Grupo.

Instruos: Trevor Steele.  
Tiu grupo studos: "La Infana Raso" (W. Auld), "Kiu semas plorante" (Tofalvi/Knichal), "Kinkas Akvo-bleko" (Amado), Krome oni uzos gazetojn "Literatura Mondo", "Fonto", "Literatura Foiro", "Monato", Bonvolu alporti kiel eble plej malnovajn fotojn.

**Kostoj:** Por la tuta periodo (7a ĝis 19a jan., 1985) \$366. Por malpli longa restado: \$31 por unu nokto. Tio inkludas ĉiujn manĝojn, unu-litan ĉambron kaj la uzon de ĉiuj sportejoj, naĝejoj de la Kolegio. Sendu vian deponmonon de \$30.90 al **Joan Green, 146 Coal Point Rd., Coal Point, NSW, 2283.**

**Ĝis nun aliĝis:** Evon Arthur, Sylvia Burkitt, Wre Chandler, Marj Duncan, Ann Gash, Joan Green, Bill kaj Sheila Leah, Terry Metherall, Malcolm Ross, (ĉiuj NSK.); Jean Lehane, Merle Packham, Ray Ross, Trevor Steele, Carson Thomas, Joyce Turner (ĉiuj Kvinlando); Eric Hewitt, John kaj Margaret Mills (Okc. Aŭstralio), Ralph Harry A.C.T.)

## ĈIRKAŬ LA MONDON KUN LA FREMDA SERVADO

de William P. Vathis (Usono)

Okaze de mia vizito al la Aŭstria Esperanto-Kongreso mi estis kaptita de la redaktoro de "Aŭstria Esperantisto", kiu petis ke mi afable skribu iom pri miaj spertoj dum preskaŭ du jardekoj da vivado kaj vojaĝado tra la mondo en la usona diplomata servado. Ha, jen S-ro Ralph Harry subite vekigas por atenti ĉu miaj travivaĵoj similas al liaj. Eble ne, kvankam ni eltrovis ke ni ja havis komunajn konatojn.

Sed unue mi ne preterlasu la ŝancon esprimi miajn tutkorajn dankojn al la Aŭstria esperantistaro pro boneco kaj afablecoj al mi dum la 24a kongreso. Ĉio estis bone aranĝita kun interesaj ekskursoj, komfortaj loĝejoj kaj precipe elstaris la muzikaj kaj teatraj vesperoj. Mi tute ne atendis, ke la gesamideanoj en Aŭstralio estas tiel diversnaciaj!

La jaro: 1951. Mia unua posteno: **Hong Kong.** Mi forte dubas, ĉu al okcidentulo ekzistas urbano pli ekzotika, pli romantika, pli mistera, malproksima-orienta ol tiuj du vort-sonoj: **Hong Kong!** Certe unu el la plej kosmopolitaj metropoloj de la mondo, tutplena de la plej interesaj aferoj por vidi kaj esplori. Kaj, same kiel Sydney ĝi posedas mondfaman, belegan havenon.

Per diplomata aŭtomobilo oni portis min al bonega hotelo ĉe la "Kowloon"-flanko de urbo. Kiam mi registriĝis min ĉe la hotelo mi rimarkis, ke unu el la oficejaj laborantinoj, kiu zorgis pri la registrado, estas tre ĉarma ĉina fraŭlino. Kiu povus pensi, ke tiu bela orientulino fariĝus mia edzino post kvar jaroj? Sed tia estas la sorto kaj

vere, neniu povas antaŭvidi la estontecon.

Komprenable, dum la 2½ jaroj, kiam mi loĝis kaj laboris en Hong Kong, mi povis bone esplori la multegajn, senkomparajn vidindaĵojn de tiu metropolo kaj mi sukcesis ĉe-esti mian unuan fremdlandan Esperanto-kongreson en Nagoya, Japanujo. (Dum la antaŭmilitaj jaroj mi ja partoprenis multajn kongresojn en Usono kaj Kanado aranĝitajn de la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko—EANA—asocio, kiu ekzistis jam en la tempo de Zamenhof—sed jen finfine mi kongresis en eksterlando.) Mia kongresvizito al Nagoya estis des pli interesa pro la fakto ke por multaj japanaj gesamideanoj mi estis la unua fremdlanda esperantisto, kiun ili iam renkontis, kaj eltrovis, ke Esperanto vere funkcias kiel pontlingvo. Pasis pli ol 30 jaroj, sed ankoraŭ hodiaŭ ni daŭre havas interkontakton.

Post mia deŭoro en Hong Kong mi trovis min en la urbo **Cali, Kolombio.** Tiu sudamerika urbo situas en bela valo, kvar gradojn norde de la ekvatoro kaj havas bonegan klimaton. La tagoj estis varmaj, sed ne tro kaj la noktoj malvarmetaj. Oni povis naĝi ĉiutage en la jaro, vintre kaj somere mi uzis la naĝejon sur la tegmento de la hotelo kie mi restis.

Okaze de vizito al nia ambasadejo en la ĉefurbo Bogota mi rimarkis, ke oni ofte devas porti palton kaj pluvmantelon kaj daŭre grumblaĉas pri la vetero. Kut'ma ŝerco, "hieraŭ la suno brilis por kvin minutoj." "Kun ĝojo mi rekuris al bela Cali je la fino de mia

dumtempa laboro en Bogota. Eble la plej notinda afero por mi estis, ke mi sendis flugbileton al Hong Kong, por ke mia fianĉino venu al mi kaj en Cali ni geedziĝis.

**Sekvonta posteno-Zagreb, Jugoslavio.** Sendube tiu estis por mi la plej verda (legu "esperanta") urbo, kiun mi persone trafis. Vigla esperanta vivo kaj diversaj grupoj regule kunvenantaj. Ofte oni renkontis gesamideanojn en la ĉiutaga vivo, ĉu ĉe doktoro, ĉu en la vendplaco, ĉu en fabriko, kiun mi vizitis, ĉu en vivendejo, kien oni iris portante propran vinbotelon, kiun oni plenigis el grandaj vinbareloj enmurgitaj.

Por la unua fojo mi estis en komunistanda. Sed envere mi ne trovis multan diferencon de vivado kompare kun aliaj landoj. Jes, tiutempe la homoj ne estis tiel bonhavaj; la ordinara civitano ne posedis aŭtomobilon nek aliajn luksaĵojn. Tamen, la popolo ja spertis iom da libereco kaj rajtis inviti gastojn en sian hejmon kaj fari reciprokajn vizitojn sentime. Je tiuj okazoj oni estis diskreta kaj ne babiladis pri politikaj aferoj.

Kelkaj impresoj restas. Oni aranĝis internacian foiron kaj Usono konstruis supermerkaton. Por la Zagrebanoj tio vere estis okulmalferma afero. Oni rigardis glaciigitajn manĝaĵojn kaj lernis uzi puŝverurilojn en la magazenoj. Post la foiro oni vendis la tutan aferon al la jugoslavoj kaj Zagrebo havis sian unuan supermerkaton.

Nia konsulejo situis ĉe ĉefangulo de la urbo kaj ni bone rigardis la paradojn kiam venis al Zagrebo altranguloj de aliaj landoj. Mi memoraĵ viziton de la egipta prezidanto Nasser. Venis ankaŭ delegacioj de Rumanujo kaj Polujo, inter aliaj. Kaj ofte la jugoslavaj soldatoj pretermarŝis nian konstruaĵon. Oni rimarkis, ke ili iom similas al la kimroj pro tio ke ili kantas bone kaj ofte. Certe ŝajnis, ke ili forte kantas melodian marŝkanton pri Tito ĉiufoje senescepte kiam ili preteriras la usonan konsulejon!

Ho jes, en Zagrebo naskiĝis mia unua filo. Frue en la mateno la edzino vekis min anoncante, ke la tempo venas. Mi dormeme stumblis al la telefono kaj babiladis sufiĉe de la serb-kroata lingvo por peti takson kaj ni bontempe atingis la hospitalon. Petro

baptiĝis de la angla episkopo de Gibraltaro, okaze de ties jara vizito al Zagreb. Entute, Zagreb estis unu el la plej ŝataj urboj por mi.

**Benghazi.** Certe tiu urbo pripensigas vin pri la dezertaj bataloj dum la dua mondmilito. Dek kvin jarojn poste ankoraŭ abundis memoraĵoj de la milito. Multaj konstruaĵoj ankoraŭ montris la militdetruojn kaj de tempo al tempo aŭdiĝis bruo en la haveno pro tio ke oni trovis minon en la maro kaj necesis forigi ĝin per eksplodo. Krome, unu nokton oni vekis nin ĉe nia apartamento. Kiam mi malfermis la pordon tie staris arabo kiu alparolis min arabe. Dormeme mi aŭskultis nenion komprenante, dankis, fermis la pordon kaj reiris al la lito. Post iom da tempo denove bruo ĉe la pordo. Ĉi-foje estis alia viro, kiu alparolis min angle, sciigante ke neeksplodigita bombo troviĝis en la tero tute apud ni ĉar oni intencis fari konstruaĵon tie. Necesis ke ni tuj foriru de nia hejmo ĝis kiam spertulo sendanĝerigus la bombon. Restis nenio alia por fari ol iri al la ambasadejo, kie ni pasigis la tutan nokton.

**Genova:** Tiu urbo en la norda parto de Italujo estis ĉarma kaj alloga loko. Ĝi situas ĉe la maro kaj oni povis fari vojaĝojn laŭ la bela marbordo kie troviĝis piktoreskaj urbetoj inter la montoj. Kaj tute proksime troviĝis la naskiĝdomo de la esploristo, Kolumbo, bedaŭrinde preskaŭ en ruinoj. Malgajaj memoroj Genova havas por mi, ĉar tie mia edzino mortis kaj estis enterigita.

**Madrid.** Tiu estis mia nova posteno kaj certe interesplena metropolo. Mi klopodis forgesi, ke juŝ mi fariĝis vidvo kun kvarjara filo. Kompreneble Madrid havis multe da vindindaĵoj kaj mi konatiĝis kun sufiĉe da ili. Mi menciis, ke mi loĝis tute proksime al la angla preĝejo kaj notinde estas ke en tiu katolika lando oni ne permesis publikan mencion, ke tie staras anglikana preĝejo. La tabulo simple anoncis "preĝejo de la brita ambasadejo". Mi ankaŭ sukcesis trovi la solan ortodoksan preĝejon en tuta Hispanujo. Ĝi konsistis el du-tri ĉambroj en modesta apartamento, sen ia anonctabulo ekstere-nur kruco. La diservoj okazis en la greka kaj rusa lingvoj.

Sed plejmulte mi ŝatis dum la semajnfinoj viziti la faman Pradomuzeon kaj

admiri la ĉefverkojn de la famaj hispanaj artistoj, precipe Goya, Valasquez kaj El Gruco.

(Daŭrigota)

## "KONSULTU LA KONSILANTON"

"Pura Lingvo" skribas: "Ĉu dialektoj ekzistas en Esperanto?"

Kara "Pura Lingvo": Ne! Ideale, dum vi ĉeestas internaciajn konferencojn, vi ne povas aŭdi ĉu la parolanto estas franca, germana aŭ brita. Fakte kelkaj landanoj havas proprajn problemojn pri prononcado de kelkaj sonoj. Ekzemple japanoj malfacile prononcas la literon "l" (krubo" anstataŭ "klubo"). Aŭstralianoj devas esti zorgemaj diri "jaro'n anstataŭ "d'jaro'n.

Kelkaj landanoj uzas kelkajn vortojn pli ofte ol aliaj landanoj. Ekzemple germanoj emas uzi "malhela"n kiam ni dirus "malluman"n. Francoj emas uzi "trista"n, ne "malfeliĉa"n kaj evitas kiel la peston la uzadon de la sufikso "ujo", por landaj nomoj. Ili diras Francio, neniam Francujo.

Krom tiaj malgravaj ekzemploj, ĉiuj Esperantistoj parolas sammaniere.

—Konsilanto.

"Pensema" skribas: "Ĉu belaj virinoj estas stultaj?"

Kara "Pensema": Ĉu vi estas "vira, ŝovin'sta porko", kiu malestimas virinojn, kiuj estas pli inteligentaj ol vi? Aŭ ĉu vi estas jaluza virino, kiu envias la belecon kaj la inteligentecon de iuj aliaj virinoj? Mi serĉas motivaĵon malantaŭ via demando. Eble mi estas tro suspektema, eble vi faras seriozan, honestan demandon. Do jen la respondo:

La "stulta blondulino" estas kreitaĵo de Hollywood. Laŭ nia scio NE ekzistas iu ajn korelacio inter beleco kaj inteligenteco. "Konsilanto" opinias ke ŝi estas nek nebela nek malinteligenta.

—Konsilanto.

—"Novan someran robon mi bezonas", venas la deklaro desur la edzinaj lipoj. "En miaj malnovaj ĉifonoj oni rigardas m'n kuiristino."

—"Invitu ilin tagmanĝi", respondas la edzo. "kaj ili tuj ekkonos la araron." (Hungara Vivo)

## KORESPONDADO KUN LA ESTRARO

Leterojn pri ĝeneralaj aferoj bv. sendi al la Prezidanto (Mac Le Fevre) aŭ Sekretario (Marj. Ellyard). Leterojn pri specialaj aferoj sendu al aliaj estraranoj laŭ iliaj komisioj:

Ralph Harry: Eksterlandaj aferoj kaj AEA Biblioteko.

Erenda Birkett: Kasisto.

Herbert Koppel: "Australian Esperantist"

Ray Ross: Universala Kongreso, Historio de AEA

Pri aliaj komisiitoj vidu la AEA Adresaron.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **ADELAJDO:** La 11-an de septembro George Clarke montris filmojn pri siaj pasintaj ferioj en la Nov-Hebriidoj (Vanuatuo), Nov-Kaledonio, la Filipinaj Insuloj, Singapuro, Ĉinio kaj Tajlando.

Je 17-a de septembro nia bonvena gasto estis s-ino Marieke Bax el Nov-Zelando, kiu venis al Aŭstralio por viziti sian filinon en Perto.

Je la 9-a de oktobro ni preparolis la venontan Zamenhof-vesperon. Post tio sekvis diskuto pri la tendenco de anglingvanoj laŭplaĉe ŝanĝi la vokalsonojn de la angla lingvo kaj kelkfoje enkonduki tiun kutimon en Esperanto.

—Bob FELBY.

● **MELBURNO:** La Perta "ambasadoro" Chris Dean estis la gastparolanto dum la kunveno de la Melburna E-Societo je 13-a aŭgusto. Li montris diapozitivajn pri Perto kaj la Kolegia Kongresejo por la 1986-a aŭstralia kongreso.

Je 27-a aŭgusto S-ro Errol Chick montris diapozitivajn pri vizito al Nov-Zelando. S-ro Ken Linton, 3/9, legis sian tradukon pri "The Drover's Wife" (La Brutpelstedzino), kiun li faris por la "Aŭstralia Antologio".

Marcelo Leereveld, 1-an de oktobro, daŭrigis sian prelegon pri lastatempa transmara vojaĝo. Ĉi-foje li montris diapozitivajn pri vizito al Jugoslavio, Francio, Nederlando kaj Britio.



● **KANBERO:** Dum la foresto de la Prezidanto (Ralph Harry) kaj la Sekretariino (Marj. Ellyard) ĉe la Pacifika kaj Universala Kongresoj, nia klubo feriiis. En septembro la klubo rekunvenis. Marj. Ellyard rakontis pri siaj spertoj en Portland, Oregon kaj Vankuvero, Kanado. Ralph Harry montris kolor-fotojn pri elstaraj kongresanoj.

Je la kunveno de la 2-a de oktobro, S-ro Ralph Harry, aliksikis ŝildeton sur novan libro-ŝranĝon kun la surskribo "S.W.G. (Sam) Ellyard, Kasisto de A.E.A., 1982-84".

● **MANLY:** Marjorie Duncan kiel program-organizanto anoncis interesan programon por la renkontiĝoj post la klasoj kaj por diversaj sociaj kunvenoj.

Dum la trimestro ni ĝuos lumbildojn kaj paroladojn prezentatajn de niaj vojaĝintoj Les kaj Bess Scott, Arthur Cocking, Betty Cleminson, Edna Giles kaj Beryl Loh.

Ni estis feliĉaj ricevi de Tokio la novaĵon, ke Majo Issobe edziniĝis lastan juncon. Ni gratulas la geedzan paron, kiu intencas viziti Aŭstralion la venontan februaron.

La 25-an de septembro, en la Eduka Centro, Manli-anoj bonvenigis la "Pertan Ambasadoron" Chris Dean, kiu montris kaj priskribis allogajn lumbildojn. Poste ĉiuj kunvenis en la hejmo de gastamaj Les kaj Bess Scott por babilado kaj vespermanĝo.

—EUNICE GRAHAM.

● **BRISBANO:** La ĉiusemajnaj klasoj daŭras ĉiun lundon en la klubejo kaj momente estas 6 komencantoj, kun ebleco de kelkaj aliaj dum oktobro. Ĉirkaŭ 20 anoj de nia grupo partoprenis la federacian konferencon ĉe Gatton dum la semajnfino 29/30-a de septembro. Antaŭ nelonge Chris Dean, el Perto, vizitis nin kaj li ĉeestis la klubejon kaj partoprenis viziton kun la anoj de St. Lucia al la nova Brisbana Flughaveno. Chris nuntempe veturas per aŭto al kelkaj lokoj en norda kaj centra Kvinslando. —R.R.

### NEKROLOGO

Mortis en Brisbano la 20-an de okt., 1984, Oscar Hugo Behncken. Li esperantiĝis kiam studento en Warwick, Kvinslando, kie li konatiĝis kun C. C.

Dornbusch, frua spertulo de la Internacia Lingvo. Oscar aliĝis al la Brisbana Societo en 1925 kaj restis ano ĝis 1964. Li estis Vic-Prezidanto kaj Kasisto 1933-34, Bibliotekisto 1928-39, Kas-Kontrolisto 1954-64. Li estis UEA-Delegito en Brisbane de 1928 ĝis 1938. Li vizitis la malfermon de la Kvinslanda E-Muzeo en 1981. Al S-ino Behncken, kiu ankaŭ estis ano de la Brisbana Societo, ni esprimas kondolencojn. — Ray Ross.

### MORTIS MARSHALL COHEN

Regula ĉeestanto ĉe kunvenoj de la Melburna Esperanto-Societo dum pli ol 50 jaroj estis S-ro Marshall Cohen, kiu esperantiĝis en 1919. Ĉiuj kiuj renkontis lin admiris liajn bonkorecon kaj amikan sintenon kaj alte taksis lian ĉiaman helpemon.

Dum multaj jaroj li estis Sekretario/Kasisto de la Melburna Societo., en kiu ofico li ofte kontribuis al la gastigado de transmaraj kaj aliŝtataj vizitantoj. Li estis ankaŭ Prezidanto de la iama "Rendevuo", monata kunveno dediĉita al pli altnivelaj programoj kaj Esperanto-konversado. Krome li partoprenis plurajn aŭstraliajn kongresojn kaj lia kunlaboro estis grava kontribuo kiam kongreso okazis en Melburno.

Lastatempe lia partopreno en kunveno maloftiĝis, unue pro la diversaj malsanoj de lia edzino kaj poste pro propra malfortiĝo.

Marŝalo, kiu naskiĝis la 19-an de novembro 1902, mortis je 15-a de septembro, 1984, en Fairfield, Melburno. Post funebra ceremonio en Preston, li estis kremaciita ĉe Fawkner je 18-a de sept., 1984. Ĉeestis la ceremonion Mesanoj Ken Linton, Herbert kaj Fay Koppel kaj S. Kanacki. — Fay Koppel.

### EL LA FEDERACIOJ

**Kvinslando:** La dua konferenco de nia Federacio okazis en Gatton, la 29/30-an de septembro, 1984, kie 30 anoj partoprenis tre agrablan kaj plensukcesan semajnfino. Ni loĝis, kunvenis kaj stariĝis distraĵon en la Motelo Gatton. La kutima "Alportu kaj aĉetu-budo" provizis kontentigan profiton. Bonvena vizitanto estis Fratino Cecilia, kiu instruas Esperanton al speciala klaso en la loka

Katolika Lernejo, Jim Dimo aperigis ampleksan artikolon en la loka gazeto, sed eĉ tio ne allogis vizitantojn al nia ekspozicio kaj konferenco.

**Sabaton:** Dum la ĝenerala kunveno oni decidis, unuanime, **malakcepti** respondecon de kondiĉo de UEA, pri la garantio de \$5000 al UEA, rilate al la profito dum la projektita Univ. Kongreso en 1988. La normala jardonaco de \$200 al la Esperanto-Domo-Fonduso estis aprobita. Oni ricevis raporton pri la konferenco aranĝita en Buderim (Sunbrila Marbordo) por marto, 1985. En oktobro, 1985 oni aranĝos la konferencon en taŭga loko je la Ormarbordo. Gilbert Shonham klarigis pri la finfinaj detaloj rilate al korporaciigo de EFK; la laŭleĝa nomo estas en la angla "The Esperanto Federation of Queensland, Inc." Klubraportoj jene: Brisbane (Tom O'Grady), Toowoomba (Jean Lehane), St. Lucia (Annie Spencer), Rockhampton/Emu Park (Joyce Turner).

**Jarkunveno:** Estraro por 1985 jene: Prez: Ray Ross; Vic-Prez: Tom O'Grady; Sek: Decia Shonham; Kas: Nan McGuckin; P.R.O.: Peggy Ross; Red.: Ray Ross Komitatanoj: Annie Spencer (St. Lucia), Joyce Turner (Rockhampton), John Moore Emu Park); Doris Sinclair (Sunshine Coast).

Ĉiuj tre ĝuis frandan vespermanĝon kaj iom da elektita trinkaĵo. Jean Rasey gajnis hazard-ludon (premio estis portebla vekhorloĝo, donacita de Kay Anderson). Cliff Bailey kapable estris aŭkcion de diversaj varoj.

**Distra Vespero:** Jennifer Dimo akompanis, per akordiono, kantgrupon de Brisbane kaj kantparon, Kay Andersen kaj Gaye Phillips, kiuj prezentis du aborigenajn lulkantojn, kaj la postan komunikadon. Jim Dimo, ludis per akordiono plurajn malod'ojn dum intervaloj. Rakan-tantoj estis Tom O'Grady, Ruth Morrison, Jean Lehane; Annie Spencer solkantis kaj Cliff kaj Margaret Bailey sketĉetis.

**D'manĉon:** Vizito per aŭtoj al Lago Clarendon por rigardi akvo-birdojn, due al Digo Atkinson, tre agrabla piknikejo kaj akvo-sportejo; trie vizito al Tropika Fruktujo/Arbvaritejo, kie ni aŭskultis dum kondukita rondiro, al priskriboj pri ekzotikaj fruktarboj el multaj landoj, entute pli ol 50 specoj, kiuj plejparte

prosperas en ĉi tiu nekutima fruktarbojo.

Tre kontentiga semajnfino. —R.R.

● **VIKTORIO:** La ĉiujara Seminario de la Federacio okazis je 1-a de septembro, 1984, en la hejmo de Ges-roj J. Fallu en Okleigh. Dudek unu Esperantistoj el kvar Melburnaj grupoj partoprenis (lastjare 26), inter ili ankaŭ 13-jara studento, kiu mem instruis sin per libro el la Publika Biblioteko.

S-ino Fay Koppel, en du sesioj, gvidis traduk-ekzercojn. Ges-roj Tuman, f-ino Ann Hearn kaj s-roj Fallu, Kanaĉki kaj Koppel prezentis paroladetojn en la matena sesio. Postgmeze la Waverley-grupo prezentis Esperanto-kantojn kaj S-ro Koppel aŭdigis surbendigitan paroladon de la antaŭa aŭstria ŝtata Prezidento Franz Jonas, kiun tiu faris, kiam li inaŭguris la Universalan Kongreson en Vieno, 1970.

Vespere, ĉeestantoj rakontis pri elstaraj travivaĵoj aŭ priskribis memorindajn filmojn.

La Seminario daŭris de la 9.30-a matene ĝis la 9-a vespere kaj la ĉeestantoj havis la oportunon ekzerci en konversado dum ili manĝis. Dankon al Ges-roj Fallu kaj aliaj membroj de la Oakleigh-grupo por glata servado de multaj manĝoj.

---

## NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto  
Bun'ichi Iizaki)

La 71-a Japana Esperanto-Kongreso okazis la 18-an, 19-an kaj 20-an de aŭgusto, 1984, en la urbo Morioka, en nordorienta parto de Japanio. Partoprenis 170 japanaj esperantistoj kaj deko da koreaj kaj germanaj esperantistoj.

En la kongresurbo estas nur malforta movado kaj pro tio aktivuloj el Tokio, Yokohama, Sendai kaj Osaka aktive helpis en la Organiza Komitato. Plenumiĝis interesa programo. La lokaj gazetoj kaj radio-stacioj detale raportis pri la kongreso, speciale pro la partopreno de la fama poeto Kenzi MIYAZAWA kaj la internaciisto kaj scienculo Inazo NITOBE.

El la ses gravaj prelegoj elstaris tiuj de Yosimi UMEDA pri "Lastatemaj

agadoj de UEA", de Charles ROWE pri "Kion mi travivis en Korea Respubliko kun esperantistoj kaj de D-ro Dieter KLEEMANN, pri "Du aktualaj problemoj en Germanio".

Okazis multaj fakaj kunvenoj kaj diskutoj pri la vigligo de la movado en la nordorienta parto de Japanio kaj pri planoj por la jubileo de Esperanto en 1987.

**UNIVERSALA KONGRESO — BRISBANO, 1988.** La projektita UEA-Kongreso en Brisbano dum 1988 ankoraŭ estas eblo. Ĝis nun intertraktado inter S-ro Roland Lindblom (Komisiito de UEA pri Kongresoj) kaj la Loka Kongres-Komitato daŭras. Kelkaj punktoj, rilate al financaj kaj aliaj aferoj, restas traktandaj. Intertempe, la fino de novembro ĉi-jare, estas la limdato por decido ĉu aŭ ne kongresi en Brisbano.

—Ray Ross.

**LETERO AL LA REDAKCIO**

S-ro A. Cocking meritas laŭdon pro siaj legindaj biografiaj skizoj de aŭstraliaj verdstelanoj. Mi ĉiam legas ilin.

—Bernard GOLDEN.

**MONATO — Reviviĝo !**

Ĝoju ni, ke "Monato" reviviĝis. Sed ni devas labori, por certigi, ke ĝi daŭre vivos. Mi persone garantiis, ke dum la venontaj 3 jaroj estos minimume 50 abonoj el Aŭstralio:

Tion farante, mi fidiĝ al la subteno de AEA kaj ties tuta membraro, kiu certe komprenas la unikon kaj gravon de nia gazeto. Ĝi estas la nura ilustrita periodaĵo en Esperanto, kiu regule raportas pri eventoj (politikaj, ekonomiaj, kulturaj, sportoj, k.t.p.) ĉie en la mondo kaj laŭ internacia vidpunkto. Ĝi estas la nura magazino en Esperantujo, kiu regule entenas novaĵon nemovadan pri Aŭstralio!

Mi fidiĝ ankaŭ al la ĉefredaktoro, Stefan Maul, kiu daŭre redaktos en la stilo, kiun li evoluigis dum la pasintaj 5 jaroj. Tio garantias, altnivelan redaktadon. Ĝi estas la plej bona konvinkilo ke Esperanto funkcias!

La Direktoro de Flandra Esperanto-Ligo, kiu administras la eldonadon, kun grava admin'stra kaj financa helpo de la Grafika Centro de UEA en Antverpeno,

informis min, ke, se la nombro da abonintoj atingos 2200, estos 12 numeroj en 1985. Do, tio estas la celo, kaj la "kvoto" de Aŭstralio estas "minimume 50". En 1984 estas 42 abonoj. Mankas 8 !

Mi petas al ĉiu AEA-ano kunlabori laŭ sia financa kapablo:

- Se vi jam abonis "Monaton", bonvolu tuj aboni por 1985 kaj se eble ankaŭ por 1985-1987.
- Se vi ĝis nun neniam abonis, se eble abonu almenaŭ por 1985.
- Se vi ne povas pagi, kaj via asocio aŭ klubo ne abonis, persvadu vian klubon tuj aboni.
- Eĉ se vi jam abonis, kaj via klubo ankaŭ abonis, sed nepre se vi ne povas pagi, kaj ne estas klubo en via urbo, bonvolu persvadi vian publikan, universitan, kolegian, gimnazian aŭ lernejan bibliotekon aboni "Monaton"!
- Se ĝis nun vi ne vidis "Monaton", aŭ deziras specimenan ekzempleron por donaci al biblioteko, skribu al la peranto:

S-ro K. G. Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntly, Vic., 3163. Jara abono aviadite ekspedata, \$25, mare ekspedata \$20. "La Jaro" kalendaro, nur por abonantoj \$2.50.

Vivu MONATO !

—R.L.H.

**BELETRA KOMENTO**

La abonantoj de "Hungara Vivo" havas la privilegion ĝui bonegan eseon pri la poetinoj en nia Esperanta mondo far Georgi Mihalkov. Li mencias ok tre bonajn poetinojn, sed tri ĉefajn Marjorie Boulton, Hilda Dresen kaj Eli Urbanova. Li komentas la stilon de la tri, donante elĉerpajojn el iliaj poemoj.

**HILDA DRESEN:** Ŝia poezia rigardo estas direktita ekskluzive al la ekstera reala mondo, kiu mondo inspiras ŝin per sia eterna harmonio. Kiam ni legas la poemojn de Hilda Dresen, ni havas la senton, ke ŝi plej bone sentas sin nur ekstere, sub la vasta blua ĉielo, inter la florantaj arboj, aŭ sur la longa neĝa vojo Eble tial, konstantaj elementoj de ŝia poezio estas la ĉielo, la neĝo, kaj arboj kaj kvazaŭ la kvar fundamentaj substancoj: aero, fajro akvo kaj tero,

formas ŝian poezion mondon.

Kirlante neĝon furioze  
sur ebenaj galopas vent'  
ĝi flugas, flugas senripoze,  
ne haltas ĝi eĉ por moment'.

**MARJORIE BOULTON:** En la poezia mondo de Hilda Dresen regas la harmonio, en tiu de Marjorie Boulton regas la konfliktoj. Se Dresen direktas sian rigardon al la ekstera mondo, Boulton rigardas en sin mem, se Dresen evitas mediti pri la pensoj kaj sentoj, Boulton detale, profunde analizas ilin. Boulton obstine serĉas respondon al la eternaj demandoj: "Kiu mi estas?" "Kial mi vivas?" kaj la celo de la poetino estas, kiel trafe ŝi mem diras: "min de mi senvesti."

Duone mi dresadas la ĉevalon,  
mian sovaĝan karnon. Mi sukcesas  
per brido\*, volo, vipo, mi ĝin  
dresas,

ĝi konas mian voĉon kaj signalon.  
(\* en la artikolo estas la vorto "birdo",  
kiun mi ŝanĝis, ĉar ĝi ŝajnas pre-  
seraro).

**ELI URBANOVA:** Simile al Dresen, ankaŭ Urbanova bilde perceptas la realan mondon, kaj simile al Boulton, Urbanova ankaŭ enpenetras en la sekretojn de la ina animo, sed kompreneble ĉi tiu komparo relativas, ĉar laŭ sia poetika mondpercepto Urbanova estas nek Dresen nek Boulton, sed tute individua voĉo en nia poezio. Unu el la ĉefaj motivoj en la poezio de Urbanova estas la amo, Urbanova detale esploras ĉiujn nuancojn de la amo, kaj ankaŭ serĉas respondon al la eterna demando: "Kio estas la amo?"

En sonĝo nur  
ni pekas sen pudoro,  
regataj de pasi',  
en sonĝo nur  
mi tra feliĉa ploro  
diradas al vi: ĉi!

Tiuj estas nur tre malgrandaj specimenoj el la tripaĝa artikolo, sed se iu dezirus la tutan, mi povas sendi kontraŭ pago de unu dolaro por kovri la fotokopiadon kaj afrankon.

—Ken G. Linton.

**VIR'NOJ SEN VUALO:** La italaj dungitinoj de la aerkompanio "Iran Air", deorantaj en Romo, ne havas la devon

surmeti ĉadoron, la tipan tukon de la iranaj virinoj, kiuj per ĝi kovras parton el sia vizaĝo. La roma juĝistaro, al kiu, plend'is la kvar italaj dungitinoj, ja decidis ke la postulo de la kompanio malobservas la intalan Konstitucion kaj la leĝaron pri laboro: fakte ne temas pri "uniformo", kvazaŭ "laborvesto", kiun la dungitinoj devus efektive surmeti, sed pri la apliko de principoj de la islamana kredo, kiuj ne povas esti altrudataj al personoj kun aliaj religiaj konvinkigoj.

La t. n. "milito de ĉadoro" komenciĝis antaŭ kelkaj monatoj en pluraj eŭropaj urboj (Londono, Parizo, Ateno), kie, sub minaco de tuja maldungo, la oficistinoj de irana aerkompanio ricevis la ordonon surmeti tunikon kaj kaptukon. Ankau en tiuj urboj okazis juraj plendoj, sed la lokaj juĝistoj ankoraŭ ne eldonis sian verdikton.

(A. De Salvo en la Esperanto-emisio de Radio Roma)

**SOLENAĴO PRI MENDEL:** La figuro de Gregoro Mendel estis memorigita, okaze de la unua jarcento de la morto, dum kunveno kiu havis lokon ĉe la Universitato de Viterbo (100 km norde de Romo). La aranĝo enkadrigis en la solenajoj, kiujn pluraj eŭropaj ŝtatoj dediĉis al la konata bohema monaĥo, al kiu ŝuldiĝas la formulado de la leĝoj pri heredeco. Temas pri leĝoj ankoraŭ nun validaj, kiuj konsistigas la bazojn de genetiko, nome de tiu scienco, kiu pristudas la karakterizojn de la vivantaj estuloj kaj strebas al ilia plibonigo.

(A. De Salvo en la Esperanto-emisio de Radio Romo)



**EL POPOLA ĈINIO:** La 1985-a abonvarba kampanjo de EL POPOLA ĈINIO jam komenciĝas. Ek de 1-a de nov., ĝis la 28-a de feb., 1985. Tiu, kiu abonas aŭ reabonas en tiu periodo senpage ricevos koloran Esperantan kalendaron por 1985, kaj mapon de la Ĉina Popola Respubliko en Esperanta eldono.

**Abontarifo:** 1 jaro \$9.00, 2 jaroj \$15.00, 3 jaroj \$21.00. Sendu al K. G. Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntly, Vic. 3163. Tiu, kiu varbas novan abonanton ricevos ĉinstilan memoraĵojn.



Registered by Australia Post.

Publication No. VBH 1849.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

**Prezidanto:** M. LeFevre, M.L.C, 231 St. John Street, Launceston, Tas., 7250.

**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

**Kasisto:** F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 219 (299)

MELBOURNE

NOVEMBRO, 1984

## AŬSTRALIA-ESPERANTA VORTARO

### Dua eldono preparata

Partoprenantoj en la 24-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso en Kanbero ricevis ne nur specialan eldonon de "Australian Esperantist", kantlibron kun muziko, liston de la kongresanoj, kaj flugfoliojn en Esperanto pri la Nacia Artgalerio, sed ankaŭ ekzempleron de Aŭstralia-Esperanta Vortaro, kompilita de grupo en la Somera Lernejo de A.E.A. en Armidale, en Januaro, 1983.

Ĉi tiu vortaro, verŝajne la unua vortaro de la aŭstralia lingvo kun ekvivalentoj en alia ne-angla lingvo, celis ĉefe helpi al tradukontoj de pecoj por la Antologio de Aŭstralia Literaturo, kiun nia Asocio eldonos en 1987 aŭ 1988. Ĝi entenas ĉ. 700 vortojn kaj frazerojn. Sed la kompilintoj esperis, ke ĝi estos plibonigita kaj pligrandigita ĝis punkto kiam ni povos prezenti ĝin al la Esperantistaro kiel helpilon por tiuj, kiuj deziras legi la plenajn aŭstraliajn verkojn, el kiuj troviĝos elserpaĵoj en la Antologio, en la originala—t.e. la aŭstralia lingvo. Ĉi tiu havas multajn vortojn kaj esprimojn, kiuj mankas aŭ malsimilas en la angla de Britujo.

En la vortaro estis invito sendi sugestojn por la dua eldono al la redaktoro, 8 Tennyson Crescent, Forrest, ACT, 2603, Aŭstralio\*. Kaj mi jam ricevis kelkajn pozitivajn komentojn. William Auld skribis: "Ĝi certe estos al ĉiuj utila (mi devos fari similiajn por skotoj!)...". Andre Albault, la Prezidanto de la Akademio, sendis sugestojn pri 22 terminoj. Li konsilis, ke "se la vortaro estu legata de ne—Aŭstralianoj devus esti signoj, kiuj montru al kiu kategorio apartenas vortoj, almenaŭ kiam tio ne estas evidenta: u urboj, b botaniko, z zoologio, m mineralogio, p politika vivo ktp ktp". Mi ricevis multajn sugestojn de Volo Gueltling, kaj kelkaj ankaŭ de Alan Towsey kaj Wre Chandler. Volo enmetis la tutan tekston en sian komputilon kaj mi esperas, ke ni havos novan elpreson de ĉ. 1000 vortoj por diskutado kaj revizio dum la Somerlernejo en Armidale venontan Januaron.

\* Restas kelkaj ekzempleroj de la Unua Eldono. Membroj de A.E.A. b.v. sendi poŝtmarkojn de \$1, eksterlandanoj 2 resp. Kuponojn. Ralph Harry.

## ĈIRKAŬ LA MONDON KUN LA FREMDA SERVADO

de William P. Vathis (Usono)

(Daŭrigo)

De Madrid mi faris vojaĝojn al naciaj Esperanto-kongresoj en Hispanujo (Valadolid kaj Barcelona), Svisujo kaj Germanujo kaj partoprenis mian unuan Universalan Kongreson en Danlando. Mi ankaŭ libertempis dum kelkaj tagoj en Portugalujo kaj sukcesis renkonti manplenan da gesamideanoj en Lisbono—tiutempe Esperanto ja ne spertis plenan librecon en tiu lando. Eble la plej grava afero tiutempe estis, ke mi renkontis belan germanan samideaninon ĉe la nacia Esperanto-Kongreso en Wurzburg. Poste ŝi fariĝis mia edzino kaj ĵus ni festis nian dudekjaran edziĝ-datrevenon. Ho jes, dum la unuaj jaroj de nia geedziĝa vivo ni devis interparoli esperante ĉar ni ne povis interkompreniĝi pere de la naciaj lingvoj. Hodiaŭ mi ankoraŭ ne scipovas germanan lingvon, sed Erika estas vera spertulino en la angla, aŭ pli ĝuste, usona lingvo.

Eble vi nenian aŭdis pri Nogales, Meksiko. Nu, ĉe la usona-meksika landlimo troviĝas la ĝemelurboj Nogales: ĉe la usona flanko Nogales, Arizona kaj ĉe la meksika flanko Nogales, Sonora. Vere, ne estas io menciinda pri Nogales. Ĉe landlimaj urboj, pli ĝuste urbetoj, facile kaj tute senĝene oni transiras la limojn. Notinde estis, ke la meksikanoj preferis sendi siajn infanojn al la usona flanko por ĉeesti lernejojn—je kosto al la usonaj impostpagantoj. Vere, tiom da meksikanoj troviĝis en la komencaj lernejoj, ke multe de la tempo oni uzis instruante la anglan lingvon al ili, preskaŭ ne atentante la usonajn studentojn. Efektive, mia filo tiom enuis pro tio, ke li pasigis multan tempon trarigardante enciklopediojn.

Estis en Nogales ke mia dua filo naskiĝis. Ni loĝis sur la meksika flanko. Okazis ke mia graveda edzino prenis min en la aŭtomobilo al la oficejo kaj la filon al la lernejo. Tiam ŝi sentis la komencajn naskodolorojn kaj aŭtomobilis al la usona doktoro. Li ordonis, ke ŝi atingu la hospitalon. Do, ŝi iris tien, lasis la aŭtomobilon, eniris la hospitalon kaj anoncis al la surprizataj

fratin-flegistinoj ke ŝi pretas naski infanon. Rapidege oni metis ŝin en liton kaj kelktempo poste oni informis min (ke 1) knabo naskiĝis kaj 2) mia aŭtomobilo troviĝas ĉe la hospitalo. "Sed sinjoro, ne tuj venu—vi rajtas veni nur multe pli malfrue! Do, Mike naskiĝis kaj poste li baptiĝis en la usona angla (episcopal) preĝejo de nova juna pastro, kiu faris sian unuan infanbapton. Tiel nervoza li estis, ke li preskaŭ faligis Mike!

Kaj nun-Kairo. Denove en araba lando, sed ĉi-foje en la fama metropolo Kairo. Kompreneble ni kaptis la okazon por viziti la piramidojn kaj la sfinkson. Tamen la vivkondiĉoj ne multe diferencigis de tiuj en Benghazi—klimaton, manĝaĵojn, ktp. oni ne povis rigardi kiel pliajn. Tamen oni filozofie akceptas tion, kio venas, ĉar tio ja estas la vivo en la Fremda Servado.

Post kelkaj monatoj erupciis la Sesta Milito inter la judoj kaj araboj. Kaj jen aperis grandaj homamasoj ekster nia ambasadejo, laŭte hurlante. Envere, ili ne estis amikaj aŭ simpatiaj al ni usonanoj. Ni ja sciis, ke iom da tempo antaŭe oni bruligis la USIS-bibliotekon en Kairo. Feliĉe la polico retenis ilin kaj ne okazis damaĝo. Tamen, oni decidis elsendi la virinojn kaj infanojn al "sendanĝera haveno" kaj Ateno, Grekujo, estis la elekto. La viroj restis en Kairo. Dum unu semajno mi estis en Kairo, efektive nenion farante krom rigardi la homamasojn ĉirkaŭ la ambasadejo kaj pensante mia familio—precipe Erika, kiu estis graveda.

Fine ankaŭ ni viroj devis foriri, Prenante mian valizon mi kaj aliaj homoj sukcesis atingi la fervojan stacidomon sen malfacilo. Tie regis granda konfuzo; civiluloj kaj soldatoj interpuŝiĝis kaj oni rekonis nin la usonanojn. Malamikajn rigardojn kaj iom da kraĉado ni ricevis, sed feliĉe nenian batojn. Senevante ni elvagoniĝis en Alexandria, kie aŭtobusoj atendis nin. Tuj oni kondukis nin al hotelo ekster la urbo—for de la homamasoj por nia propra sekureco, laŭdire—

kaj tie ni restis por unu semajno. Ni tute ne rajtis iri ekster la hotelo kaj pasigis la tempon manĝante, ripozante kaj legante la anglalingvaj tagjurnalojn, kiuj priskribis venkon post venko de la araboj! Plena propagando! Ni atendadis ĉar nia registaro klopodis trovi transporton por ni el la lando. Fine post unu semajno greka ŝarĝŝipo venis al Alexandria. Tiam ni prezentis nin ce la egipta dogano, kie oni zorgeme traserĉis ĉiujn valizojn kaj forstelis aĵojn. Eĉ oni forprenis monon de individuoj je la preteksto, ke oni eliras kun pli da mono ol oni deklaris je alveno. Atendante en vico mi rimarkis tion kaj rapide kaŝis dolarbiletojn en miaj ŝuoj tiel evitante tiun ĝenon. Fine ni eliris la doganejon trapasante soldatojn kun maŝinpafililo kaj suriris la ŝarĝŝipon. Kiam ni estis ekster la nacia akvolimo, usona batalŝipo eskortis nin al Ateno senevente.

En Ateno nia familio rekuniĝis. Post multaj malfaciloj nia filo naskiĝis. Post du knaboj ni esperis havi filinon kaj jam elektis nomon "Athena" (kompreneble por ŝi. Sed la sorto decidis, ke venu filo kaj post ioma pripensado li nomiĝis. Andrew kaj estis baptita en la greka ortodoksa preĝejo. Ni ja rigardis la vidindaĵojn de tiu antikva urbo kaj nenecesas diri kiom multe plaĉis al mi esti en la lando de miaj prapatroj kaj vidi la simbolojn de la antikva gloro de Grekujo!

En la aŭtuno de 1968 ni estis senditaj rekte de Ateno al nia nova kaj lasta transmara posteno—**Beirut**. Ankorau ne eksplodis la granda, furioza milito, kvankam oni sentis kvazaŭminacojn de estonta batalado. Ni trovis Beirut tre bela urbo—la financa centro de la mezorienta mondo, moderna, progresema loko. Bela, varma vetero altiris al la marbordo kaj facile en malmulte da tempo oni veturis per aŭtomobilo supren al la montoj por skiadi. Proksime situis la antikva urbeto Byblos, laŭdire la plej malnova loko en la mondo daŭre enloĝata.

Malgaje ni vidas kiel tiu bela lando treege detruigis de la terura, daŭra milito. I a grandega eksplodo ĉe la usona ambasadejo pasintjare ŝokis nin kaj mi rememoris la multajn horojn, kiujn mi pasigis en tiu konstruaĵo, ĉar miaj ĉiutagaj laboroj prenis min de la kelo al la tegmento. Tamen mi ĝojas, ke unu el

miaj libanaj kunlaborantoj travivis la acan aferon, kvankam li estis supersutita de granda rubaĵo inkluzive de peza betono. Forte ni esperas ke, paco revenos al tiu malgaja kaj kompatinda lando.

Diversaĵoj . . . Oni diras ke la slavaj popoloj bone regas la verdan lingvon kaj kvankam mi ne estas spertulo pri tiu afero, mi ja konstatis, ke la jugoslavoj bonege parolas la lingvon. Persone mi eitrovigis, ke ne gravas en kiu lando mi troviĝas—ĉu okcidente, ĉu oriente—tuj kiam mi komencas paroli esperante oni informas min: vi estas usonano! Ĉu ekzistas usona akcento? Sajnas ke jes, almenaŭ por mi . . . En Zagrebo mi kelkfoje vizitis blindul-lernejon, kie instruis blinda samideano. Mi alportis dolĉaĵojn por la infanoj; poste la samideano-instruisto informis min, ke liaj studentoj fanfaronis al la aliaj studentoj—ho, ni havis ion kion vi neniam manĝis. Temis pri tiu mola usona dolĉaĵo "alteo" . . . Tiu manĝaĵo kiu estas populara ĉe usonanoj kaj ŝajne, aŭstralianoj, "arakidobutero" tute ne estis ŝatata de la jugoslavoj . . . Foje en Meksiko kelkaj virinoj venis al la pordo kaj Erika respondis. Tiutempe ŝi tute ne komprenis hispanan lingvon, do ŝi vokis la malgrandulon Petro, kiu ja loĝis kun mi en Madrido kaj iom scipovis la lingvon. Li informis sin ke ili "Volis preni duŝon." En mia hejmo, mirigite pensis Erika. Nu bone, eble estas la kutimo en tiu ĉi lando. Eniru kaj faru duŝon! Fine, post ridetoj kaj ridegoj la afero klariĝis. Oni ja invitis Erika al infanduŝo! . . . Tri tagojn mi libertempis en fama Parizo. Pluvegis dum la tutaj tri tagoj! Tri tagojn mi libertempis en fama Venice. Pluvegis dum la tutaj tri tagoj! Ega bonŝanco, ĉu ne?

Mi esperas, ke oni eltiris intereson el tiu hazarda kolekto da personaj spertoj de internacia familio sur kvar kontinentoj. Vere mi ĝuis tiujn vivospertojn. Kaj mi ĝojas ke mi sukcesis viziti la kvinan kontinenton Aŭstralion. Kiu scias, eble mi sukcesos fari estontan vojaĝon tien.

#### Dum tribunala ekzameno

—La juĝisto: "Kial vi ŝtelis biciklon en la tombejo?"

—La akuzito: "Mi pensis, ke la posedanto mortis!"

(Bertil Englund)

## REMEMOROJ PRI D-ro CALDERA

Kiam mi leviĝis kaj iris al la Prezidanto de la Esperanto-Ligo, F-ino Ottilie Stempel, por ricevi el ŝiaj manoj atestilon pri sukceso en elementa kurso de Esperanto, malalta, rondkapa viro sin turnis kaj mi konstatis pri penetra rigardo de liaj malhelaj okuloj. Mi jam sciis, ke tiu sinjoro estas Doktoro Caldera, en kies klaso mi verŝajne studos dum la venonta jaro. La okazo estis Zamenhoffesta kunveno en la Kafejo Reno, Perth; la jaro 1945. Mi ne estis studinta en klaso de la Ligo, sed, fininte la kurson ĉe la Teknika Lernejo en la urbcentro, rajtis fari ekzamenon de la Ligo.

Dro Caldera gvidis du sinsekvajn klasojn por la Ligo, 'mezgradan' de la 7-a vespere ĝis la 8.30a kaj 'altgradan' de la 8.30a ĝis la 10a. Mi informiĝis ke mi rajtas, se mi volas, aliĝi al ambaŭ kursoj. Alveninte en la komenca vespero de la nova jaro, mi rimarkis ke la kursgvidonto sidas ĉe unu fino de longa, mallarĝa tablo, do tuj elektis sidlokon proksime de la alia fino. Sed malproksimo ne donis sekurecon. Li ne bone audis iun respondon kiun mi faris per malforta, timema voĉo kaj priridis min. Kiam finiĝis la 'mezgrada' studhoro mi fuĝis de la ĉambro, ankoraŭ konsternita, kaj por konsoli min iris sola al kinejo. Tamen, kiam alvenis denove la klasvespero, mi jam decidis, ke tiu homo ne plu misafidos min kaj mi lokigis min ĉe lia dekstra kubuto — kaj mi restis ankaŭ por la 'altgrada' klaso. Sed mi baldaŭ konvinkiĝis, ke mi elektis tro 'varman' lokon kaj post du-tri semajnoj provis sidigi min ĉe la meza parto de la tablo. Dro C. malprobe rigardis min kaj per la dekstra pugno forte frapis sur la tablo. "Frazilino", li vokis, "jen via loko!" Kaj mi, poltrono, obeis.

En tiu loko oni nepre devis labori — respondi al demandoj, voĉlegi el lernolibroj, eĉ foje skribi sur la nigra tabulo, ĉar 'la Doktoro' celis ankaŭ eduki eventualajn instruantojn. Mi bone memoras, ke iun vesperon, kiam mi sentis, ke mi jam tro longe plenumis la legtaskon, post interveno por ion precizigi, li diris al mi: "Daŭrigu!" Mi laŭte vespiris. "Kio estas al vi?" li iom sarkasme demandis, "Ĉu vi sentas svenemon?" "Jes", mi respondis patose, "Mi sentas svenemon." Li tiris la okulvitrojn ĝis la nazpinto kaj

atentege min observis trans ili. Subite mi rememoris, ke li estas kuracisto kaj miaj vangoj ardis. "Svenemon? Kun tia vizaĝo". Li tamen transdonis la taskon al iu alia.

Kiam alproksimiĝis la fino de la 'altgrada' kurso li montris al mi la kursfoliojn de la traduka rondo de F. R. Banham. "Ĉu plaĉus al vi aliĝi?", li demandis. Kun timo mi forŝovis la foliojn. "Ne", mi respondis, "ne, dankon". "Negrave," li replikis. "Mi jam abonis por vi!"

Principe li malaprobis societajn aŭ distrajn kunvenojn; ĉiam li instigis al studado de la lingvo kaj ĝia literaturo kaj al la partopreno al ekzamenoj kaj konkursoj. Li volis, ke mi partoprenu al la Literatura Konkurso de la Rendevuo-Klubo de Melburno. Vane mi protestis ke mankas al mi talento por fikcio. "Do, ion reverku el libro aŭ revuo!" Fine mi konstatis, ke ion mi devos elgurdi por silentigi lin, sed la verketo ne plenumiĝis ĝis preskaŭ la jarfina limdato. En la fina vespero de la jaro mi sidis sola en la oficejo post la 5a por tajpi ĝin. Traleginte la tajpajon mi sentiĝis ĝin tiel aĉe netaŭga, ke mi forte volis ĝin jeti en la rubujon. Sed venis al mi la penso: sendube Caldera ekscios, ke mi tamen ne partoprenis! kaj mi ne kuraĝis neniigi mian provon. — Ruth McGrath.

## Nia Famekonata Poetino:

Ĉiu esperantisto, krom la novbakita vera komencanto, bone konas la poezian talenton de nia amata poetino, Marjorie Boulton, kiu mastras ĉiujn fazojn de la poezia arto, kaj nombrigaŝ inter la plej talentaj en la historio de nia lingvo, kaj pri kiu Georgi Mikhalkov pretendis lastatempe en tre interesa artikolo en Hungara Vivo, ke ŝi rangas kun Hilda Dresen kaj Eli Urbanova, kiel la tri plej elstaraj poetinoj ĝis nun.

Li klarigis per bone elektitaj versoj, kiel Hilda Dresen superas en poemoj pri la naturo, kaj Eli Urbanova eminentas en poemoj pri la sekretoj de la ina animo, sed Marjorie Boulton mastras ĉiujn kampojn.

Apud tiu artikolo aperis poemo far Marjorie Boulton. En ĝi ŝi elegante pruvigas sian talenton pri la rimo. La mesaĝo estas sendube la plej grava aspekto de poemo, sed la rimo kaj la ritmo estas la necesaj ornamaĵoj. Mi ĉiam sentis, ke la ĉefa punkto pri tiuj du



ornamaĵoj estas tio, ke ili plene efiku en tiu rolo sen tro forte trudi sin al la leganto, kaj ĝuste pro tio poetoj evoluigis teknikon por kamufli tiujn du ornamaĵojn.

En la jena poemo, nia tre kara poetino pruvas, ke ŝi kapablas pri la plej komplika kaj do la plej sentruda rimaranĝo, kio, kun ŝia perfekta kvinjamba ritmo, ve tas poemon kun atentokapta mesaĝo.

—Ken G. Linton.

### Al la edzino de mia amato.

Mi amas vin, ĉar lin vi vere amas,  
kaj brodas ore, geme, milkolore,  
la amon, kiun mi nur diagramas.

Vi konas liajn mankojn, sed adore  
karesas, trankviligas, flegas lin  
al li rilatas sune kaj sunfloure.

Vi estas m'a vera amikin';  
vi amas lin; vi iĝas lin feliĉa;  
ho, daŭru tiel ĝis la vivofin'.

En via amo sankte senkondiĉa  
vi faras pli ol mi kapablas fari  
por li, ho nobla koro sindediĉa,

Kaj via amo devas min forbari  
de li; kaj t'on mi akceptas plene;  
al mia Kara mi ne rajtas kari.

Sed vidu m'n komplete kaj komprenu;  
ho malavara koro, min ekskuzu;  
ĉe li vi nepre tronas suverene;

Ne timu m'an amon; ne jaluzu;  
vi feliĉigas lin; kaj mi — mi scias.  
Feliĉa restu li; feliĉon uzu.

Ne t'imu m'n, ĉar kvankam mi pasias,  
sur ŝtormoj krucumita kvazaŭ kajto —  
mi nur pri amo mem apelacias —

Sufera, elementa Homa Rajto.  
—Marjorie Boulton.

### PROF. D-ro IVO LAPENNA 75-JARA

La 5-an de novembro, 1984 Prof. D-ro Ivo Lapenna fariĝis 75-jara kaj el Danlando ni ricevis omaĝan deklaron subskribitan de pli ol 80 elstaraj esperantistoj, i.a. de nia Ralph Harry, de la prezidanto de la Akademio, D-ro A. Albault, D-ro Paul Neergaard, Reto Rosetti kaj Prof. Gaston Waringhien.

La 8-an kaj 10-an de decembro, 1984,

estos la 30-jaraj datrevenoj de la konsultaj rilatoj de UEA kun UNESKO kaj de la fama Rezolucio de UNESKO favore al Esperanto, du el la multaj grandaj atingoj de Ivo Lapenna.

Nur kelkajn monatojn post la ellerno de Esperanto en 1928, D-ro Lapenna aktivis en la Studenta E-Klubo en la Zagreba Universitato. D-ro Lapenna restis intense aktiva sur ĉiuj niveloj kaj en ĉiuj sferoj de la Esperanto-Movado, tiel ke en la nuna jaro kompletigas 55 jaroj de lia seninterrompa kaj sindona laboro por Esperanto.

Per sia unika teoria verko RETORIKO, Ivo Lapenna levis la esperantlingvan parolarton al la plej altaj suproj de en-hava profundo kaj forma beleco.

La brila nomo de Prof. D-ro Lapenna, internacie rekonita scienculo en sia jura fako kaj ĉie alte respektata, pozitive markas tutan epokon en la historio de Esperanto. Ni apogas lian plej novan iniciaton: digne celebri la centjaran datrevenon de Esperanto en 1987 per komunaj fortoj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj. Ni deziras al li multajn pliajn jarojn da sukcesa faka-sciencia laboro kaj fruktedonaj poresperantaj agadoj.

Omaĝe al Prof. Lapenna okazos solenaĵo je la 15-a de decembro en la "Grey Moltkes Palaco" en Kopenhago.

(En la Deklaro oni diras, ke Prof. D-ro C. J. Adcock loĝas en Wellington, Aŭstralio.)

## "KONSULTU LA KONSILANTON"

"What is the best way to learn Esperanto? — New Student.

Dear New Student,

Welcome to the Club! Perhaps you can profit by what Francis Bacon wrote. He said: "Reading maketh a full man; conference (conversation) a ready man and writing an exact man". Then he adds a witty reminder: "And he who readeth little must needs have a present wit (i.e. be pretty smart) to seem to know that (which) he doth not"

Reading familiarises you with necessary words and how to use them. Therefore, read as much as you reasonably can. Don't worry if you don't translate every word. Concentrate on the words you can understand and get the general sense.

Conversation (albeit one-sided conversation) increases your rate of thinking in Esperanto. Don't be scared by your mistakes and hesitance. If you can't think of the word you want, use another one, e.g. if you don't know "my grandfather", say "the father of my father". Talk, in short, simple sentences, to the dog, the cat, the canary, the mirror. When you have learned a few new words, try them out by ringing an Esperanto friend.

Also **wr.te** things down. Correspond and thus open up windows on the world. It's easier than you think!

Happy learning. — Konsilanto.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTO:** 'Eble la ĝis nun plej sukcesa', estis la jugo de la partoprenintoj pri nia ĉi-jara kampara semajnfino. En Junulargastejo ĉe bela Mundaring kunvenis 12 esperantistoj (20-21 Okt) por riĉigi sian lingvoscion per studado, amuzo kaj komuna vivado. Bonega programo elpensita de Gordon Gregson (helpate de Shirley Gradussov) kaj harmonia etoso estis la ĉefaj ingrediencoj de la sukceso. 'Ne nepre ne atendu jaron antaŭ ol denove sperti ion tian' estis la opinio de pli ol unu kontenta partopreninto

Krom tio, jes ja, okazis ordinaraj klubkunvenoj. 26/9 estis la vespero de la 'Reaperantoj', sed ili estis neniel fantomecaj. Raportis Prezidanto Rene Smeets pri spertoj en Francio kie, i.a. li partoprenis la SAT-Kongreson, kaj en Sovetio; Galena Sliwa pri vojaĝo trans Azio kaj Eŭropo; kaj Owen Loneragan pri partopreno kiel Prezidanto de la loka filio de la Asocio por Unuiĝintaj Nacioj en tutlanda konferenco de tiu organizo en Kanbero. Oni bonvenigis vizitanton el Novzelandio, S-inon Marieke Bax. 10/10: Ni bonvenigis la revenintan Chris Dean kaj aŭdis pri liaj vizitoj al diversaj samideanoj en orienta Aŭstralio. Dro Einihovici parolis pri la diversaj raportoj pri kongreso.

Ĉeftemo de la kunveno 24/10 estis diskuto pri informado surbaze de multnura letero, kiun skribis Jim Dimo al Vera Pavne Vera ankaŭ raportis pri sia vere gratulinda sukceso aperigi artikolon

pri Esperanto en la gazeto ASIAN MAGAZINE. —R.McG.

### DOROTHY ISABEL DEAN 1912-1984

En la nokto de la 17a de majo forpasis la amata "Dolly" Dean, post longa kaj kuraĝa barakto kontraŭ kancero. Energia, gastama, ridetema, ĉiam ŝi lojale subtenis la edzon Chris, sed en la lastaj dudek jaroj de ŝia vivo ŝia rolo evoluis al ĉiam pli aktiva partopreno en klubaj aferoj. Ŝia malfrue floranta aktora talento sin plej elstare montriĝis en la kadro de la Adelajda Kongreso. Tamen, antaŭ ĉio oni rememoros sin kiel varmkoran gastiganton, ĉu de lokaj grupanoj, ĉu de esperantistoj el aliaj partoj de Aŭstralio aŭ el aliaj landoj. Multnombre la ĉi-tiea esperantistaro ĉeestis la kremacion ĉe kiu kortuŝe omaĝis la forpasinton Pastro Alan Brodie, mem esperantisto.

● **ADELAJDO:** Je 29-a de oktobro ni havis la plezuron bonvenigi ĉe ni AEA-sekretariinon Marj. Ellyard. Ŝi rakontis pri la Universala Kongreso en Vankuvero kaj pri la proponita U.K. en Brisbano, kiu verŝajne tute ne okazos.

Je 6-a de novembro okazis nia lasta ordinara kunveno por la jaro. George Clarke prezentis du leterojn de Ralph Harry pri U.K. en 1988 en Brisbano kaj pri proponita vizito de Marjorie Boulton al Aŭstralio. Nia Zamenhofa Vespero okazos je 8-a de decembro.

● **MELBURNO:** Dek ses membroj de la Melburna, Oakleigh- kaj Waverley-grupoj ĉeestis, 29-an de oktobro, la ĉiam popularan "Amerikan Teon" ("Alportu donacon — aĉetu donacon"). Post vigla aĉetado de diversspecaj varoj kaj lotumado de kuko (kiun gajnis f-ino Eva Trainor), ĉeestantoj refreŝigis sin per abundaj bongustaj. La fina enspezo estis \$52.83, kiu sumo estis proporcie distribuita inter la 3 kluboj.

Semajnon poste Ken Linton legis denove amuzan, tradukitan rakonton.

● **KANBERO:** Je 5-a de novembro la klubo aranĝis "Germanan Vesperon". Nia klubo ricevis broŝurojn el la urbo Rastatt, kiu festas sian 900-jaran jubileon, kaj de la urbo Augsburg kaj Munĥeno. Membroj povis inspekti librojn de Schiller, Heine, Goethe kaj aliaj aŭtoroj en Esperanto-tradukoj. Prezidanto Ralph Harry, kiu estis aŭstralia ambasadoro en



**LA "A.E."  
SUBTEN — FONDUŠO  
1984**

|  |       |
|--|-------|
| Antaŭe raportita .....                       | \$809 |
| Ges-roj R. Felby, Adelajdo .....             | 20    |
| S-ro Harold Gilbert, Cairns,<br>Kvinsl. .... | 10    |
|  | \$839 |

**NOVAJ LIBROJ**

(Mallongigoj: B. ilustrita, I-por infanoj,  
G-Geografio, N-Romano, S-Teknika,  
L-Legolibro, b-broŝurita)

|   |       |        |
|---|-------|--------|
| "Hejmoj de Birdoj" — Ju Zi<br>BI 22b  |       | \$2.20 |
| "Amuza Legolibro en Esp."<br>—A. Lienhardt 216b                             |       | 8.30   |
| "Retoj" (komputilado)   | S 64b | 4.10   |
| "Vivo de S K Csoma", —<br>F. Szilagyi N 150b                                |       | 7.95   |
| "La Tuta Esperanto" —H. Seppik<br>183b                                      |       | 7.95   |
| "Febro"—I Nemere N 132b   |       | 7.95   |
| "Elpafu la Sagon" — T. Sekelj<br>P 150b                                     |       | 11.55  |
| "Kiu Semas Plorante" N 106b<br>Eva Tofalvi & Oldrich Knichal                |       | 6.65   |
| "La Faraono" — B.Prus/Kabe<br>(3 voluma)                                    |       | 33.15  |
| "Ĉu vi konas la Teron" —<br>E. Dudich 150b                                  |       | 5.45   |
| "Vojaĝo tra Orienta Afriko" G 16b   |       | 2.90   |
| "Tiel Diru"—Esperanta baj Franca<br>SAT 127b                                |       | 5.00   |
| "Vivo de D-ro Zamenhof en Bildoj"<br>H. Thien MB 128b (artpapero)           |       | 12.85  |
| "Ekcfuturo" Bulgara Esp.S. S 418b   |       | 9.90   |
| "Historio de la E-movado en<br>Ĉeĥoslovakio" S. Kamaryt M252b               |       | 8.45   |
| "Esperanto, The International<br>Language W. J. Downes 204b<br>(Tekstlibro) |       | 11.40  |
| "Faktoj kaj Fantazio" — M.<br>Boulton M432b                                 |       | 15.65  |
| "Tekstoprilaboro" (komputilado)<br>S 64b                                    |       | 4.10   |
| "Dilemoj de la nuntempa<br>Hungario" N 100b                                 |       | 6.45   |
| "Johano la Brava"—S. Petofi<br>P 60b  |       | 6.45   |
| "Eŭlalia"—Lorjak N188b  |       | 10.35  |

**Mendu de: A.E.A. Book Service,  
P.O. Box 230, Matraville, NSW 2036**

● **NOVA SUD-KIMRUJO:** La Ĝenerala Kunveno okazis la 22-an de septembro, nur 13 membroj ĉeestis. La raporto de la kasisto, kompilita de James Harwood, montris kontentigan staton. Pro tio oni decidis, ke la membro-kotizo restu la sama por 1985, nome \$4. (Oni sendu ĝin al la kasistino, S-ino Eva Matasin, 1 Coorabin Rd., Northbridge, 2063). Sekretario estas S-ino M. Chaldecott kaj Redaktoro e "Telopeo" s-ino J. Green.

La Zamenhof-Festo okazos sabaton, 15-an de decembro en la Esperanto-Domo en Redfern. Festparolonto Prof. R. Robertson.

Edzino al sia tre avara edzo: "Ni devos aceti jaluziojn por la fenestroj de la ĉambro de nia filino. Si jam estas preskaŭ matura, ŝi senvestigas sin tie, kaj la najbaro ĉiam rigardas ŝin.

La avarulo ne povis dormi kelkajn noktojn. Post kelkaj tagoj la edzino ripetis sian postulon. La edzo respondis al la edzino: "Neniajn elspezojn ni havos! Kelkajn tagojn vi senvestigu vin en la filina ĉambro, kaj jaluziojn acetos la najbaro!" (Bud. Inf.)

**KOLUMBO VOJAĜAS AL AMERIKO:** Kristoforo Kolumbo denove ŝipveturas al Ameriko. Ĉi tiun fojon, tamen, li elektis pli komfortan vojaĝon: anstataŭ per karavelo, li navigadas per la moderna kontenerŝipo "Acadia", de la duonŝtata ŝipkompanio "Italia". Kaj, kompreneble, ne temas pri la vera Kolumbo, sed pri lia statuo el marmoro de Kararo. La alvena haveno estas Baltimoro. La granda statuo estos inaŭgurita okaze de la "Tago de Kolumbo", per kiu la usonanoj solenas la datrevenon de la malkovro de Ameriko.

Temas pri festo, kiu daŭras pli ol unu semajnon, kaj kiu vidas la italdevenajn usonanojn en privilegia pozicio, dank' al la komunaj "radikoj kun la malkovrinto". La statuo de Kolumbo, zorge pakita kaj ŝirmita en tiucela ujo, estis mendita de la itala-usona komitato de Baltimoro.

(D-ro A. DeSalvo en la Esperanto-Emisio de Radio Romo)

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

**Prezidanto:** M. LeFevre, MLC, 231 St. John Street, Launceston, Tas., 7250.

**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

**Kasisto:** F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

**N-ro 220 (300)**

**MELBOURNE**

**DECEMBRO, 1984**

---

## SALUTON

Kvankam mi ĝin timis, tamen mi akceptis ĉe la Kanbera Kongreso tiun gravan kaj kompreneble honoran oficon: Prezidanto de nia movado en Aŭstralio. Kia tasko sekvi en la spuroj de nia ĉiame laboranta eksprezidanto, S-ro Ralph Harry, kiu tiel sukcesege estris nin dum la kvar jaroj de sia ofico!

Multaj samideanoj ĉeestis la kongresojn en Adelajdo kaj Kanbero kaj tiuj kongresoj tre sukcesis sub la gvidado de nia tiama Prezidanto. Nun estas mia vico por klopodi simile helpi kaj plifortigi Esperanton en nia lando.

Certe, pli da anoj de A.E.A. estas strebenda celo, sed ankaŭ la forteco de nia movado dependas multe de la nivelo de la entuziasmo kaj speciale la unueco de la anaro — gardu ĉiam la unuecon, ĉar sen ĝi ia ajn 'ŝiparo' estas en grava danĝero.

Ne forgesu ĉeesti la Somerlernejon en januaro 1985, se tio eblas al vi, kaj memoru ankaŭ, ke la Perta Kongreso okazos post iomete pli ol unu jaro, kio ne estas longa tempo por plani tiun ĉeeston.

Volonte mi provos 'prezidi' bone, sed mi bezonos, petas kaj atendas la helpon de vi ĉiuj. Skribu — mi invitas viajn

konsilon kaj ideojn pri kion fari en la plej bona intereso de Esperanto en Aŭstralio.

La plej feliĉajn salutojn al vi ĉiuj, speciale por la Kristnaska Periodo.

—Mac LeFevre

---

## UNIVERSALA KONGRESO- BRISBANO 1988

Kelkaj asocioj esprimis koncernon pri la kosto de la proponita Kongreso, sed mi devas informi vin ĉiujn, ke ekzistas nenia kialo por paniko. La raporto en "Telopeo" evidente kaŭzis koncernon, kaj tio estas komprenebla, ĉar vere, novaj, postuloj estis faritaj; ne precize kiel "Telopeo" mencias, tamen tre seriozaj.

Sed ĉiuj povas esti kontentaj, ĉar via Estraro, kune kun la Brisbana LKK, bone atentis la aferon. S-ro Ray Ross, nome de la LKK, informis la UEA-estraron pri kongresoj, kaj mi mem informis S-ron Maetens (Prez. de UEA), ke la nove postulitaj kondiĉoj estas tute ne akcepteblaj.

Negocoj daŭras laŭ peto de la UEA-kongresestraro, ke ni ne fermu la pardon kaj atendu ties pluajn konsiderojn. Plej probable estos decido post ne longe — eble ĉe la Somerlernejo. Memoru, mi petas, ke nia asocio mem

invitis, ke la kongreso okazu en Aŭstralio en 1988. Do, kondiĉe ke la tiamaj reguloj ne ŝanĝiĝis, ni havas la devon daŭrigi la aranĝojn por sukcesigi tiun grandan kongreson.

Lasu min ripeti — por emfazi la gravan punkton — la postuloj menciitaj en "Telopeo" tute ne aplikas.

Kiel eble plej baldaŭ mi informos vin pri la fina decido.

—Mac LeFevre, Prezidanto

## LETERO AL LA REDAKCIO

Novajoj koncerne la Universalan Kongreson en Brisbano 1988, kiuj el diversaj fontoj atingis nin, estas malbonaj. Nia komitato bedaŭras, ke la estraro de UEA postulas garantiitan sumon de \$5000, dudek kvar senpagajn aerbiletajn, senpagan loĝadon.

Mi ĵus relegis "Zamenhof — Aŭtoro de Esperanto" de Marjorie Boulton. Kia diferenco inter niaj estraranoj kaj D-ro Zamenhof, kiu rifuzis akcepti la vojaĝ-kostojn de Varsovio al Parizo por ĉeesti mondkongreson en 1905, kvankam Zamenhof entute vivis neluksan vivon! (Peritano)

### "Study the International Language"

Jen la titolo de artikolo en "The West Australian". La Kolegio por Altgrada Eduko en W.A. komencis kurson en Esperanto dank' al la forta insisto, talento, entuziasmo kaj ĉarmo de Vera Payne. Ŝi aranĝis — fakte kreis — la oficialan instruplanon kaj instruos la klason por instruistoj.

Ĝis nun ni ne havis klasojn en oficialaj lernejoj, ĉar mankis kvalifikitaj instruistoj. Mankis kvalifikitaj instruistoj, ĉar ni ne havis klasojn en lernejo. Nun, espereble, la bedaŭrinda ĉeno rompiĝis.

Gratulojn Vera!

Arthur Cocking (Komisiito por Lernejoj)

### Esperanto-Kurso en la Okcident-Aŭstralia Kolegio por Altgrada Eduko

En Februaro 1984 komenciĝis Esperanto-Kurso ĉe la Okcident-Aŭstralia Kolegio por Altgrada Eduko. Estas notinda okazaĵo pro tio, ke ĉi tiu estas

la unua oficiala kurso pri la Internacia Lingvo iam starigita en aŭstralia terciara instituto. Plue, ĝi ne estas kelksemajna mirindaĵo, sed ses-semestra (trijara) kurso.

"Ni semu kaj semu konstante", kvankam ni neniam scias ĉu la semo perdiĝos aŭ trovos fekundan lokon. Dum dek unu jaroj mi instruis Esperanton nokte en TAFE-klasoj al diversaj personoj, kaj ofte m'n demandis ĉu valoras la peno. Mi konstatis, ke la respondo nepre estas JES!

Unu el la studentoj de pasintaj jaroj Michael Williams (nun Prezidanto de la "Oral History Society of Australia") sukcesis en 1983 akceptigi Esperanton kiel unu el la elekteblaj temoj en la "School for Seniors"-programo, kiu unufoje semajne okazas ĉe la Mount Lawley kampuso de W.A.C.A.E. Troviĝis sufiĉe da entuziasmoj kaj lastjare mi gvidis tiun enkondukan kurson. Tiu estis nia unua Esperanto-paŝo en la koridoroj de W.A.C.A.E.

Dume, la E-Ligo de Okcidenta Aŭstralio kaj precipe S-ino I. Einihovici klopodis dum kelkaj jaroj interesi la edukinstancojn starigi kurson pri Esperanto por instruiststudentoj.

Dum mia foresto en Usono lastjare (kiam mi ĉeestis kurson ĉe San Francisco State University), Michael anstataŭis min en la klaso. Post mia reveno Michael informis min, ke okazas intereso pri Esperanto en la Kolegio. D-ro Ian Malcolm, ĉefo de la Departamento de Lingvo-Studoj, invitis min verki ses-semestran programon por Esperanto, taŭgan por la "Diploma of Teaching"-studentoj. Tion mi faris kaj la instancoj ĝin akceptis.

Tamen, ili postulis, ke almenaŭ 20 gekursanoj sin registru, inkluzive de almenaŭ unu "Dip. T."-studento. Tio estis malfacila tasko, ĉar interesuloj pri iu ajn lingvo estas malmultaj. Tamen, ni plenumis la postulojn, dank' plejparte al Idyss Einihovici, kiu riĉigis "Telecom" kaj 'tordis la brakojn' de ĉiu ajn ebla kandidato. Kvankam la plej bonaj studentoj estas la volontuloj, ni ne maltroigu la gravecon de tiu rikolto de Idyss, ĉar sen sufiĉa nombro, oni tute ne permesas la starigon de la klaso.

Kaj jen ni nun troviĝas meze de la dua semestro: 14 kursanoj, inkluzive de tre promesoplena studentino pri instruado. Tiu nombro estas sufiĉe impona kiam oni konstatas, ke restas nur 8

studantoj de la itala, kaj unu aŭ du de la portugala kaj la vjetnama. (Pro speciaa fonduso por ĉi du lastaj lingvoj, oni ne postulis iun ajn nombron minimuman por starigi klasojn tiajn). Do, bona komenco kaj progreso por Esperanto.

Kion ni faras dum nia ĉiusemajna kunesto? Ni utiligas kiel lernolibreton "Gerda Malaperis" de Claude Piron. Ĝi estis verkita speciale por komencantoj en la kurso en San Francisko. Kvankam ĝi postulas kroman preparadon fare de la kursgvidanto, ĝi motivas la lernanton pro sia interesa enhavo, kaj ebligas nin 'ludi' partojn de la verko kvazaŭ ĝi estus teatraĵo. Mi ne favoras la rektan metodon por komencantoj, trovinte, ke ĝi malŝparas tempon. Tamen nuntempe, meze de la dua semestro, ni uzas Esperanton tiom kiom, kaj eble eĉ pli ol, la anglan.

Ĉar ni kunestas dum 3½ horoj, gravas ke ni partoprenu diversajn laborojn por ne enuiĝi. Ni enkondukiĝas al nova gramatiko, praktikas bone prononci, aŭskultas aliajn Esperantistojn perkasede, tradukas iomete en kaj el la angla, kaj multe konversacias. Ni verkas poemojn, tradukas kantojn kaj kantas. Ni rolulas ankaŭ kiel musoj el "Esperanto por Infanoj" (bonega libreto por ĉiu infano 7 ĝis 90-jara). Hejmtasko estas deviga kaj tempopostula, sed neniam tediga. Ekzemple, la studentoj jam faris belegajn lernilojn, kies utilon ili demonstris antaŭ la klaso. Ili enkasedigis por mi dek-minutan historieton pri sia vivo, aŭ rakonton kies temon li ŝi mem elektis. Korvarmigaj estas la sincereco kaj diligento kun kiuj ĉiu plenumas sian taskon. Kelkaj jam faris parolojn antaŭ la Liganoj dum niaj vesperaj kunvenoj.

Ni utiligas muzikon por memstrankviligi nin, mi portas florojn kaj bildojn por starigi plaĉan etoson. Mi kuraĝigas altnivelecon de lernado kaj de Esperantiĝo. La celo estas fidi en si mem, unu en la alia, en la lingvo kaj en la movado.

Niaj partoprenantoj venas el diversaj laborfakoj. Inter ni troviĝas artistino, flegistino kaj diversaj emerituloj — inĝeniero, instruisto bankestro, arbaristo. Tre plaĉas, ke unu el la elstaraj lernantoj estas 19-jara studentino pri profesia instruado.

Ĉe nia kampuso, kvankam ĉiu lingvo estas ses-semestra, ĝis nun neniam trovi-

ĝis sufiĉe da studentoj de la diversaj lingvoj por eniri la duan jaron. Sed en 1985 ni esperas, ke Esperanto estos la escepto, kaj ke ĉirkaŭ 15 Esperanto-lernantoj registriĝos por la tria semestro.

Mi tre kontentas pri ĉi tiu klaso: kelkaj jam aliĝis al la E-Ligo, kelkaj al AEA. Pluraj montras intereson por ĉeesti aliajn E-aferojn, kiel la somerlernejon en Armidale, kongreson en Pekino. Komprenoble ĉiuj antaŭguas renkonti Esperantistojn el foraj ŝtatoj, kaj espereble, landoj, ĉe nia propra 1986-a kongreso en Perto.

—Vera Payne.

### LA PLI VASTA OL VASTA UNIVERSO:

Estas vere neeble por nura homo kompreni la kosmajn distancojn, ĉar ili estas tiel astronomie enormaj, ke ni ne posedas la sperton pri io komparebla, kaj do nia limigita menso estas tro venkita.

Ekzemple: por trapasi la grandegan distancon de miliono da kilometroj ni devus ĉirkaŭnavigi la terglobon ĉe la ekvatoro dudekkvinofoje, kaj se ni povus teni konstantan rapidecon de 114 kilometroj en hore, ni atingus la milionan kilometron je la 365-a tago de la jaro; tamen la rapideco de la lumo estas tiel grandega, ke ĝi povas trapasi milionon da kilometroj en iom pli ol tri sekundoj. Se ni povus vere veturi je ĉi tiu nebla rapideco dum iom pli ol ok minutoj, ni atingus la sunon, 154 milionojn da kilometroj for; sed por atingi la ekstreman l'mon de nia propra galaksio, la Lakta Vojo, estus necese, ke ni tenu ĉi tiun fantastan rapidecon dum pli ol 80 mil jaroj. Estas tute ne eble, kompreneble, ke ni plene komprenu tempon de okdek mil jaroj, havante nenian sperton, per kiu fari komparon; sufiĉas diri, ke nur dekonon de tiu periodo kondukus nin retren al la jaro 6017 A.K.; kaj tio estas pli ol mil jarojn antaŭ ol la Nila Valo estis enloĝata far la popolo, kiu poste konstruis la piramidojn, la plej malnovajn konstruaĵojn en la mondo.

Tiam, kiam ni konsideras, ke ĉi tiu Lakta Vojo, kies grandeco estas tiel preter nia kompreno, estas nur eta makuleto en la konata universo, nia limigita menso estas tute venkita.

Kaj preter la konata universo etendiĝas la nekonata, pri kiu ni estas nur svage konsciaj pro tio, ke niaj plej potencaj

modernaj teleskopoj ricevas lumon, kiu komencis sian veturon antaŭ ol nia eta planedo naskiĝis. Kaj ĉiom de ĉi tiu pli vasta ol vasta universo, kun siaj neakikuleblaj bilionoj da steloj, ĉiu de kiuj estas multmilionfoje la grandeco de nia terglobo, orbitas kaj turniĝas obee al grandega nevidebla fortego laŭ precizeco, kiu estas perfekta.

Ni simple povas diri, ke la timiga eterneco de la universo estas multe pli ol nia limigita menso kompreni.

—Kontribuis K. G. Linton.

## EMINENTULA MALSANO EN ESPERANTO

La Esperanto-alfabeto havas 28 literojn. La kvara litero estas ĉ; la naŭa litero estas ĝ; la dek-unua litero estas ĥ; la dek-kvara litero estas ĵ; la dudektria litero estas ŝ; la dudek-sesa litero estas ŭ.

Konsentite?  
Konsentite!

Sed, ĉu vi scias, ke tion ŝajnas ne kompreni pluraj eminentuloj de nia Movado, inter kiuj eĉ Akademianoj? Verkante artikolojn, leterojn k.s., kiam tiuj devas listigi punktojn, kaj elektas numeradi perlitere, ili senpardonpete ignoras la pure Esperantajn literojn kaj ordigas per a, b, c, d, e, f, g, ktp.

Tio ĝenas min. Uzante Esperanton ni ne hontu pri la specialaj literoj de ĝia alfabeto, sed aljuĝu al ili plenan ekzist-orajton.

Antaŭ kelkaj monatoj mi skribis al Profesoŝo Waringhien por esprimi tiun mian malŝaton, kaj por demandi, ĉu li kaj Kalocsay, kunaŭtoroj de la Plena Gramatiko, havis specialan kialon ne uzi la Esperanto-alfabeton okaze de listigo de klarigoj, ekzemploj ktp. en Plena Analiza Gramatiko. Li tuj respondis tre afable:

“Vi certe pravas pri la uzado de la ĉapelitaj literoj en la numerado; tiajn uzadis regule la kunlaborantoj de ‘Stafeto’. Kial ni ne uzis ilin en la PAG? Pro simpla oportuna aranĝo: la numerantaj literoj prezentas jam ĉe la kvara pozicio ĉapelon (ĉ), kaj ĉi tiuj ĉapeloj estas - estis, mi devus diri - malfacile

komposteblaj en la tempo, kiam la ‘Plena Gramatiko’ estis unue presita; Bleier disponis nur la ‘romajn’ ĉapelitajn literojn, sed ne la kursivajn nek la majuskulajn. Tial Kalocsay simple uzis la internacian serion a, b, c, d, ktp. Kaj de tiam, tiu farmaniero restis, ĉar ŝanĝi ĝin tra la tuta libro prezentis tro lacigan laboron. Pigreco bedaŭrinda!”

Mi ĝojis ekscii, ke ili ne simple, facilanime transsaltis la pure Esperantajn literojn, sed, verŝajne kun bedaŭro, cedis al la limigoj de la siatempa tekniko.

Kian specialan kialon tamen povas havi tiuj, kiuj nuntempe verkas kaj arogante diskriminacias kontraŭ la esence Esperanto-literoj? Ni akceptas, ke komputoroj ankoraŭ ne sufiĉe kompetentas en la Internacia Lingvo por povi senpere ĉion ordigi laŭ la Esperanto-alfabeto: ili estas nur beboj de la teknologio; ni donu al ili tempon maturiĝi. La samo, aliflanke, ne direblas pri nunaj skrib- kaj kompost-maŝinoj, sed en kiom da Esperanto-eldonaĵoj, ĉu modestaj bultenoj kaj revuetoj, ĉu prestiĝaj magazinoj kaj libroj, aperas ĉe la numerado la ĝusta, normala Esperanto-alfabeto?

Kontrolu mem.

Plej mirinde por mi estas, ke ankaŭ inter Akademianoj, tiuj eminentaj gardantoj de nia lingvo, estas iuj, kiuj tajpante, eĉ manskribante, artikolojn aŭ leterojn, forgesas, ke la ĉapelitaj literoj anto-alfabeto, kaj ilin preterlasas okaze de numerado perlitera Ĉu pro ‘pigreco’? Se jes, kiom bedaŭrinda!

—Audrey Childs-Mee—Rotterdam

## NACIA BIBLIOTEKO DE A.E.A.

La Biblioteko konstante riĉiĝas — ne finance sed en sia enhavo — dank’al donacoj de libroj, gazetoj kaj dokumentoj pri la Esperanto-Movado. La ŝranko “Sam Ellyard” estas jam plenplena, sed la bonvena fluo daŭras.

Kelkaj donacintoj preferas, ke ni ne publikigu iliajn nomojn. Tamen ni dankas ĉiujn.

Speciale grava estas la malavara decido de F-ino Hertha Mueller de Sidnejo



donaci la tutan kolekton de sia frato Fritz, kune kun malmuntebla bretaro. Tio estas tre valora aldono al la libraro.

**Ser.o Oriento-Okcidento**

Dum la 24-a Aŭstralia Kongreso la Kanbera Esperanto-Klubo aranĝis ekspozicion en la Biblioteko de la Aŭstralia Nacia Universitato.. La Klubo nun esploras la eblecon organizi, en la Aŭstralia Nacia Biblioteko, specialan prezenton de la Serio Oriento-Okcidento, per kiu U.E.A. kunlaboras en la grand projekto de UNESKO pri la reciproka aprezo de la kulturaj valoroj de Oriento kaj Okcidento. La plej lasta libro en la Serio estas recenzita sur alia paĝo. Estas eble, ke kiam la Antologio de Aŭstralia Literaturo aperos, ĝi havos la honoron esti inkludita en ĉi tiu prestiĝoza aro.

De la 20 libroj jam eldonitaj en O-O nia Biblioteko posedas nur 16. Por kompletigi la ekspozicion ni urĝe serĉas membrojn kiuj povas pruntedoni (aŭ donaci!) la sekvantajn:

5. **Martin Fierro**, Jose Hernandez (1834-1886) La Laguna: J. Regulo, 1965.
7. **Kvin virinoj de amoro**, Ihara Sajakku (1642-1693), Oosaka: Pirato 1966.
9. **El la vivo de Syunkin**, Zyun'itiro Tanizaki (1886-1965) Osaka: Pirato, 1968.
11. **Nega Lando**, Yasunari Kawabata (1899-1972), Japana E-Instituto, 1971.



● **ST. LUCIA:** Oficistoj elektigis ĉe jar-kunveno, kiu okazis la 24-an de oktobro, 1984, ĉe la domo de S-ino Winsome Greenhalgh. La membroj elektis la jenan Estraron: Prezidanto: S-ino June Cullen; Vic-Prez: S-ino Annie Spencer; Sekretario: S-ino Ruth Philp; Kasisto S-ino Bernice Patterson; Libroperanto/Bibliotekisto: S-ino Winsome Greenhalgh. Komitato: S-inoj Heather Jones, Ruth

Mason, Deĉia Shonhan, Mary Stevenson, Ruth Morrison.

La ĝisnuna sekretariino, S-ino Beryl Hilsdon, transloĝigis al Warwick kaj S-ino Ruth Philp akceptis la oficon de sekretariino Sia adreso estas **17 Jevons Street, The Gap, 4061.**

La grupo daŭre renkontiĝas ĉe la domo de S-ino Wnsome Greenhalgh, 39 Ryan's Rd., St. Lucia ĉiun merkredon dum la jaro. —Ruth Philp.

● **MELBURNO:** Ni sukcesis enirigi Esperanton en la "Asocion por Plenaĝula Edukado" (Adult Education Association). Okazas 2 klasetoj por komencantoj, kiujn instruas s-ino Ruth Tumman kaj s-ro Herbert Koppel. Inter la studentinoj troviĝas s-ino Susan Cuthbert,filino de la iama (forpasinta) AEA-Prezidanto kaj ĉefekzamenanto Pastro Cowling.

Ĉe la Melburna E-Societo, 5/11, S-ro Ken Linton legis tradukitan rakonton pri "Bencjo, la buldogo". Je 19/11 s-ro H. Koppel legis raporton el sveda gazeto pri vizito de svedaj esperantistoj al la Sovetunio. I.a. ni aŭdis kun surprizo pri vigla Esperanto-agado en Sarmarkand.

Eksterordinare interesan prelegon, 26/11, faris s-ro Marcel Leereveld, kiu montris diapozitivojn pri vizito al la insulo Celebeso kaj rakontis pri strangaj kutimoj de la Toraja-Triboj.

**LA "A.E."  
SUBTEN — FONDUSO  
1984**

|                                    |              |
|------------------------------------|--------------|
| Antaŭe raportita .....             | \$839        |
| S-ino J. Carney, Toowoomba .....   | 10           |
| S-ro E. C. Thomas, Toowoomba ..... | 5            |
|                                    | <b>\$854</b> |

**Beethoven**

Johano, la frato de la fama komponisto atingis bonstaton kaj aĉetis malgrandan bienon Fiere li sendis al Ludoviko vizitkarton kun la surskribo: J. van Beethoven, bienposedanto. La frato respondis: L. van Beethoven, cerbo-posedanto. (Oskar Stolberb).

## RECENZOJ

**Elpafu la sagon: el la buŝa poezio de la mondo.** Tradukis el diversaj lingvoj Tibor Sekelj U.E.A. — Rotterdam, 1983, 187 paĝoj. \$11.55.

Ĉi tiu libro, N-ro 18 en la prestiĝa serio "Oriento-Okcidento", havas specialan intereson por Aŭstralianoj. Aliaj libroj en la serio, eldonitaj en konsultaj rilatoj kun UNESKO, prezentas en Esperanto ĉefverkojn originale verkitaĵojn en la lingvoj angla, araba, bengala, japana, franca, finna, hispana, itala, norvega, portugala, rusa kaj serba. Ĝi ankaŭ enhavas, en "Tutmonda Sonoro" la majstrajn tradukojn far Kalocsay de poezio el diversaj lingvoj, inkluzive el la propra hungara. Nun, la unuan fojon, aperas en Esperanto la poezio de diversaj "sudaj" popoloj, inter ili la aŭstraliaj aborigenoj.

La kolektinto kaj tradukinto, Tibor Sekelj, la fama jugoslava vojaĝanto, ĵurnalisto kaj aŭtoro, vizitis Aŭstralion kaj Papua-Nov-Gvineon kiel gasto de la Aŭstralia Registaro en la jaro 1970. Ĉi tie kaj en aliaj landoj li konatigis kun la indigenaj popoloj kaj aŭskultis kaj lernis multajn iliajn tradiciajn kantojn kaj "buŝajn poemojn". Al sia propra kolekto li aldonis similajn poemojn el aliaj evoluantaj landoj.

La libro estas aranĝita teme. Do, en la fako "La kreado de la Mondo" troviĝas "La Logigo de la Tero" (Gunvigu). La "Kanto por Ĵusnaskito" (Kakadu), kiu estas en la sama fako, eble povus pli taŭge esti en la sekvanta: "Infanoj". Sub "Naturto" troviĝas "Sablo", (Aranda) kaj "La Luno Denove Eliras" (Vonguri). En "Nutraĵo" aperas "Maljunulo Kantas Ekbruligante Fajron" (Aranda).

Estas multaj poemoj el Papuo-Nov-gvineo (Nov-Gineo), kaj en la listo de uzita literaturo estas "Kanaka el Kanam" de "Linton E. Kenneth" (K. G. Linton).

Estas ankaŭ kelkaj el Nov-Zelando (Maori p.22, Maorioj p.151) kaj el la pacifikaj insuloj. Bedaŭrinde la pacifikaj landoj havas koloniajn nomojn (Franca Polinezio; Salomoninsuloj; Fiĝio; Nov-hebridoj Britujo!) kaj eĉ en nekonsekvencia serio Insuloj Gilbert, Britujo (!),

Gilbert insuloj, Britujo (!), Insuloj gilbert, Britujo (!). Ni uzu Vanuatuo kaj Kiribatio, eble Solomoninsuloj, atendante la konsilon de la Akademio.

Bedaŭrinde ankaŭ estas nemalmultaj preseraĵoj. Mi rimarkis dum rapida lego: poeziajn (ajajn) p.7, ankroaŭ (oraŭ) p.8, ĉu (Ĉu) p.10, transformas (formas) p.19, foriras al (el) p.21, donco (danco) p.70, o(Hindujo)(?) p.113, modestas (an) p.124, farigos (iĝos) p.131, mallumu (umo) p.179, McGrow (aw) p.181, Rutherfordo (?ford) p.182

Tamen, el la lingvo same kiel la literatura kaj antropologia vidpunktoj, ĝi estas gravega kontribuo al la interŝanĝo de kulturoj, kiu estas ĉefcelo de la Internacia Lingvo kaj ankaŭ de UNESKO. La 47 vortoj ne troveblaj en PIV (listitaj sur paĝoj 177, 178) fontas ne el la hinda-eŭropa stoko sed el lingvoj kiaj la berbera, svahili, indonezia, tibeta, maoria (toao), melanezia, haŭsa, eĉ el "Aŭs" (paralo) kaj pisino (brudo)! Kaj radikoj en unu "malgranda" lingvo estas uzataj por traduki la saman ideon en aliaj. Ekzemple, en la poemo "Kiu Estas", de la buŝanoj !!) de Bocvano, ni trovas:

"Kiu estas tiu, kiu ne timas policon,  
nek indigenojn nek ruĝajn  
pakehojn\*?"

\*pakeho (el maoria) eŭropano, blankulo, iom admirata, iom malamata.

Tibor Sekelj, profeto por la ne evoluantaj landoj kaj la "tria mondo", elmontris denove en "Elpafu la Sagon", ke Esperanto estas tutmonda lingvo, kaj ke eĉ se ĝi ankoraŭ ne estas la lingvo de multnombra popolo kun sia propra kulturo, ĝi estas jam uzata por interkomprenigi ne nur Orienton kaj Okcidenton sed ankaŭ Nordon kaj Sudon.



Ĉiu serioza Esperantisto devas mem posedi "Elpafu la Sagon" kaj devas proponi ĝin al siaj ne-esperantaj bibliotekoj.

—R.L.H.

### Semajnfino da spektakloj en Esperanto

Muzikistoj kaj aktoroj el pluraj landoj kolektiĝis en Parizo por partopreni la Duan Jaran Festivalon de Kanto kaj Teatro en Esperanto. La programo ampleksis du muzikajn kaj du teatrajn spektaklojn kaj unu satiran kabaredon kreitan de la trupo "La ruĝa kruco".

La unua muzika koncerto pleniĝis ĉefe


  
**Ĉi tiu NAŬA NUMERO por 1984 venas al vi pro  
 la malavaraj donacoj de 62 esperantistoj kaj  
 Esperanto-organizoj, kiuj kontribuis al la  
 "Subten-Fonduso" de nia gazeto.**
  


per kontribuoj de la konataj kantistoj Suzanne (Italio) kaj Jak le Puil (Francio). La dua koncerto impresis kontraste, pro la apudmeto de klasika piana recitalo de Francois Chevrier (Francio) kun vigla prezento de la skandinava rok-grupo "Amplifik". Ĉi tiu grupo, konsistanta el tri svedoj kaj unu dano, verkas siajn proprajn tekstojn rekte en Esperanto.

La Teatro Esperanta de Parizo (TESPA) prezentis adaptojn de du teatraĵoj de R. de Obaldia ("Eduardo kaj Agripina" kaj "La Forpasinto"). La gaste-trupo de Zagreb prezentis "Stilaj Ekzercoj" de R. Queneau kaj jugoslavan verkon "Sonoriloj" de Smiljan Rozman, kies temo estis la danĝero de ekscesa rega potenco.

La Festivalo, kiu altiris internacian spektantaron, pruvis denove, ke la Esperanta kulturo vivas kaj evoluas. (IGS).

### 'KONSULTU LA KONSILANTON'

"Junulo" skribas: "La plej granda nombro de Esperantistoj estas maljunaj. Kial?"

Kara Junulo: Multaj Esperantistoj ja estas maljunaj. Ni ĝojas, ke tiom da samideanoj sukcesis travivi tiel bone.

Memevidente ni estas maljunaj ĉar ni naskiĝis antaŭ multaj jaroj. Ĉu vi intencis demandi kial Esperanto, verŝajne, ne allogas la ĝejunulojn? Mi provos respondi al tiu demando.

En angleparolantaj landoj, speciale, malmulte da infanoj nun lernas fremdajn lingvojn. Dum la "bonaj, malnovaj tagoj", ĉiuj el la pli inteligentaj studentoj lernis latinan, eble francan, germanan, eĉ klasikan grekan lingvon. Apetito kreskas per tio, kio nutras ĝin. La junularo ne plu havas apetiton por fremdaj lingvoj.

Estas antaŭjuĝo kontraŭ Esperanto inter profesiaj instruistoj, kiuj opinias, ke ĝi estas minaca. Fakte, Esperanto povus helpi studentojn, kiuj volas lerni aliajn lingvojn. Estas antaŭjuĝo inter etnikaj grupoj, kiuj volas enirigi siajn proprajn lingvojn en la lernejojn.

La Esperanto-movado strebas allogi la junularon kaj ĉiujare la junularaj kongresoj, samlande kiel la universalaj kongresoj, estas bonsukcesaj. Ili ja stimulas intereson inter la junuloj. Ni povus kaj devus stimuli kaj daŭrigi tiun intereson.

Junuloj kaj mezaĝuloj ja komencas Esperanton sed, bedaŭrinde, ili "falas flanken de la vojo". Ni estas nacio de komencantoj, ne progresantoj.

Ĝoju ni, ke multaj el niaj antaŭaj komencantoj ankoraŭ restas. Ili estas nia hodiaŭa maljunularo!

### AŬSTRALIA ANTOLOGIO

El la listo de la aŭtoroj kaj pecoj elektitaj por nia "Aŭstralia Antologio", la jenaj eroj restas ankoraŭ tradukotaj: Richardson: el romano: *The Fortunes of Richard Mahoney*.

Murdoch: eseoj: "My Bushfire".

Bean: eseoj: "The Red Country" (el "On The Wool Track") — aŭ peco el lia Historio de la Unua Mondmilito.

Esson: el dramoj: "The Sacred Place" — aŭ "Dead Timber, and Other Plays"

Pritchard: el romano "Coonardoo".

Boyd: el romano "Lucinda Brayford".

Palmer: rakonto "Tobacco".

Davidson: el romano "Manshy".

Dark: el romano "The Timeless Land".

Fitzgerald: poemo "Quayside

Meditations".

Stead: el romano "Seven Poor Men of Sydney".

H. Drake-Brockman: rakonto el "Sydney or the Bush".

Seymour: el dramo: "The One Day of the Year".

Hope: poemo "Australia".

Herbert: el romano "Capricornia" aŭ "Poor Fellow My Country".

Porter: "The Followers".

Stivens: rakonto "The Pepper Tree".

Tennant: el romano "Ride On Stranger".

"Seaforth" Mackenzie: poemo "The Wagtail's Nest".

Dobson: poemo "Cock Crow" aŭ "Jack".

Thiele: rakonto el "Sun on the Stubble".

Walker: rakonto "Kill to Eat".

Horne: el romano "The Permit" — aŭ el "The Lucky Country".

Johnston: el romano "My Brother Jack".

Kenneally: el romano "Bring Larks and Heroes" aŭ "Schindler's Ark".

Moorehouse: rakonto el "The Electrical Experience".

Hibberd: el dramo "A Toast to Melba".

Thwaites: poem "Milton Blind".

Tradicia kanto: "Click Go The Shears".

Tiuj, kiuj proponas traduki unu aŭ plurajn el ci tiuj, bonvolu informi ĉe mi, antaŭ ol komenci, ĉu iu alia jam entreprenis la tradukon de la koncerna peco. Bonvole indiku ankaŭ, kiu nun tenas la kopirajton.

Elektu vi mem taŭgan eliraĵon el la koncerna dramo aŭ romano, ne pli longan ol 7 paĝon, malpli se eble, sed sufiĉe kompletan en si mem. Mallonge resumu la intrigon, kaj traduku la plej trafan sekcion.

Pri la propraj nomoj;

(i) Oni lasu senŝanĝe familiajn kaj malpli konatajn geografiajn nomojn, indikante por ĉiu la prononcon per Esperanto-literoj (en parentezo tuj post la nomo)

Bone konatajn geografiajn nomojn (kiaj Kvinlando, Brisbano, ktp.) oni kompreneble traduku.

(ii) Oni traduku antaŭnomojn, se bone konataj ekvivalentoj jam ekzistas (ekz. Petro, Maria).

Oni lasu senŝanĝe (konsekvence kun (i) supre) la malpli konatajn (Moyra, Dallas, ktp.), indikante por ĉiu, se necese la prononcon per Esperanto-literoj, kiel supre.

Por tiaj, kiaj Bill, Fred, Vic. ktp. (t.e., mallongigoj de konataj antaŭnomoj), oni uzu la regulajn Esperanto-formojn Vilĉjo. Freĉjo, Vikĉjo ktp.) — aŭ, laŭ

prefero kaj cirkonstancoj, oni lasu senŝanĝe ankaŭ tiujn vortojn, klarigante ilin per piednoto (ekz. Bill: mallongigo de "Willam" (Vilhelmo); = Vilĉjo. Peg/Meg: mallongigo de Margareta). (Mi preferas (kun J. C. Wells) la a-finajon por inaj nomoj, por eviti konfuzon inter "Julius" kaj "Julia", "Marius/Mario" kaj "Mary/Maria" ktp.)

—ALAN TOWSEY  
(Komisiito por la Antologio)

**TRIBUNALO "RUSSELL":** La itala ŝtatprezidento, Sandro Pertini, kaj Papo Johano la dua, estas inter tiuj personoj kiuj, laŭ la konata "Tribunalo Russell", plenumis en 1983 "noblajn kaj humanajn gestojn, strebantajn al interkompreniĝo inter la popoloj".

La Tribunalo ankaŭ diskonigis liston de tiuj, kiuj en 1983 plenumis "la plej severajn malrespektojn de la homa digno", kaj do meritas "negativan premion." Inter ili troviĝas Ronald Reagan kaj Yuri Andropov, kiuj havas komunan kulpon: ili emfazis la ŝtatan racion kaj la kulton de potenco, senkonsidere pri la pluvivado de nia planedo.

(D-ro A. De Salvo en la Esperanto-emisio de Radio Roma)

**EL POPOLA ĈINIO:** La 1985-a abonvarba kampanjo de EL POPOLA ĈINIO jam komenciĝas. Ek de 1-a de nov., ĝis la 28-a de feb., 1985. Tiu, kiu abonas aŭ reabonas en tiu periodo senpage ricevos koloran Esperantan kalendaron por 1985, kaj mapon de la Ĉina Popola Respubliko en Esperanta eldono.

**Abontarifo:** 1 jaro \$9.00, 2 jaroj \$15.00, 3 jaroj \$21.00. Sendu al K. G. Linton, 4/2 Lyons St., Glenhuntly, Vic. 3163. Tiu, kiu varbas novan abonanton ricevos ĉinstilan memoraĵojn.

Inter viroj:

—Mia edzino estas anĝelo.

—La mia ankoraŭ vivas.

Inter virinoj:

—Mia edzo mortis trian tagon post la edziĝfesto.

—Do, li ne suferis longe.

